

HAN RINER

LA TURO  
DE L'  
POPOLOJ



KOREKTENDOJ

paĝo	57	linio	22		
paĝo	)	)	)	)	)
60		7		gorgo	→ mumiojn
60	piednoto				→ zorgo
137		-1			→ la dio luno
					→ Ĝis fine

HAN RINER

(HAN RYNER)

LA TURO  
DE L'  
POPOLOJ

el la franca originalo  
tradukis Valo.

Cercle espérantiste de l'Agenais  
"Laïte!" \* F 47340 Laroque Timbaut

1983

# HAN RINER, La Turo de l' Popoloj kaj Esperanto

En 1936 Han Riner permesis al mi traduki liajn verkojn, interalie la "Tour des Peuples", kaj tre kuraĝigis min entrepreni tiun tradukadon. Tamen pri tiu ĉi mi tre longe hezitis. Mi timis, ke iuj supraĵaj legantoj kredos flari el tiu libro ian odoron de rasismo kaj antisemitismo.

Ĉiuj, kiuj persone konis lin aŭ sufiĉe familiariĝis kun lia verkaro, scias, ke tiuj ismoj staras je la antipodo de la rinera penso. En la romano, ja la simpatia persono estas la blonda Arjo Rifat, dum la ĉefaj kaŭzantoj de milito apartenas al la tribo de la "idoj de Sem". Sed, se oni ĝuste kaj funde legas, oni komprenas, kaj ne eraras pri la celo de la aŭtoro : celata estas ne la "raso" de la Semidoj, sed ja la mosea teologio rigardata kiel prototipo de la plej maltoleremaj fanatikismoj : nome la tri ĉefaj monoteistaj religioj.

En tiu libro Han Riner renovigis la miton pri la Babelturo. En lia fikcio la popoloj ne parolas komence unu lingvon, kiu poste disfalas en dialektojn ĝis perdo de la interkomprenado. Ĉiu popolo havas origine sian propran idiomon. En la kunlaborado por starigo de la Turo de l'Popoloj spontane kreiĝas speco de ĵargono, kiu pli kaj pli riĉiĝas. Tio ŝajne antaŭanoncas la mondlingvan teorion de Stalino, laŭ kiu tutmonda lingvo rezultos el natura kunfandiĝo de la naciaj lingvoj. Ni tamen scias, ke ne tia estis la ideo de Han Riner.

Pripensinte la demandon, Han Riner konkludis, ke tutmonda interkomunikilo povas esti nur planlingvo, kaj ke la vera praktika solvo estas Esperanto. Li ne kontentiĝis per vorta aprobo, kiel ajn elokventa kaj varma, kiel tro multaj eminentaj intelektuloj\*. Li, kiel Tolstoj,



volis scii per propra sperto, pri kio temas. Instigite de sia amiko Lanti, li komencis lerni nian lingvon, sufiĉe por almenaŭ flue legi ĝin. Leginte mian unuan provon de traduko de la "Kvina Evangelio", li bonvolis deklari ĝin "fidela kaj supla". Ĉu li estus uzinta tiujn vortojn, se li rigardus Esperanton kiel mallertan, malriĉan, malbelan lingvaĉon ?

Mi demandis lin, ĉu li ne intencus verki originale en Esperanto. Li respondis proksimume : "Mi jam pripensis tion, sed mi rezignis. Mi opinias, ke artisto devas limigi sin al la praktiko de unu instrumento, en kiu li senfine pliperfektigu. Mia instrumento estas la franca lingvo. Tial, jam antaŭ longa tempo, mi ĉesis verki en la provenca. Sed mi aprobas, ke bonaj esperantistoj elektu Esperanton por verki originale en tiu lingvo."

Se li do ne verkis mem en Esperanto, li almenaŭ deziris pli intime ekkoni per legado la Esperantan literaturon. Ni scias, ke tiucele, en la lastaj monatoj de sia vivo, li entreprenis pli fundan lernadon de la lingvo. Tiu fakto, kiel lia tuta sinteno, klare montras, ke por li Esperanto estas ne ia komerca kodo, sed vere valora instrumento, inda je atento kaj prilaborado.

La tradukinto.

La vortoj ne troveblaj en PV kun suplemento, se ne klarigitaj per piednotoj, estas listigitaj en fina glosaro.

La uzado de la pronomo ci ne estas aprobata de ĉiuj membroj de la Literatura Komitato. Ĉar ĝi ne estas kontraŭfundamenta, mi persistis en ĝia uzado sub mia persona respondeco.

\* En Francio Romain Rolland, Henri Barbusse, Jean Rostand, Georges Duhamel, Maurice Genevoix, k.c.

## Ĉapitro I.

# Rifat

Jam dum kiom da lunmonatoj estis marŝanta tiu multopa junularo ? Ĝi ekiris en printempo, sin mem proklamante "sankta printempo". Trenataj de bovoj aŭ de fortikaj ĉevaloj, ĝiaj ĉaroj kun plenaj radoj foriras de la lando, kiel sin deligas de la bordo ŝipoj de ĝojo, de kantoj kaj aventuroj. Tangante kaj ruliĝante, ili sentime malsupreniris de viaj altebenoj, Meru, patro de l' homoj. Dum la tuta mateno la maljunuloj laŭkutime akompanis la elirantojn. Anstataŭ multoblige la kutimajn rekomendojn, ankaŭ ili kantis, ebriigite de la najbara ebrio.

Ilin mirigis tiu foriro, pli arda, pli avida pri nekonataĵoj ol ĉiuj ĝistiamaj ekziloj necesigitaj de la multiĝado de la raso aŭ de la invadoj de nordaj popoloj. Dirante mirojn, esperojn, rememorojn, la langoj ne satigis. Jam longan tempon - de la epoko, Sinjoro Agni, en kiu la parolantoj estis mem junaj -, neniu junularo montris tiom da ardo kaj aŭdaco.

Ekirinte en printempo, la Arjoj suferis, sur nesekuraj stepoj, la brutalan fajron de somermezo. Sur montaj dezertoj ili kontraŭmetis siajn feltajn tendojn al la aŭtunaj fulmotondroj. Kie do vintro rigidigis la ŝafidan felon de iliaj pintaj ĉapoj, la ledon de iliaj tunikoj kaj pantalonoj ? Ili suferis sennombrajn kontraŭaĵojn kaj mizerojn falantajn de l'ĉielo aŭ leviĝantajn de la tero ; ili alfrontis la riskojn de nekonato sin kaŝanta kaj renoviĝanta ; ili en bruskofaloj alpuŝigis al dangeroj subkaŝitaj kiel kaptiloj aŭ fortegaj kaj kriantaj kiel tempestoj. Ne ĉiam ili trovis grenon por mueli kaj kuiiri, viandon por krude manĝi, salon per kiu oni ilin gustigas. De iuj renkontitaj popoloj ili lernis novajn manĝaĵojn ; ili devis, malgraŭ malinklinoj kaj minacoj pri veneniĝo, provi mil nekonitajn nutraĵojn.

Nun ilia malsato plezure akceptadis tion, kion proponis la hazardo. Por pluraj el ili, novaĵo, antaŭe timiga kaj naŭza, fariĝis plezuro, ekscitilo, febra sciivolemo.

Dum printempo, dum somero, dum aŭtuno, ilia sencela marŝado de nomadoj, kiuj eble iam konstruos, eble senfine daŭrigos la tendan vivadon, ofte hirtiĝis kontraŭ atakoj de tieaj loĝadantoj aŭ de aliaj vaguloj. La akriĝitaj ŝtonoj de iliaj lancoj kaj sagoj luktadis kontraŭ similajn armilojn aŭ kontraŭ la impresan novaĵon de glavo kaj bronzo. La popoloj sin manifestis kruelaj: la sama vorto, kiu signis fremdulon, signifis malamikon, kaj, se iu parolis pri renkonto, la aŭdanto ja sciis, ke temas pri batalo.

Ankaŭ internaj disŝiroj kaj intrigoj malfortigis la tribon. Je la ekiro, ĝi obeis, ne senmurmure, al Askenaz, junulo kun reĝa sango.

Sed pluraj, tiel nobelaj kiel li, aspiris al komando. Ĉiu havis siajn partianojn. Askenaz sin tenadis kiel ĉefo per la ŝanĝiganta oportuno de la aliancoj: la malfortuloj sin grupigis ĉirkaŭ li kontraŭ iu ajn, kiu momente minacis lin superi.

Dum la vintraj suferoj, strangaj ŝanĝoj okazis, oni ne scias kiel, en la menso de la fuĝantoj. Laŭ kutimo eble ne malraĉia, ili akuzis pri siaj plagoj la erarojn, la tromemfidon, la neglektojn aŭ la stultecon de la ĉefo. Sed malmultaj fariĝis tiuj, kiuj portis sian konfidon al iu alia pretendanto kaj plidikigis iun partion. La popolamaso, sen proklami aŭ eĉ voki per siaj deziroj iun novan mastron, pli kaj pli rifuzis obei la malnovan mastron. La ordonoj estigis nur ridojn kaj ŝultrolevojn. Fine la incitigema Askenaz disiĝis de la tribo; sekvate de malmultaj fideluloj, li sin direktis al Nordo. Sinsekve, ĉiuj pretendantoj imitis lian ekzemplon, kaj diversaj etaj trupoj forlasis la plimulton el la "sankta printempo"

Okazis aliaj faktoj, eble pli strangaj. Ĉiuj nun renkontataj hordoj celadis al okcidento kiel la tribo de la Arjoj. Ili jam ne estis malamikaj, eĉ ne timemaj. Oni interparolis, oni penis sin interkompreni, oni ĝojis marŝi kune, sin miksi por unu tago aŭ por pli longa

tempo. Kaj oni ne plu komercadis. Veniu petis pri io ; ĉiu, kun elfloranta aŭ timida volupto en la rideto kaj en la okuloj, proponis tion, kio ne estis al li necesa. Popoloj unuigis. Ofte ankaŭ homo transpasis en novan tribon, sen ke ĉi tie oni lin repuŝis, sen ke tie oni lin mallaŭdis kaj akuzis pri perfido. Ne nur inter popoloj, sed ankaŭ de fremdulo al fremdulo sin nodis amikecoj de unu horo aŭ de tuta vivo.

La urboj fermigis, ĉiam malkonfideme, je la alproksimiĝo de la nomadoj. Sed la loĝadantoj en vilaĝoj kaj en izolitaj domoj, anstataŭ repuŝi ilin kiel antaŭe, ilin insultante kaj nomante ŝtelistoj, akceptis ilin kun konfidemo pli kaj pli frateca. La multaj hordoj, kiuj ŝajne deziris atingi la lokojn, kien subiras la suno, ripetis, en diversaj lingvoj, vortojn kun mistera ĉarmo, vortojn, kiuj ligis interamon kaj igis onin dolĉe enpensema, kiel birda kanto aŭ murmurata revo de graveda virino :

- Ni iras por konstrui la Turon de l'Popoloj.

Kio estis, en ilia penso, la Turo de l'Popoloj ? La ŝanĝigantaj formoj de ĝiaj sonĝaj arkitekturoj havis ĉa neprecizajn destinojn. Tamen, dum diversaj kaj variaj restis la bildoj, kiuj stariĝis ĝian flirtan figuron, kiel ĝian ekflugon, iom post iom ĝia celo ŝajne fariĝis malpli svaga. Sed ankoraŭ kiom da revo kaj da nebulo en la glitanta helo, en la moviĝanta precizeco de iuj vortoj :

- Ni konstruos la Turon de l'Popoloj. Kaj ĝi altiĝos ĝis la ĉielo.

Ĉu la plej krudaj el la parolantoj kaj aŭskultantoj ja esperis atingi la loĝejon de la dioj ?... Aliaj, pli subtilaj, ridetis, redirante la belegajn vortojn. Ĉu ilia rideto ne estis la aŭreolo de onda lumo, kiu ĉirkaŭas la simbolojn ?

La malsamaj vortoj, kiuj en la diversaj lingvoj signifis la popolojn, estis de ĉiuj prononcataj en la sama tono. Ĝoja, ama, pia tono. Pasante tra ĉies lipoj, la diversaj vortoj, kiuj signifis la popolojn, faris la saman bruon, kiel kiso.

Pluraj diris :

- Kiel freneza kaj stranga estis la vivo antaŭ ne-longe... La homoj, pli kruelaj ol tigroj kaj martiĥoroj\*, batalis kontraŭ homojn. La homoj, pli rampantaj ol limakoj kaj hundoj, obeis al homoj.

Ĉu la triboj estis liberiĝintaj, tiel profunde kaj daŭre, kiel ili kredis, de la frenezo de l'bataloj aŭ de la krimo de obeado, patro de tiom da krimoj ?

Ĉiam ĉirkaŭ unu homo sin kunpremadis ĉiu grupo. Sed tiu homo sin altrudis kiel amo, ne kiel aŭtoritato. Ofte li distingiĝis nek per sia naskiĝo nek per tio, kion oni hezitas nomi lia oficiala scio. Lia parolo ĉarmis per mildo kaj per oni-ne-scias kia lumo, ĝojo kaj espero. Ĝi ne ordonis, brutala kiel bastono. Ĝi ebriiĝis, kiel plej dolĉa kaj kune plej fortiga vino. Oni ne nomis lin reĝo aŭ ĉefo. Li ne estis pastro agnoskita kaj konsekrita de aliaj pastroj. Oni donis al li nomojn, kiuj signifis proksimume : "la profeton". Ĉiu sekvis lin, obeante al sia propra koro kaj kredante obei al la estonteco.

Neniu regula voĉdono elektis lin inter aliaj, neniu ceremonio kaj neniu sanktoleado markis lin. Li inspiris konfidon ; tio estis lia sola titolo.

Se iu ne fidis al li, la rifuzanto restis maltrankvila, flirtanta ĉe la rando de la tribo. Li aŭskultis la aliajn renkontitajn profetojn, kaj iafaĝe sin ligis al unu el ili, emociite per io konfuze atendita, kiu resonis en la nova parolo, aŭ konfuzite per la mistero de malprecize komprenata lingvaĵo.

Rifat, la profeto, kiun la Arjoj sekvis kantante, kiel ili antaŭe sekvis Askenazon murmurante, ne naskiĝis el famega familio. Sed lia korpo estis bela, lia parolo ĉarmis la orelon, la spiriton, la memoron. Kun svelta kaj supla figuro, kun larĝa brusto, li portis, en rideta memcerteco, regultraĵtan, pure ovalan vizaĝon ĉirkaŭatan de la blondaj bukloj de abunda hararo. Liaj grandaj belfendaj okuloj ŝajnis du flirtaĵoj de blua lumo. La brovoj, perfektaj arkoj, kuniĝis super rekta nazo, kiu pluigis la linion de la frunto. Nek

---

\* martiĥoro : fabela rabobesto. Vd. pĝ 91.

ŝvelaj nek stretaj, la lipoj, eĉ ne parolante, estis elokventaj, kaj ilia duone malfermita silento ŝajnis pensi. La mentono malaperis sub onda barbo. La manoj kaj la piedoj estis malgrandaj kaj flekseblaj.

Rifat nenion faris kun intenco esti sekvata. Li diris sian emon kaj sian esperon ; lia espero kaj lia emo fariĝis ĉies. Neniam li komandis aŭ konsilis : "Ni iru tiun vojon!". Sed, tuj kiam li estis dirinta : "Mi iras tiudirekten", ne ekzistis alia vojo por la amaso.

De antaŭ kelka tempo, inter kamparoj humidaj kaj riĉaj, la urboj multiĝis. Oni sin deturnis kun malŝato de ilia malamikeco. Al la nomadoj la urboj ŝajnis loĝataj de speco de malfruiĝintaj homoj : en ili daŭre regis pastroj kaj reĝoj ; stultaj amasoj en ili daŭre obeadis.

Iafoje la trenata pezo de bedaŭro malrapidigis la formarsadon. Juneco estas scivola. Ĝi estas entreprenema. Pluraj sentis en si apostolan fermentadon ; ili emis prediki al la urbanoj, kun la vasta homa frateco, la belan neceson konstrui la Turon de l'Popoloj, simbolo de universala amo.

Tiuj sentoj venkis en la koro de Rifat, kiam li ekvidis la belegan urbon, kiun la Sumeranoj kaj Akadanoj nomis Kalanna ; sed iuj nomadoj antaŭ nelonge renkontitaj nomis ĝin Ur-Kasdim, t.e. Ur de la Kaldeanoj.

Antaŭ la trapaso de granda fortega riverego, la domoj estis konstruitaj el ŝtonoj. Poste izolaj loĝejoj, vilaĝoj kaj urboj disvolvis, sur artefaritaj teramasoj, masivajn arkitekturaĵojn el brikoj. El la domaregoj renkontitaj dum la elirado, neniu proksimiĝis al la vastego de Ur-Kalanna.

Ĝi estis senmezura kvadrato. En ĉiu flanko malfermiĝis du pordoj. Unu, sen ia ornamo, donis aliron per facila deklivo al ĉaroj kaj bestoj. Al la alia oni supreniris per dek du ŝtupoj de duonulna alto. Antaŭ unu el tiuj ĉi, ornamita pordo, la hazardo kondukis Rifaton.

La enirejo, kiu antaŭe sidis je sesdek ulnoj trans la ĉirkaŭmuro, tamen ŝajnis retroiri en malfido. Ĝi strangoliĝis inter du pezaj turoj, kiuj elstaris sur

la ŝtuparo. Sur la krenelitaj muroj gvatis pafarkistoj. Malsupre gvatis ankaŭ estaĵoj el briko, eble timindaj. Kun la korpoj metitaj ĉe la interna murflanko, sed la vizaĝoj kaj brustoj turnitaj al ekstero, gigantaj taŭroj kun homa kapo, pezegaĵoj levataj de flugiloj, ŝajnis pretaj ĵeti al la fremdulo sian pezon kaj sian impeton. Malantaŭe, en ombro, genioj senpene sufokis kaj premegis la potencon de leonoj. Mil strangaj ĉirkaŭis la teruron per tremetanta miro. La kapoj de la taŭroj estis vestitaj per mitroj, sur kiuj estis apogita la cintro. Ĝin dekoris bendo el emajlitaj brikoj, sur kiu aliaj genioj, tiuj ĉi pacaj, duope sin alfrontis, kaj, tra multkolora rozvitralo, prezentis unu al la alia la pinkonuson, simbolon de fekundaj prosperoj.

La arkistoj ne lasis al la Arjo libertempon por admiri tiujn mirindaĵojn. Timigitaj de la sennombra homamaso, kiu kovris la ebenaĵon ĝis la horizonto, ili kriis, kaj en ilia tro laŭta voĉo tremis timo kaj minaco :

- Kiu estas ci ? Kaj kion ci volas ? kaj kion volas la homoj, kiuj marŝas post ci ?

La nomado disponis nur je malmulte da kaldeaj vortoj. Sed, eĉ ne pridemandite, li estus proklaminta sian nomon kaj sian deziron. Kun gesto supren li diris :

- Rifat.

Kaj kun gesto antaŭen kaj rideto li diris :

- Eniri !

La povo de la estro de la arkistoj ne sufiĉis por solvi tiel gravan demandon kaj konsenti tiel gravan permeson. Li eksplikis, ke li kuros demandi la reĝon. Poste li malaperis, dum Rifat kvietigis la malpaciencon de siaj kunuloj, kiuj murmuris aŭ kriis :

- Ĉu ni ne estas homoj, aŭ ĉu ili ne estas homoj ?

La kapitano trovis la reĝon en la granda korto de la palaco. Tiu vasta rektangulo preskaŭ kvadrata havis laŭ unu flanko nemulte malpli ol ducent ulnojn, laŭ la alia iom pli ol ducent ulnojn. Sidante sur

trono kun dorsapogilo, sed sen brakapogiloj, ĉirkaŭate de altrangaj eminentuloj kaj pastroj, Urĥam prezidis solenan ceremonion. La soldato ricevis permeson alparoli lin. Kun la manikoj malsuprentiritaj sur la manoj, kun la dekstra antaŭ sia buŝo, por ke la malpura spirajo de regato ne atingu la suverenon, li citas la peton de la fremdulo, kaj li diras, kia multopa amaso, pli densa ol ĉiuj amasoj iam viditaj, antaŭeniras post liaj paŝoj.

Sin turninte dekstren al la granda pastro, la reĝo demandis :

- Ĉu mi povas konsenti aŭdiencon, kiu ŝajnas urĝa ?

Antaŭ ol respondi, la pastro ekstaris en signo de respekto. Ankaŭ li humile kovris ambaŭ siajn manojn, kaj humile metis la dekstran antaŭ sian buŝon. Sed, malantaŭ tiu remparo, la voĉo sonis altaŭtoritate.

- La dioj - proklamis Hamurabi - pasas antaŭ la homoj. Kiam ceremonio estas komencita, la ĵaluzaj dioj ne permesas, ke oni interrompu ĝin.

Tamen la reĝo ordonis, ke oni enlasu Rifaton kaj liajn plej proksimajn kunulojn. Sed oni fermos la pordon inter tiuj privilegiuloj aŭ ostaĝoj kaj la timinda amasego.

Do kelke da Arjoj pasis inter la minacaj taŭroj kaj la genioj sufokantoj de leonoj. Suprenirinte la krutajn ŝtupojn, ili trairis korton. Inter du novaj turoj, ili enprofundiĝis en longa volba koridoro trastrekata de la mistero de multaj transversaj galerioj. Post sesdek paŝoj en mallumo, ili eniris en la blindigan lumon kaj en la urbon. La senfenestraj domoj, kies stretaj pordoj sin kaŝis en angulo, kies terasoj estis strange ĉapelitaj per konuso aŭ kupolo, formis rektajn stratojn orte krucataj de aliaj rektaj stratoj.

Ili supreniris la ŝtuparon de la palaco. Sed ili ne eniris tra la reĝa solena pordo, potenca kaj ornamita kiel la enirejo en la urbon. Oni kondukis ilin tra flankaperturo. Malalta, strangolita, sen riĉeco, trudanta klini la kapon, ĝi ŝajnis konsili singardemon kaj humilecon. Tra komplika kaoso el konstruaĵoj, ili atingis la vastegan honorkorton kaj ĝian pavimon el bakitaj brikoj.



De malproksime, ili ekvidis en lia tuta gloro reĝon Urĥam, kies nomo signifas "Lumo de l'Suno"n.

Ĉe la fundo de la korto, sur teramaso kvar ulnojn alta, kie lin ĉirkaŭis, pompe rigidaj, oficiroj kaj pastroj, li okupis tronon el oro kun leonaj piedoj. La dorsapogilo, kaŝata de lia torso, prezentis kaptitojn en pozoj penegaj kaj humilaj. Lia dekstra mano apog-iĝis sur glavo, kies tenilo estis formita de du interfrontantaj leonoj. Larĝa ombrelo el brodita ŝtofo ruĝa kaj blua ĵetis sur lian kapon solenan ombron. Malantaŭ li starante, du eŭnukoj daŭre movadis muŝpeliilojn. Longaj haroj kaj pluretaĝa barbo. La haroj, preskaŭ blue nigraj, draste kontrastis kun la malbrile blanka haŭtkoloro. Liaj vestoj, sur kiuj brodaĵoj prezentis batalojn kaj oferojn, falis pezaj, kaj ĉiu faldo similis al metala rompaĵo. Ili igis la monarkon stranga kiel idolo.

Li estis ĉirkaŭata ne nur de vivantoj, kiujn ilia senmoveco ŝajnis preskaŭ nerealaj. La muro malantaŭ li estis ornamata de personoj, kiuj procesie marŝis al lia majesta strangeco. Tiuj personoj el emajlitaj brikoj, estis mirigaj pro sia ega staturo, pro pozoj similaj en senfina ripetado kaj pro alternaj koloroj : post blua viro venis olivoverda viro, poste malhelflava viro. Sekve la serio trikolora rekomencis en sama vico la gestojn solene identajn.

Urĥam ne turnis sin al la nove venintaj, kiuj, gvatataj de gvardianoj, miksiĝis en la amaso. La pastro, kiu starante parolis, ne interrompis sian paroladon. Eterna ŝajnis la silento, en kiu, bombaste malrapidaj, pli glitis ol falis liaj vortoj.

Rifat kaj liaj kunuloj komprenis nur malmulte el la prononcataj vortoj. Emociite de la silento, de la senmoveco kaj de la enpensiga etoso de la amaso, ili aŭskultis en kvazaŭ religia timideco.

- Niroŝ-Salman - diris la pastro - ho Niroŝ, sinjoro de l'misteroj, ho Salman, kiu boras la himenon, degnu plimultigi la familion de la fidelaj regatoj de Urĥam, reĝo de l'mondo, reĝo de Kalanna, de Ereŝ, de Sippara, vikario de Eŭfrato, suvereno de la Sumeranoj kaj de la Akadanoj. Ho Salman, igu la fianĉinon facila,

fekundigu ŝiajn brakumojn, multigu sur ŝia korpo la bonaŭgurajn makulojn. Niroŝ, ci kiu ekscitas la sensojn, degnu blindigi la okulojn de la edzo kaj surdigi liajn orelojn. Aŭskultu, ho Salman, la preĝon de la edzino ; aŭdu, ho Niroŝ, la deziron de la edzo. Helpu, Niroŝ - Salman, la produkton de la nova paro, kaj al ĝi estu konsentitaj infanoj.

La popolo apogis la preĝon per ritaj respondoj.

La viroj unue murmuris :

- Ho Niroŝ, sinjoro de l'misteroj...

Poste la virinoj petegis : ...

- Ho Salman, kiu boras la himenon...

Kaj la tuta amaso en granda krio :

- Niroŝ - Salman, ho Niroŝ - Salman...

Tiam la festo ricevis familieran karakteron. Ĉiuloke ekestis konversacioj kaj ridoj. La gvardianoj bonvole klarigis al Rifat kaj al liaj kunuloj, kio okazis, kio okazas, kio okazos. Sed la fremdaj vortoj kaj la strangeco de la kutimoj nemulte ebligis al ili komprenon.

Ili ĉeestis kaldean geedziĝon.

Inter la homamaso kaj la teramaso, sur kiu prezidis la reĝo ĉirkaŭata de la altranguloj, largis duonronda spaco defendata de spaliro da soldatoj.

Ĉe la fundo, sesdek nudaj junulinoj ordigitaj laŭ unu vico. Je malgranda distanco multaj junuloj kaj servistoj tenantaj bovinojn. Inter la du grupoj, strange izolita heroldo en dukolora robo : dekstra flanko ruĝa, maldekstra blanka. Pli malsupre ol la zono, kojnoformaj literoj diris al la legsciantoj la du nomojn de la duobla dio de l'geedziĝo. Sur la ruĝa ŝtofo, blankaj literoj celebris Niroŝ'on ; sur la blanka ŝtofo ruĝaj literoj celebris Salman'on. Speco de agrafio fermis la du flankojn de la stranga tuniko kaj kunigis la du partojn de la dia nomo. Tiu agrafio prezentis enorman penison penetrantan en obscenan sulkon : ora peniso penetranta en bronzon. Ĉiu movo de la heroldo movis la monstran membron, jen plifundigante ĝin, jen ĝin retroigante kiel por nova impeto.

Je signo de la granda pastro la heroldo prenis ĉe mano la unuan el la junulinoj. Li pasigis ŝin antaŭ la junuloj avide rigardantaj. Kaj li proklamis :

- Oni metas al vendo Mannutamat'on, belan inter la belaj. Kiu deziras aĉeti Mannutamat'on belan inter la belaj, kaj kion oni donas por akiri Mannutamat'on, belan inter la belaj ?

Junulo respondis, ne sen timideco :

- Mi posedas nur unu bovinon. Se tio povas sufiĉi, mi ĝoje fordonas tion, kion mi posedas, por akiri Mannutamat'on kaj ŝian belon.

Nu la riĉaj junuloj eksplodis per rido, kaj la parolinto ruĝiĝis kun honto de malriĉulo.

Alia, kiu proponis du bovinojn, ankoraŭ levis kelkajn ridojn.

Sed pluraj en sama ekmovo proponis tri bovinojn. Tiuj estis seriozaj pretendantoj, kiuj kelkan tempon sin interrigardis kun maltrankvila malamikeco. Fine unu el ili, la riĉega Bakit-Alsi, kriis :

- Mi donas kvar bovinojn.

La konkurantoj trovis la prezon troa. Ili rikanis laŭ alia tono ol antaŭe, kiam oni proponis tro malmulte.

Aljuĝite al la riĉega Bakit-Alsi, Mannutamat bela inter la belaj retiriĝis malantaŭ la vico de la junulinoj por retrovi kaj resurmeti siajn vestojn. Poste la nova paro sin direktis al fajro, apud kiu laboris potisto.

Dume la heroldo ekaŭkciis Halalat'on, juĝitan plej bela post Mannutamat. Sed Halalat ploris, kriante, ke oni humiligas ŝin, kaj ke ŝi estas tre supera al ĉiuj Mannutamat'oj, ĉu realaj ĉu imagaj.

Ĉu ŝia pretendo estis vanteco aŭ blindeco ? aŭ ĉu la oficialaj juĝoj regas eĉ la sensojn de la junaj viroj ?... Halalat estis pagata nur per tri bovinoj. Pli poste ŝi ĉagrenate eksciis, ke la kvar kunulinoj post ŝi vicigitaj atingis la saman prezon.

Sep virinoj, ankoraŭ tre admirataj, kostis ĉiu po

du bovinoj. Dek ses estis taksitaj po unu bovino. Kvin trovis senpagan akiranton.

La bovinoj pagitaj por la belaj servis por doti la malbelajn. Dek kvin alportis po unu bovino al feliĉa edzo. Ok estis edzinigitaj nur kun akompano de po du bovinoj. La antaŭlasta, ĝiba, trovis akiranton dank'al gregeto da kvin bovinoj. La lasta estis tia, ke ŝi repuŝus la plej kuraĝajn. Ankaŭ ĝiba, lama kaj unuokula, ŝi havis haŭton ŝajne oleecan kaj malvarman kiel tiu de iuj naĝantaj bestoj. Sed kia belega riĉo beligis ŝian malbelecon : ses bovinoj, el la plej grasaj. La junulo, kiu interŝange por sia unika bovino ne povis ricevi Manumat'on, resignacie sindonis. Li ridetis, kaj liaj okuloj rigardis al malproksima ĝojo : sin vendinte al- tapreze tiun ĉi jaron, li povos, post dek tri lunmonatoj, aĉeti la plej belan.

Kvankam ili devis sin prezenti nudaj al la granda provo, la junaj Kaldeaninoj estis farintaj, se tiel diri, ian tualeton. Ili sin banis. Ili ŝmiris per parfumoj sian korpon kaj sian hararon. La henaĉo pasto ruĝe tinkturis iliajn ungojn, la polmon de iliaj manoj kaj la pinton de iliaj mamoj. La vangoj estis frotitaj per tiu verda ŝminko, kiun rozigas la kontakto de la haŭto. La palpebroj estis nigritaj per antimono ; la brovoj estis plilongigitaj per miksaĵo el gumo kaj muŝpiedetoj.

Je la distanco, de kiu Rifat ilin vidis, tiuj inĝeniaj artifikoj estis de li ne perceptataj. Vidate de proksime, ili estus gajigitaj lian scivolemon de barbaro pli ol ili ekscitus liajn sensojn. Kovrite per siaj roboj kaj manteloj, pluraj edzinoj pasis apud li por iri al la potisto. Nudaj, la plej admirataj malplaĉis al li pro la masiva pezo de siaj korpoj, amaso da graspuŝegaĵoj. Vestitaj, li malŝatis ĉe ili ilian brutalan vizagon, ilian fizionomion de postulemo kaj avido. Stulta ŝajnis al li la riĉo de la broditaj ŝtofoj, plipezigitaj per falbaloj, kiuj igis la taliojn senformaj.

Tamen unu el la novelzinoj emociis lian Junecon. Tiu ĉi, laŭ la gusto de la Sumer- kaj Akadanoj, ne estis rimarkinda belulino : la juĝistoj vicigis ŝin dudek-oka ; ŝi estis la antaŭlasta el tiuj, kiujn oni konsentis pagi. Ĉu la heroldo ne laŭdis ŝin nur pro profesia devo ?... Lia nekutima laŭdo ŝajnis destinata

por gajigi pli ol por veki admiran atenton :

- Kiuj trovas la strangecon bela, tiuj interkonkuros por la stranga Tel-Loh.

Kelkaj Kaldeanoj havis geston de malŝato pro la supra longeco de ŝia korpo, ŝia maldika talio, ŝia larĝa brusto, ŝiaj ŝultroj iomete altaj, la firma sobereco de ŝiaj mamoj. Nu ĉio ĉi ĉarmis Rifat'on. Li spertis tremeton, kiam, kovrita de vestaĵoj malpli pezaj ol permesis la modo, ŝi pasis, svelta, apud li por iri al la potisto. Altirita per la insistado de lia rigardo, ŝi rigardis lin. Sub la vasta kaj serena lumo de ŝia frunto, ŝiaj okuloj estis du tremetantaj flamoj. Ŝiaj sovaĝaj haroj hirtigis sur ŝia kapo nigran kolekton da misteroj. La nazo ne havis la malvarman regulecon kaldean, sed ĝi rondiĝis en emocia maniero kiel tiu de la belaj Egiptinoj. Kiam la okuloj de Tel-Loh renkontis tiujn de Rifat, la buŝo de Tel-Loh, tro malgranda, infaneca, kun lipoj iomete dikaj, malfermiĝis, elokventa kiel la ekmiro kaj la silento de komenciĝanta pasio.

Tuj kiam aĉeto estis konfirmita kaj enregistrita de la skribisto, la novaj geedzoj sin direktis al la orientanta ekstremaĵo de la placo aŭ al ĝia okcidenta ekstremaĵo.

Sur ĉiu el tiuj du lokoj laboris potisto. La potisto de la riĉuloj uzis tornilon, tiu de la malriĉuloj ne havis alian instrumenton ol siajnmanojn. Unu kaj alia fabrikis dikajn olivojn, kiujn ili traboris, por ke oni povu ilin pendigi al la kolo de la virino. Ili gravuris sur ili la ritan surskribon :

"Halalat akirita de Marmarih la 9an de l'monato sabata de la jaro 11a de reĝo Urĥam."

La potisto de la malriĉuloj ŝajnis pagata per la sama prezo kiel la potisto de la riĉuloj. Al unu kiel al la alia la nova edzino donis du vivajn turtojn enfermitajn en kaĝo el kano. Sed tiu prezo estis simbolo kaj ŝajno. Ĉe ĉiu laboristo ĉiam servis la samaj turtoj. La edzino de la potisto, starante du paŝojn antaŭ li, ŝanĝis la birdojn kontraŭ plej diversajn objektojn. La malriĉaj donis mezuron da daktiloj aŭ duonmezuron da tritiko. La riĉaj, du mezurojn da oleo, unu ŝafidon, leonfelon aŭ eĉ tiun juvelon pli altvaloran ol oro, brakringon el fero.

## Ĉapitro II.

# Reĝo kaj pastro

Kiam la geedziĝoj estis finitaj, juna pastro kondukis infanon antaŭ la reĝon ; la altranguloj ekstaris, poste la reĝo ekstaris. Li metis sian dekstran manon sur la kapon de la infano, kaj li diris :

- Ilgi, mia unuenaskita filo, atingos morgaŭ sian dek-duan jaron. Mi devos lin oferi morgaŭ al Sinjoro Bel, ĉar kio malfermis la uteron, tio estas oferota al Sinjoro Bel. Se la ĉefo de l'pastroj havas ion por diri komisie de Sinjoro Bel, parolu la ĉefo de l'pastroj.

Lasante sur la kapo de sia filo manon eble tremantan, la reĝo residiĝis. Sed la ĉefo de l'pastroj restis staranta por proklami la dian parolon, kaj ĉiuj aliaj, ĉirkaŭ li, restis starantaj por aŭskulti.

- Parolo de Bel : Estu fidelaj al la dioj, kiuj solaj povas ŝirmi vin kontraŭ la demonoj : estu grandanimaj al la dioj, kiuj solaj povas defendi vin kontraŭ la demonoj.

"Parolo de Bel : la fideleco al la dioj estas la plenumo de la juĝkapablo : la grandanimeco al la dioj estas la kronado kaj la radiado de la saĝo. Sed la timo de la demonoj, kontraŭ kiuj nur la dioj povas nin defendi, estas la komenco de la saĝo.

"Parolo de Bel : La demonoj estas la kreaĵo de la Infero, la grandaj vermoj ellasitaj de la ĉielo al la tero de la homoj, la teruraj, kies kriegadoj disvastiĝas tra la kampoj kaj la urbo, la kruelaj, kiuj falas inter la akvoj de la ĉielo, la malicaj, kiuj eliĝas el la sino de la tero. Ili volviĝas, girlando de malfeliĉo, ĉirkaŭ la altaj traboj, ĉirkaŭ la larĝaj traboj. Ili vojiras de domo al domo ; neniu perdo ilin haltigas ; neniu riglilo malhelpas ilian eniron. Ili glitŝovas sin sub la perdo kiel serpentoj, ili enŝteliĝas kiel aerblovo tra la ĉar-

niroj. Ili forigas la edzinon el la brakoj de la edzo, ili forŝiras la infanon de sur la genuoj de la patro ; ili mortigas la sklavon ; ili forpelas la mastron ekster la domon, en kiu li naskiĝis, kaj ili estas la minacanta voĉo, kiu pelas lin de malantaŭe.

"Parolo de Bel : La pia homo lokigu ĉiun dion ĉe la batalposteno, sur kiu la dio lin defendos kontraŭ la potencon de la demonoj. La pia homo metu Nergal' on sur la supron de l'muro, kaj ankaŭ sur la sojlon li metu la bataliston Nergal. La pia homo metu Ea'on en la koridoron dekstre de la pordo, kaj li metu Marduk'on en la koridoron maldekstre de la pordo. La pia homo metu Naruli'n en la teron, apud sia kuŝejo. Dekstre de ĉiu el tiuj dioj, li metu, laŭ la ritoj, ujon el bakita argilo aŭ metalplaton, sur kiu la pastro gravuris preĝon. Matene kaj vespere, la pia homo servas al ĉiu protektanta dio la manĝaĵojn, kiujn li amas, kaj pokalon da trinkaĵo, kiun li amas. Samtempe kiam li proponas sian oferon, la pia homo prononcas potencajn vortojn. Li diras : "Ho vi tre altaj, ho vi Ea kaj idoj de Ea, manĝu bone kaj trinku bone, por ke vi plenumu vian gardadon, kun forto kaj viglo, tiel ke neniu malbono penetru mezen de ni."

La pastro ĉesis paroli.

Nu, li diris nur la kutimajn banalaĵojn, kaj el tio, kion li diris, nenio aludis la oferon de la morgaŭo ; kaj el tio, kion li diris, nenio respondis al la atendo, eble angora, de la reĝo. Urĥam demandis :

- Ĉu la ĉefo de l'pastroj havas nenion plu por diri komisie de Sinjoro Bel ?

La reĝo ekstaris por prononci la nomon de la dio, poste li residiĝis.

- Parolo de Bel : Kio malfermas la uteron, tio apartenas al mi. La malpiulo, kiu rifuzus al mi, en la fiksita tempo, tion, kio malfermis la uteron, estus malamiko de la dioj kaj de la homoj ; li altirus sur sin kaj sur la landon ĉiujn malbonojn kaj ĉiujn demonojn ; kaj neniu dio ilin defendus, lin kaj la landon.

"Parolo de Bel : Oni oferu al mi en la dek-dua

tago la ŝafidon, kiu malfermis la uteron ; oni oferu al mi en la dek-dua lunmonato la taŭron aŭ la bovidinon, kiu malfermis la uteron ; oni oferu al mi en la dek-dua jaro la virinidon, kiu malfermis la uteron."

Denove li ĉesis paroli.

Li estis prononcinta ankoraŭ nur milfoje aŭditajn vortojn.

La reĝo, kun tremo en la voĉo, kiun li pene provis kaŝi, demandis :

- Ĉu la ĉefo de l'pastroj havas nenion plu por diri komisie de Sinjoro Bel ?

Hamurabi reparolis, kaj liaj lipoj duonmalfermiĝis, rideto de kruela koketemo :

- Mi scias aliajn vortojn de Sinjoro Bel, sed ne hodiaŭ vi devas ilin aŭdi. Jen estas tamen tio, kion diri jam hodiaŭ estas al mi permesite :

"Lastan nokton, en la orumita kapelo supre de la zigurato, Sinjoro Bel aperis antaŭ mi en sonĝo, kaj parolis al mi.

"Parolo de Bel en la sonĝo de lia servisto Hamurabi : Morgaŭ la reĝo ne faru la oferon laŭ la kutimaj solenaĵoj. Sed la reĝo kaj la viktimo venos al mi en tuta humileco, kaj ili venos piede, kaj iliaj piedoj estos nudaj, kaj ili marŝos simile al malriĉuloj. Ĉar la riĉuloj kaj la reĝoj estas ankoraŭ malriĉuloj antaŭ mi, kaj la plej fortika el la homoj estas ankoraŭ, antaŭ mi, infano kaj kriplulo. Kaj mi ŝatas la volontajn oferojn. Tial, en signo de perfekta konsento, la oferoto portos mem la lignon por la ofero.

"Parolo de Bel en la sonĝo de lia servisto Hamurabi: Post aŭ antaŭ la ofero, mi manifestos min en granda fajro. La reĝo ne rigardu mian vizaĝon, ĉar la reĝo mortus. La viktimo sin detenu rigardi mian vizaĝon, ĉar la viktimo mortus antaŭ ol esti tuŝata per la rita tranĉilo, tiel jam ne estus ofero. Nu, la loko, kiun mi signas, la sola loko, kie la sango kaj la fumo de la ofero estos al mi agrabla, estas la maldensejo de Bakal, sur la transa bordo de Eŭfrato, inter la kanoj kaj la riverego. Sed la popolo spektos la oferon de malproksime, kaj ĝi restos



sur tiu ĉi flanko de Eŭfrato. La popolo, restinta sur tiu ĉi flanko de Eŭfrato, fermu la okulojn, kaj sin klinu vizaĝaltere, kiam mi manifestos min en granda fajro. Ĉar kiu ajn vidos mian vizaĝon, tiu mortos.

"Parolo de Bel en la sonĝo de lia servisto Hamurabi: Morgaŭ, en la maldensejo de Bakal, mi diros mem al reĝo Urĥam mia tre amata miajn aliajn dezirojn.

"Aŭskultu, reĝo ; aŭskultu, popolo. Lastan nokton, sur la sepa etaĝo de la zigurato piramida kaj supreniĝanta kiel flamo, Sinjoro Bel diris al sia servisto Hamurabi, kiujn ordonojn Sinjoro Bel donos al reĝo Urĥam sia tre amata, kiam Sinjoro Bel sin manifestos en la arda beleĝo de granda fajro. Sed Sinjoro Bel malpermesis al sia servisto Hamurabi diri pli frue ol li tion, kion li volas diri mem en la radiado kaj la brulado de granda fajro."

Ĉi-foje la pastro sidiĝis por indiki, ke li povas nenion aldoni.

Nu la reĝo tremis, kaj apenaŭ povis kaŝi sian tremadon. Ĉar Urĥam estis interkonsentinta kun Hamurabi por savi Ilgi'n. Sed Hamurabi ne diris ĉion interkonsentitan, kaj li diris ne-interkonsentitajn vortojn. Tial la reĝo estis disŝirata de malcertaĵoj ; timo kaj espero interluktis grandan batalon en lia koro.

Ĉu li cedis al tiu speco de malviglo kaj malkuraĝo, kiu akompanas iujn elreviĝojn, kaj, tro incitite, sin deŝargis sur iun alian de sia propra ofico, aŭ ĉu li deziris honori la pastron, kiun li timis, kaj de kiu li esperis ? Li diris al Hamurabi :

- Ĉu ci bonvolos demandi en la nomo de la dioj kaj de Urĥam la fremdulon, kiu petas aŭdiencon ?

La pastro sin klinis por akcepto. Lia vizaĝo estis kiel purpuro, kiu sub vento de orgojlo brilas kaj ekfloras.

Li ne ekstaris por paroli al la fremdulo. La konversacio estis malfacila : Hamurabi ne sciis la lingvon de la Arjo, kaj, se li estus ĝin sciinta, ĉu li degnus ĝin paroli ? La Arjo konis malmulte da vortoj inter la vortoj de la kaldea lingvo.

- Diru cian nomon, postulis la pastro.

- Rifat.

- Diru, kiujn emblemojn portas la tenilo de cia bastono kaj la cilindro, kiu servas al ci kiel sigelilo.

Rifat respondis per granda gesto de nescio.

La pastro preskaŭ mute rikanis. Poste :

- Kiu ne havas sigelilon, tiu povas ankoraŭ subskribi per sia ungo. Sed kiu eĉ ne havas bastonon kaj emblemon, kiel ni prenis lin homo, kaj kiun konfidon inspirus lia parolo ?

Rifat komprenis la laste prononcitan vorton. Pro la malŝata tono li proksimume komprenis la ceteron. Li potence levis indignantan kapon. Per vortoj palpaj, eble nesufiĉaj kaj ridindaj, li kriis :

- Parolo de Arjo pli valoras ol ĉiuj vantaĵoj, kiujn ci nomas sigeloj, stampoj aŭ emblemoj. Ni ignoras tiujn vantaĵojn, tial ke ili estas neutilaj ĉe popoloj, kiu ne scias mensogi.

- Ĉu vi konas almenaŭ la skribon, donacon de la dio de inteligento ?

- Ni ignoras la skribon. Ni neniel bezonas signojn por fiksi nian parolon pli stabilan ol viaj remparoj. Eble tamen ni lernos skribi, por lasi pri ni al niaj idoj ne flirtantajn memoraĵojn, kaj por gardi ilian spiriton kontraŭ la mensogoj de la urboj.

La pastro levis la ŝultrojn.

- Kiom da homoj - li demandis - marŝas post ci ?

La nomado volis indiki grandan nombron. La vorto sesdek estis al li iĝinta familiara, de kiam li estis en Kaldeo. Li respondis, kun granda gesto, kiu komence plilarĝiĝas laŭtakte, kaj poste ŝajnas amasigi la nombrojn:

- Sesdekoble sesdekoble sesdek.

Dum Rifat hazarde amasigis la ciferojn, Hamurabi etendis unu post la alia la fingrojn de la dekstra mano, poste la montran fingron de la maldekstra mano. Kiam la Arjo ĉesis, la kaldeo scienculo ekridegis, kaj la aliaj pastroj post li ekridegis. La altranguloj kaj la popolo,

pro konfido, ridis pli laŭte ol la kleruloj.

- Nescianto pri la potenco de la nombroj, ci diris pli da homoj, ol la tero ne nur ne povus nutri, sed eĉ porti.

- Mi ne scias, kiom ili estas. Ci tiel facile kalkulus la stelojn de la ĉielo.

- De la supro de mia zigurato, mi kalkulis la stelojn de la ĉielo.

La pastro reparolis :

- Kion ci petas, kaj kion petas la homoj, kiuj marŝas post ci ?

La malŝata tono de la demandanto pli kaj pli incitis Rifaton. Li respondis, kaj lia voĉo estis fulmotondro de kolero kaj malŝato :

- Neniam ni ion petis de la almozuloj, kiuj estas la pastroj.

La mirigita amaso eligis minacajn kriadojn. Sennombraj bastonoj levigis super la kapon de Rifat, super la kapojn de liaj kunuloj.

La Arjoj ne faris ian movon. Ili havis sur la lipoj tiun rideton de la martiroj, en kiu miksiĝas malŝato kaj ekstazo.

La granda pastro pensis pri la timinda forto de la fremduloj restintaj ekster la muroj. Necesis ne ekbruligi, per la morto de la ostaĝoj, la venĝon de tiuj hordoj, incendion, kiu bruligus la urbon.

Ĉiuj bastonoj estis levitaj ; ankoraŭ neniu frapis. La okuloj de la Kaldeanoj sin turnis al la reĝo. Timante vundi la orgojlon de Hamurabi, se li ne manifestus plej trankvilan konfidon, la reĝo faris neniun signon. Baldaŭ la rigardoj demandis la grandan pastron. Nun starante, li en freneza hasto multobligis la gestojn, kiuj haltigas kaj pacigas. Li proklamis :

- Tiuj homoj ne scias la sencon de la vortoj, kiel ili ne scias la potencon de la nombroj. Sed, se ili sciis la forton de la vortoj, ilia malpieco estus tia, ke tuŝi unu el tiuj malpiuloj, eĉ por mortigi lin, al-

tirus la koleron de la dioj kaj la liberiĝon de la demoj.

Ĉirkaŭ ĉiu Arjo, rondo de teruro plilarĝiĝis kiel ĉirkaŭ leprulo, kies vestoj falas, kaj kies vundoj riveliĝas.

- Kien vi iras ? demandis ankoraŭ la pastro.

- Al la Turo de l'Popoloj.

Ĥamurabi diris nenion plu. Li sin turnis al la reĝo por aŭskulti la ordonon, kiun donos la reĝo.

- Iru libere - prononcis Urĥam.

Kaj li indikis la direkton al Nordo.

### Ĉapitro III.

## La Ofero

La morgaŭon, antaŭ la matenblanko, la glora reĝo Urĥam kaj lia filo Ilgi marŝis solaj, piede, similaj al malriĉaj pilgrimantoj. La infano portis sur siaj ŝultroj la lignon por la ofero.

La patro estis zorginta fari la ŝarĝon malpeza. Sed la vojo estis longa, kaj la tempo plipezigis la ŝarĝon komence malpezan.

- Patro - diris Ilgi -, tiu ligno lacigas kaj vundas min. Niaj paŝoj post ni estas multaj. Ĉu restas ankoraŭ antaŭ ni multe da paŝoj por fari ?

- Kuraĝon, mia tre amata filo. Estu brava en la servo al Sinjoro Bel, por ke Sinjoro Bel faru al ci korfavoron.

- Patro, ĉu do povas ekzisti senviktimaj oferoj ?... Sed la taŭro, kredeble, aŭ la virŝafo, venos post ni, se nur li ne antaŭis nin kaj ne estas jam alveninta.

- Ekzistas, mia filo, senviktimaj oferoj. La oferoj el tiu speco estas la plej belaj kaj la plej karaj al la okuloj de la dioj.

- Kiel la dioj povus ŝati oferon, en kiu oni nenion donus al ili ?

- En la senviktimaj oferoj oni donas multon : oni donas sian koron.

- Patro, ciaj vortoj ne similas la vortojn de la pastro, kiu instruas al mi la scion kaj la piecon. Ciaj paroloj ne similas la parolojn de la klera kaj pia Kuriĝalzu.

- Mia filo, cia juna aĝo ankoraŭ ne permesis, ke oni diru al ci ĉiujn verojn ; al ci restas ankoraŭ multo por lerni.

- Patro, mi timas. Hieraŭ, la granda pastro kaj ci,

vi parolis kvazaŭ la viktimo devus esti mi.

- Kion ci diras, mia filo ?

- Hieraŭ mi ne timis. Ĉar ofte la pastroj diras simbolojn, kaj mi ne komprenas la simbolojn, antaŭ ol oni ilin klarigas al mi. Hodiaŭ mi timas, tial ke hieraŭ vespere cia mano tremis sur mia mirigita kapo. Kaj mi timas, pro tio ke antaŭ momento ci cin deturnis, sed mi vidis, ke ci ploras.

- La dioj ŝatas la larmojn de la homoj. Ili ŝatas, ke ni iru al ili tremante pro timo kaj espero, plorante pro amo kaj teruro. Sinjoro Bel volas, ke ci estu preta por ĉiuj liaj deziroj. Sinjoro Bel volas, ke ci estu preta, se necese, morti pro li : li redonas centoble tion, kion oni donas al li.

- Kion li povus redoni al mi, se mi donus al li mian vivon ? Kion oni povas redoni al mortinto ?

- Granda estas la potenco de la dioj.

- Ĉu li povus redoni al mi la vivon, kiun mi estus al li oferinta ?

- Li povus ĝin redoni al ci.

- Do, patro, mi estas preta doni al li eĉ mian vivon. Kondiĉe, ke li ĝin redonu, kaj kondiĉe, ke la morto faru al mi nenian doloron.

Urĥam deturnis konversacion, kiu ŝiris lian koron kaj frenezigis lian spiriton. Sed kion li nun diris, tio ne ŝajnis plu interesi Ilgi'n.

Kelkajn paŝojn plu, kaj la infano ekĝemis sub la premega ŝarĝo kaj la doloriga laceco.

- Vere - li suspiris - mi preferus morti ol pli longe portadi tiun ŝarĝon. Verŝajne miaj ŝultroj estas disŝiritaj.

- Kuraĝon, mia tre amata. Eŭfrato estas proksima. Ci ripozos dum la traveturado.

Ronda barko atendis la pilgrimantojn. La patro metis la oferlignon sur la fundon de la ŝipo. Li sidigis Ilgi'n sur la lignon, kaj ekmanipulis la du stangojn.

Li antaŭeniris malrapide, farante sola laboron, kiu kuintime necesigis la penadon de du viroj. Eble li ankaŭ volis doni al la infano, kies paroloj fariĝis ĝojaj kaj malpezaj kiel sensarĝigo, tempon por ripozi. Eble, plie, li timis alveni tien, kien li iris.

Sur la alia bordo, Ilgi ne devis porti longe la repretitan ŝarĝon. Baldaŭ la maldensejo de Bakal akceptis la pilgrimantojn.

Inter densaj kanoj dek ĝis dek kvin ulnojn altaj etendiĝis malvasta duoncirkla spaco, kies diametron formis la rivero.

Sur la alia flanko de Eŭfrato la popolo rigardis. Tra la distanco estis aŭdebla ĝia konfuza murmuro : multoblaj konversacioj aŭ komuna preĝo.

La maldensejo estis disduonigita per la nigra kaj glueca serpentumo de asfalta rivereto. Strange, la reĝo aranĝis la lignon sur mallarĝigo de la malhela kaj peza fluo.

Antaŭ la okuloj malproksimaj sed avidaj de la popolo, Urĥam levis la sanktan tranĉilon, la antikvan tranĉilon el ŝtono. La okuloj de la infano dilatiĝis pro teruro kaj hororo. Li rigardis sian patron en speco de stuporo. Ĉu estas la rigardo de la infano, kiu tremigis, ĉiam je la sama alto, la patran manon ?

Jen Ilgi parolis per voĉo mallaŭta, sufokata, kiel dormanto parolas en inkubsonĝo.

- Vidi la manon de mia patro levitan kontraŭ min, tio estas al mi pli kruela ol la morto mem. Frapu do tuj. Ne plidaŭrigu la agonion, kiun kaŭzas al mi la vido de cia mano levita kontraŭ min.

Urĥam ne respondis. Lia brako restis senmova. Du larvoj, longaj kiel perloj, glitis sur liaj vangoj, renkontis liajn lipojn duonmalfermitajn per oni-ne-scias kia streĉa rideto.

Ankaŭ plorante la infano sin ĵetis sur lin.

Li diris :

- Patro, mi cin petegas, ne ploru. Patro, se mia morto estas necesa al cia gloro kaj al cia prospero, frapu senhezite. Patro, ci estas la dio, al kiu mi min oferas.

- Ne blasfemu, malfeliĉa infano.

- Patro, mi amas cin pli ol ĉiujn diojn. Sed ci, ĉu ci amas la diojn pli ol cian filon ?

- Ni neniam esprimu sentojn, pri kiuj la dioj povus esti ĵaluzaĵ.

- Kiel gravas por mi la dioj ? Kiu malhelpus min diri la tutan veron de mia koro, mi kiu estas tuj mortonta ?

Urĥam repuŝis Ilgi'n en gesto de pia teruro. Poste li redonis al li la ritan pozon. Kaj li petegis :

- Rigardu al la ĉielo, sidejo de Sinjoro Bel kaj fonto de la korkompato.

Sed Ilgi :

- Nur cin, mian tre amatan patron, mi volas rigardi ĝis la fino. La bildo de mia patro estas la sola trezoro, kiun mi deziras kunpreni en la reĝlandon de Allat-Nikingal.

Dum bruaĵ singultoĵ ŝiris la fortikan bruston de la reĝo, la infano diris, kun stranga rido :

- Oni ne ĉiam scias, kion oni volas. Al mi ŝajnas, ke mi volus, ke ci ne ploru, kaj al mi ŝajnas, ke mi volus, ke ci pli ploru.

La longa daŭro de la sceno frenezigis la oferon. Ĉu Urĥam ankoraŭ esperis intervenon, kiu malfruigis trans versaĵno ? Ne, li sin kredis certa, ke la pastro perfidis lin.

Cetere, ĉu li povus pli longe atendi ?

Kvankam la murmurado de la popolo, je tia distanco, havis por liaj oreloj nenian signifon, lia spirito ĝin aŭdis kiel malfavoran kaj senpaciencajn kriadon. Certe la popolo miris, indignis, tial ke la frapo ankoraŭ ne okazis.

Obeante la hororan neceson, la reĝo ekkaptis per la maldekstra mano la hararon de sia filo, reĵetis malantaŭen la dolĉan kapon, kiu sin allasis. Kaj la sankta tranĉilo proksimiĝis al la fragila kolo.



La kruda armilo tuŝis la tremetantan karnon. La senespera reĝo havis nur unu pluan deziron : malplilongigi la torturon.

Tiam, el la plej densa parto de la kanoj, potenca voĉo vokis :

- Urĥam ! Urĥam !

Urĥam respondis :

- Sinjoro, jen estas mi.

Kaj, dum la reĝo lasis la ŝtonan tranĉilon fali inter la herbojn, la voĉo ordonis :

- Ne metu la manon sur la infanon, kaj faru al li nenian malbonon. Ĉar nun mi ekkonis, ke ci timas kaj ke ci amas cian Sinjoron Bel. Ĉar, por esti agrabla al miaj okuloj, ci ne domaĝis cian unuenaskitan filon, kiun ci pleje amas post la dioj, ciaj sinjoroj.

Stranga rideto malfermis la lipojn de la reĝo. Rideto, en kiu estis iom da frenezo, kaj en kiu estis la malpezigo de lia koro. En tiu rideto estis ankaŭ la intelekta kontenteco de homo, kiu fine vidas realiĝi tion, kion li atendis, kion li estis zorge preparinta.

Granda flamo leviĝis meze de la kanoj, kaj estas tiu flamo, kiu ŝajnis disaŭdigi voĉon.

- Deturnu vin, ĝi komandis. Vidi la vizaĝon de Bel, estas morti.

La patro kaj la filo, ŝancelitaj per la rememoro de iuj vortoj de Hamurabi, estis sin deturmintaj jam antaŭ la dia ordono. Tie for, trans la riverego, la popolo fermis la okulojn ; la genuoj sin fleksis, la fruntoj eniĝis en la polvon. Kaj ĉiuj timis morti.

Urĥam kaj Ilgi sentis grandigantan varmon. Sendube la dio marŝis al ili.

Tamen la voĉo restis je la sama distanco. Ĝi laŭtiĝis, superante la krepitadon de la kanoj. Ĝi denove laŭdis la piecon kaj la obeemon de Urĥam.

- Ĉar ci konsentis doni al mi cian tre amatan filon, jen ci fariĝas por eterne mia tre amata filo.

Poste, miksaĵo el sanktoŝmira kormildeco kaj el akra

aŭtoritato, ĝi sin turnis al la infano :

- Mi cin laŭdas, Ilgi, ne kiel tiun, kiu atingis la celon, sed kiel tiun, kiu estas sur la vojo. Ami sian patron estas la lernado por ami la diojn. Eksciu, ke Bel estis ĉiapatro antaŭ ĉia patro. Bel, patro de ĉia patro kaj de tiuj, kiuj venis antaŭ li, estas ĉia patro antaŭ ĉiuj komencoj. Se ĉi estos inda trinki post la morto el la fonto de renaskiĝo, Bel estos ĉia patro ne unufoje, sed milfoje. Honoru en Bel ĉian veran patron, ĉian patron tra la centoj da jarcentoj.

La flamo daŭrigis sian paroladon. Ĝi eksplikis, ke la dioj volas mildigi la koron de la homoj, kaj la koro de la dioj mildiĝos samtempe kiel la koro de la homoj. Ĝi diris, per voĉo forta kaj krepitanta, kiel la morgaŭaj oferoj similos al la hieraŭaj oferoj, kaj kiel ili diferencos de ili.

La varmo pliiĝis. Flamo kuris sur la asfalta rivereto, kuriero sendita de la granda flamo, kiu estis dio, kaj kiu voris la kan-arbetaron. La malpli granda flamo atingis la mallarĝejon de la rivereto kaj mordis la lignon preparitan por la ceremonio.

- Jen - diris la arda voĉo. Kiel signon de sia bonvolemo, Bel mem ekbruligas la lignon de la ofero. Kaj, ĉar la ligno de la ofero estas ekbruligita, Bel mem sendas la viktimon.

Dum bruo de preterfrotitaj kanoj miksiĝis kun la krepitado, kaj fine la voĉo permesis :

- Vi povas rigardi. Mi malaperis, kaj la viktimo estas tie.

Kaprido kriis, saltante, inter la kruvoj de Urĥam.

La reĝo reprenis la ŝtonan tranĉilon kaj frapis la novan viktimon. Dume la voĉo de la dio - sed fariĝinta malproksima - anoncis :

- Venontan nokton, mia servisto Hamurabi iros al Urĥam mia tre amata filo en la loko plej sekreta en lia palaco. Kaj mia servisto Hamurabi malkovros al Urĥam mia tre amata filo, kion mi postulas kiel dankosignon pri la aferoj, kiujn mi faris por li.

\*

\* \*

Kelkajn horojn poste, la popolo atendis en la granda korto de la palaco, ke oni klarigu al ĝi la okazojn de la mateno.

La granda pastro diris :

- Sinjoro Bel amas uzi la plej malfortajn instrumentojn, kaj li pasigas la plej grandajn verojn tra plej navivaj buŝoj. La grandaj veroj hodiaŭ rivelataj de Sinjoro Bel ricevu kiel interpretanton la buŝon de infano. La infano savita per la korkomparto de Sinjoro Bel diru ne nur la korkomparton de la dioj, sed plie la dolĉajn kaj belegajn verojn proklamitajn de la dio.

Ilgi tremante rakontis la aventuron per hezitaj vortoj. Sed li senhezite ripetis kelkajn vortojn de Sinjoro Bel, kiuj aparte impresis lin : "Mi amas la homojn, kaj mi amas ilin vivajn. Ekde nun, oni ne plu oferu homojn, sed nur la beston, kiu malfermis la uteron. Kaj la unue-naskito de ĉiu virino estu reaĉetita por la prezo de unu kaprido, de unu ŝafido aŭ de du turtoj."

\*  
\* \*

En la sekvanta nokto, Hamurabi venis renkonti Urĥam'on en la plej sekreta loko de lia palaco.

La granda pastro prononcis :

- Kiam aŭdis la infano, Sinjoro Bel diris verojn por infanoj. Nun, kiam aŭskultas viro sola, aŭdu la veron, kiu konvenas al viroj, kaj ekkonu la veron, kiu konvenas al fortaj koroj.

"Parolo de Bel : Ĉu la homo estas supera al bovo aŭ al ŝafo pli ol la dioj estas superaj al la homo ? Ne. La spirito de la homo superas je unu ulno la spiriton de la bovo aŭ de la ŝafo, sed la dioj superas la homon je la tuta distanco, kiu disigas la ĉielon disde la tero. La plej milda el la homoj ne faras al si koron, kiu domaĝus la ŝafon aŭ la bovon. Kial la plej milda el la dioj farus al si koron, kiu domaĝus la homojn ? Kiom longe estos homoj, bovoj kaj ŝafoj estos manĝataj. Kiom longe estos dioj, la homoj devos morti por la gloro de la dioj.

"Parolo de Bel : Mi domaĝis cian filon Ilgi, tial ke li fariĝos granda buĉisto de Sinjoro Bel, kaj li oferos al mi multajn homojn. Tamen, antaŭ ol Ilgi povos pagi

sian reaĉeton, necesas, ke Urĥam pagu reaĉeton kaj oferu al mi multajn homojn. Ĉar mi domaĝis ne nur la vivon de infano ; mi domaĝis cian koron, kiu estus sanginta samtempe kiel la korpo de Ilgi.

"Parolo de Bel : Jen estas la ofero, kiun mi postulas interŝanĝe je Ilgi domaĝita kaj je cia koro domaĝita. Malpiaj homoj konstruas norde, proksime de Eŭfrato, grandan turon, kaj ili nomas ĝin : La Turo de l'Popoloj. Kaj tiuj malpiuloj malŝatas la reĝojn, la pastrojn kaj la diojn. Ke ili glore nomas sian verkon "la Turo de l'Popoloj", tio estas por diri, ke ĝi ne estas turo kaj defendo de la reĝoj, tio estas por diri, ke ĝi ne estas turo kaj zigurato de la pastroj, tio estas por diri, ke ĝi ne estas la turo kaj la templo de la dioj.

"Parolo de Bel : Lasu tiujn malpiajn homojn sin glori kaj labori tiel longe, kiel ili konstruas la turon. Sed, tuj kiam la turo estos finkonstruita, ci marŝos kontraŭ ilin kun ciaz arkistoj, kun ciaz soldatoj armitaj per lancoj, kun ciaz soldatoj armitaj per hakiloj, kun ciaz soldatoj armitaj per glavoj. Ci marŝos kontraŭ ilin kun ĉiom da soldatoj, kiom ci povos mem kunigi kaj kun ĉiom, kiom ci povos ricevi de ciaz fidelaj vasaloj. Ci ekstermos grandan nombron el tiuj malpiuloj. Kiuj ne mortos sub la forto de ciaz batoj, aŭ kiujn fuĝo ne elŝiros el la forto de ciaz manoj, tiujn ci reduktos al sklaveco. Nu, ci konservos aŭ vendos la duonon el tiuj sklavoj kvazaŭ ili estus naskitaj en cia domo ; sed ci donos la alian duonon al la temploj, por ke ili estu servistoj de la dioj, aŭ estu vendotaj profite al la dioj, kvazaŭ ili estus naskitaj en la domo de la dioj. Dank'al ci la turo ne estos plu la Turo de l'Popoloj, sed ĝi estos la konfuzo de l'popoloj, kaj ĝi estos la defendo kaj la gloro de la reĝoj, kaj ĝi estos la zigurato kaj la gloro de la pastroj, kaj ĝi estos la templo kaj la gloro de Bel. Kaj ci nomos ĝin la pordo de Bel, ĉar tra tiu pordo ci penetros ĝis en la koro de Bel.

La reĝo respondis :

- Estos farite, kiel ci ĵus diris, kaj la turo nomiĝos, kiel ci ĵus diris, Babel.

Li etendis solenan manon kaj reparolis :

- Parolo de Ur<sup>h</sup>am : En tiu okazo kiel en ĉiu okazo, mi faros la volon de Sinjoro Bel. En tiu okazo kiel en ĉiu okazo, mi aŭskultos en la paroloj de Hamurabi, la plej sankta kaj plej scioplana el la pastroj, la dezi-  
ron de Sinjoro Bel.

La du viroj sin malproksimigis unu de la alia, kiel du egaluloj, malrapide retroirante. Ili etendis unu al alia manojn leviĝantajn en largaj manikoj, kaj ili prononcis unu al la alia benajn vortojn.

## Ĉapitro IV.

# La Turo de l'Popoloj

La ordonoj de Sinjoro Bel, tiaj, kiaj ilin tradukis Hamurabi, ne malplaĉis al reĝo Urĥam.

Temis pri konkero : la imperio de Urĥam okupis nur la Malaltan Kaldeon, kaj tiu ebenaĵo de Sennaar, sur kiu estis konstruata la Turo de l'Popoloj, neniam estis al ĝi submetita. Temis pri masakro de fremduloj, afero ĉiam agrabla al reĝoj, al dioj kaj al patriotoj. Ĉar la forto de regno, de ĝia reĝo kaj de ĝiaj dioj estas taksata ne en si mem, sed laŭ komparo kun la najbaraj fortoj. Granda regno estas monto, kiun la patriotoj plialtigas por la okuloj, malplialtigante la plej proksimajn suprojn kaj fosante la abismojn, kiuj ĉirkaŭas la tre amatan pintmonton. Temis pri detruo de la malpiuloj, kiuj aŭdacas malŝati la reĝojn kaj la pastrojn. Ilia nepuniteco estus netolerebla skandalo kaj eble rapida kontaĝo. Lasi ilin fari, ĉu ne estus prepari la ruinon de Ilgi ?

Sed kio ĉarmis Urĥam'on super ĉiu alia konsidero, tio estis la ideo pri konkero de la plej belega el la monumentoj.

Urĥam estis granda konstruisto. Nu, jam plurajn jarojn, li suferis la doloron ne plu konstrui krom en siaj revoj.

Li aparte ŝatis la etaĝajn turojn. Neniu ŝajnis al li sufiĉe vasta. La bazoj plej larĝaj restis stretaj laŭ la larĝo kaj elbordiĝo de lia deziro. La suproj plej altaj ŝajnis malaltaj laŭ la impeto kaj vertiĝo de lia deziro.

Jam la unuan jaron de sia reĝado, li ekkonstruis. Estas li, kiu konstruis la ĉirkaŭmuron, la turojn kaj la pordojn de Ur, sia ĉefurbo, kiun la Akadanoj kaj la Sumeranoj nun nomis Kalanna-la-Granda. En Niffer li starigis templon al la diino de l'firmamento kaj templon al

Bilit-Taaŭt, patrino de la dioj. En Sippara kaj en Larsam li starigis, honore al Bel, belegajn sanktejojn, en kiuj la sankta fajro estingiĝis nek tage nek nokte. Sed lia ĉefa gloro estis la templo de Bilit-Taaŭt en Ereŝ. Tiu ĉi lasta konstruo englutis pli ol tridek milionojn da brikoj.

Tiaj laboroj elkonsumis lian trezoron kaj lian popolon. Longatempe Urĥam restis indiferenta al la krioj de doloro kaj laceco. Li ripetadis, kaj la pastroj post li, kaj la submastroj post la pastroj, la proverbon de la submastroj, de la pastroj kaj de la reĝoj : "La homo havas dorson, kaj la homo obeas, kiam lia dorso estas frapata." Okazis ribeloj, kiujn li senkompete subpremis.

Iun tagon tamen lia penso intense sentis liajn kruelaĵojn, flamojn de sufero, kiuj reflektiĝas kaj revenas al la fajrocentro. Li kalkulis, kiome ĉiu repremado malplimultigas la gregon de liaj laboristoj, la nombron de liaj soldatoj, la nombron de tiuj, kiuj pagas impostojn, tritikon, daktilojn, oleon, ŝafinojn kaj bovinojn. Li timiĝis pro la multeco de la homoj mortintaj pro laceco aŭ pro bastonado. Li aŭdis, kun inteligenta kaj oportuna timo, la grandan kriadon, kiu leviĝis de unu al alia ekstremaĵo de lia imperio: la kriadon de la premado kontraŭ la premanton ; la kriadon de turmento kaj amara angoro ; la kriadon, kiu, supreniĝante el ĉiuj teroj, boras la orelojn de la dioj ; la kriadon, kiu, se troviĝus homo aŭdaca kaj ensorcanta por grupigi la malkontentulojn, kompletiĝus per la frakaso de trono.

Jam tri jarojn, li postulis publikajn laborojn plu nur por la tenado en bona stato kaj la plimultigado de la kanaloj. La popoloj ne murmuris kontraŭ tiujn utilajn laborojn. La kanaloj ŝanĝas la sekegajn ebenaĵojn kaj la marĉojn en palmarojn aŭ en grenkampojn. La kanaloj estas la beno de la popoloj, kaj ili faras el la lando, kiujn ili trairas, la loĝejon de feliĉo.

Tamen Urĥam suferis, ĉar li ne plu konstruas, kiel amanto suferas, ĉar li ne plu renkontas la amatinon.

Sola, en la sekreto de sia koro, li ploris : "Jen, sur tabuloj el oro, el arĝento, el antimono, el kupro,

el plumbo, mi ne skribas plu la gloron de mia nomo, kaj mi ne metas plu tiujn tabulojn en la fundamenton de daŭranta monumento. Kaj la ĉeestantoj ne demetas plu la amuletojn de siaj vestoj por ilin ĵeti, kun tiuj tabuloj kaj siaj sigelfiloj, en la fundamenton."

La famoj, kiuj kuris koncerne la Turon de l'Popoloj, venis al li kiel grandaj ventoj kaj blovis sur la flamon de lia deziro. Lia deziro konkeri la turon, surskribi sur ĝi sian nomon, liveri ĝin al siaj pastroj, dediĉi ĝin al sia preferata dio, grandiĝis en la blovo de tiuj rakontoj kiel en incendio. Li kredis sen malfido tion, kion oni raportis. Li ne sciis, ke popola rumoro estas sinsekvo da eĥoj, el kiuj ĉiu multobligas la ricevitan bruon, kaj ke ĝi faras eĉ el ordinaraĵoj strangajn mirindaĵojn. Al ĝia kredemo la bazo de la Turo de l'Popoloj ŝajnis miloble pli larĝa ol tiu de ĉiuj ekzistantaj monumentoj. En la freneziĝo de lia penso, en la blindiĝo de lia ĵaluzo, en la tremo de lia deziro, la unua etaĝo pli altas ol la sep etaĝoj kune de la plej orgojlaj ziguratoj. Se la turo de Sennaar ne estus iam apartenonta al Urĥam, kiom la temploj de li konstruitaj en Ereŝ, en Larsam, en Niffer, en Sippara estus humiligitaj...

Urĥam kelkafoje ridis, pensante, ke la malamikeco kaj la ribelemo de la popoloj laboras por lia gloro. Li diris al Ĥamurabi :

- Ĝis nun la bastono konstruis templojn. Jen la frenezo kaj la malpieco konstruas la plej grandan el ĉiuj temploj.

Ĥamurabi respondis :

- La vojoj de la dioj estas misteraj. La dioj estas lertaj por eligi bonon el malbono, ĉu tiu malbono estas doloro aŭ laceco de la korpo, ĉu ĝi estas malsano de la menso, aŭ eĉ la plej malbona el ĉiuj malsanoj de la menso kaj de la koro, la malpieco.

Aliajn tagojn Urĥam afliktiĝis, tial ke la frenezo, tro kontaga, ne domaĝas lian propran popolon. En la provincoj la "patesis", pastroj, kiuj estis iom pli ol guberniestroj, iom malpli ol sendependaj princoj, plendis, ke tutaj vilaĝoj estas malplenigitaj, kaj ke iliaj loĝantoj aliĝis al la malpiaj konstruantoj. Eĉ en Kalanna la popolo mallalte rakontis, per kiaj ruzoj teksisto Sirtella aŭ orbatisto Gudea sukcesis fuĝi kaj kuniĝi kun iu el la bandoj de



fremduloj, kiuj almonte laŭiris Eŭfraton.

Foje-foje la reĝo, tremetante pro kolero, priparolis, ĉu tuj ekstermi la insultajn masonistojn por mem daŭrigi la konstruadon. Hamurabi kvietigis tiujn malprudentajn malpaciencojn. Li rememorigis, kiajn terurajn ribelojn iam eksplodigis laboroj ege malpli grandaj. Li asertis :

- Frenezo estas pli forta ol forto kaj pli persistema ol persisto. Ci ne ricevus de la popoloj la dekonon de tio, kion, ne sciante por kiu ili laciĝas, ili faras por ci kaj por cia gloro. Obeado estas malrapida laboristo, kaj ĝiaj treniĝantaj piedoj ŝajnas glutitaj al la tero, kaj, tuj kiam ĝi ne vidas plu la bastonon, ĝia langvoro langvoriĝas ĝis ripozo. Kaj ĝiaj movoj ofte donas ŝajnon ansataŭ realojn. Sed frenezo estas arda laboristo ; kion ĝi jam faris estas ligno, kiu nutras la flamon kaj la dezi-ron fari pli. Obeado akuzas la horon, ke ĝi estas longa; la entuziasma frenezo akuzas la taglumon, ke ĝi estas mallonga.

Dume, la popoloj kaj la brikoj amasiĝadis sur la ebenaĵo de Sennaar. La ebenaĵo de Sennaar fariĝis oceano da homoj kaj da muldita argilo. Jam estis konstruita la unua etaĝo, maso sufiĉe larĝa kaj sufiĉe alta, oni pretendis, por humiligi ĉiujn monumentojn antikvajn aŭ freŝdatajn.

La homoj donis plurajn nomojn al la komencita verko. Plejofte oni diris : La Turo de l'Popoloj. Iafoje oni diris : La Turo de la Fratoj. Iafoje : La Turo de Amo. Oni nomis ĝin ankaŭ La Turo de la Lingvoj, tial ke la masonistoj, apartenante al plej diversaj rasoj, aŭdigas sur la ŝtupoj de la unuaj deklivoj ĉiujn idiomojn de la tero. Kaj oni nomis ĝin La Turo de la Lingvo Unika, tial ke sur ĝi formiĝis speco de dialekto sufiĉa por la praktikaj aferoj kaj por la fratecaj deklaroj. Kaj pluraj kredis, ke ĉiuj lingvoj malaperos fronte al tiu komuna lingvaĵo.

La nove venintaj, kiuj ankoraŭ ne lernis la specon de sabiro\* de Sennaar, tamen jam interkomprenis. Ili sin interkomprenis per la rigardo, per la rideto, per la gesto kaj per la bonvolemo.

---

\* sabiro : miksa simpligita ĵargono.

## Ĉapitro V.

# Tel-Loh

Rifat, sidante sur sia ĉaro, admiris la riĉecon de la kaldea kamparo. Li pasis preter vastega kampo, sin demandante, kiaj tigoj, je kvar ĝis kvin ulnoj altaj, dikaj kiel lia pugno, portas tiujn pezajn spikojn preskaŭ unu ulnon longajn. Li plukis spikon, konsideris la dikegon de la grajnoj. Li metis grajnon inter siajn dentojn, premegis guston de mielo kaj faruno. La formo, la gusto, ĉio respondis al lia demando. Sed la dikego de la tigo, de la spiko, de la grajno malhelpis akcepti la respondon. La formo kaj la gusto asertis: "Mi nomigâs tritiko". Sed la tritiko de la Arjoj kantas la vivon per voĉo gracila, kiel de infano. Tiu ĉi estis potenco kiel himno, kiun altigas al la ĉielo tuta ĥoro el viraj voĉoj.

Aliaflanke de lia ĉaro, duoninundita ebenaĵo portis, egalan riĉon, rizon silke luman en vento kaj sunhelo.

Poste la Arjo traveturis multajn stadiojn kovritajn de nekonataj floroj, tiel parfumaj, ke ili plipezigis preskaŭ ĝis dormo la kapon de la pasanto, tiel dense kreskantaj, ke la kruroj de la ĉevaloj kaj la radoj de la ĉaroj bunte farbiĝis de flavo, de ruĝo kaj de bluo.

Sed al la kamparo brutale riĉa kaj parfumita mankis la diversa ĝojo de grandaj arboj proponantaj al la soifo la dolĉon de la fruktoj kaj al la laceco la freŝan malvarmeton de la ombro. La sennombraj hirtaj arbustoj portis rigide siajn branĉojn, siajn dornojn, siajn sekajn foliojn, kaj, fortan kaj malgracian kiel ebrio, kaoson da malbele fiksitaj floroj. Kiam la rigardo suprenleviĝis, al ĝi estis rifuzata la ĉarma lulado de folioj larĝaj kaj supraj kiel skarpoj en vento aŭ fajnaj kaj lantaj kiel movata plumaro; ĝi renkontis nur la sonoranan rigidecon de la palmoj. Sur skvamaj trunkoj pensigantaj pri drakoj, la pezaj foliaroj pintis kiel glavoj; la

brizoj, ne povante movi ilin por la vunditaj okuloj, faris bruojn de frotadoj, de kliketadoj kaj de skermadoj.

Foje-foje la ebenaĵo fariĝis dum horoj marĉo. Verdaĉa akvo alternis kun la malbrila verdo de dikegaj tufoj da junkoj, el kiuj elflugis sovaĝa aro da anseroj kaj anasoj. Glitante sur malpezaj kaj silentaj platboatoj, ĉasistoj armitaj per bumerangoj frapis la birdojn en la momento de la ekflugo aŭ en alto. Granda kato dresita kiel hundo reportis la ĉasaĵon.

Aliajn tagojn, necesis ĉirkaŭiri oceanon da kanoj. Starante sur sia ĉaro, Rifat rigardis. Ĝis la horizonto, la peza muaro fleksiĝis kaj releviĝis kun bruo profunda, revema kaj monotona, simila al la kantiko de la ondoj.

Ĉi kaj tie naftoputoj malfermis siajn nigrajn faŭk-ojn. Kiel hirtaj haroj ĉirkaŭ sordida nazego, kreskis sur iliaj bordoj miksamaso da dornoj. La marĉoj, en kiuj oni riskas enprofundiĝon, la kanoj, inter kiuj rampas serpentoj, la malhelaj putoj, la skrapemaj arbustoj, ĉio ofte impresis kiel subkaŝita malamikeco. Gvatis danĝeroj multaj kaj disaj. Oni kredis aŭdi surdan rikanadon, de ĉie leviĝantan.

Sen la amikeca vivo kaj la frateca akcepto de la loĝantoj, ankaŭ la domoj aspektus kiel malhelaj misteroj. Mallarĝa kaj alta fendo, la perdo kaŝis en angulo stretan kvarangulon, iafoje kun supra arko. Neniu alia aperturo en tiu unuokula fasado. La tri aliaj muroj estis blindaj plenaĵoj. La terasformaj tegmentoj estis kapvestitaj per duonkupolo aŭ per konuso, kiu aspektas kiel la plej ordinara formo de militistaj kaskoj. En la sunlumo, la peza konstruaĵo el flavaj brikoj prezentis formon de rabobesto dormanta aŭ atendanta predon. Sed, sur la lokoj de la teraso, sur kiu la kupolo rampigas bonfaran ombron, estis milda kaj familiara vigleco.

La virinoj sur la tegmentoj interŝanĝis kun la najbarinoj parolojn kaj ridojn. Oni vidis ilin vigle diligentajn pri la kuirado de la manĝaĵoj, lavantaj kaj etendantajn siajn tukaĵojn. Aŭ ili faris sian panon. Kliniĝinte, ili tenis per la mano specon de pistilo,

kiun ili de tempo al tempo akvumis, kaj per kiu ili premis la grenon sur ovala kaj konkava ŝtono. Poste ili knedis la farunon en la sama longforma mortero, metis en ĝin, kiel fermentilon, peceton da pasto konservita de la hieraŭo. Ili formis rondajn platbakaĵojn unu colon dikajn, kies diametro egalas tri colojn. Ili sternis ilin sur platajn ŝtonojn kaj kovris ilin per brulvarmaj cindroj.

Ĉar ligno estis rara, oni bruligis, por diversaj laboroj, ĉefe briketojn el sekigita bitumo kaj briketojn el sekigita bovfekaĵo. Densa fumo penis supreniĝi kiel malĝoja vundita birdo, poste ŝvebis kaj refalis.

Fininte la durajn dommastrumajn taskojn, la virinoj kuŝiĝis sur kusenoj. Ili revis, sub pezo de feliĉa laceco. Aŭ ili senhaste kudris kaj brodis, kun, en la lip-anguloj, la afabla rideto de ripozo.

Ĉar, jam de post lunmonatoj, nenombreblaj grupoj preterpasadis, ĉiam samdirekte, la scivolemo de la Kaldeanoj estis malakriĝinta. Ilia simpatio daŭre sekvadis la estontajn masonistojn de la Turo de l'Popoloj. Ili flirtigis skarpojn, ili kriis bonaŭgurajn vortojn ; ili eĉ aŭdacis turni al la fremduloj fingrojn, kiuj ĵus tuŝis la lipojn. Ofte ili malsupreniris, alportante manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. La plimultaj nenion akceptis interŝanĝe. Kelkaj petis, por fari al si amuleton, sep harojn de ĉevalo, mirinda besto ankoraŭ nekonata en Kaldeo.

Vespere oni kuŝis en la ĉaroj, kiam la grundo estis humida. Se la tero estis seka, iafoje oni starigis la tendojn, pli ofte oni pigre sin sternis sub la belego de la lazuro. La loĝantoj de najbaraj vilaĝoj invitis plurajn nomadojn gustumi ĉe ili nutraĵon kaj dormon. En libera aero, sur la vasta interna korto, fajrujo subportis larĝan kuirpoton, en kiu bolis dika peco da viando. Felsakoj da vino kaj ĵaroj da akvo pendis por malvarmiĝi sub la traboj de la interna portiko. La vespermanĝo estis ĝoja kaj frateca sub la steloj. La kapo iom levita apogiĝis sur la konkavaĵo de kurba tabureto. Tamen, kiam la domo ne estis tre malriĉa, ĝi enhavis lignan liton, kiu, portata sur kvar leonpiedoj, subtenis matracon kaj du kovrilojn. Sed Niroŝ-Salman, Sinjoro de la misteroj, dio, kiu boras la himenon, estus incitita, se aliaj ol la edzo kaj la edzino unuigitaj laŭ la ritoj sin metus sur ĝin.

Kio en la kaldeaj domoj plej impresis la fremdulon, tio estis la nombro da statuetoj eksponitaj en maniero tre videbla, kaj, oni konjektis, agresa. En la apartamentoj, en la korto, sur la teraso, oni ne povis fari unupaŝon sen renkonti kelkajn skulptitajn aŭ modlitajn figurojn. La plimultaj estis hororaj. Ili strange kunigis la formojn de la homo plej malbela kun la membroj de bestoj plej hide dikegaj. Ili estis bildoj de timindaj demonoj. Tiuj misfarantoj estas tiel malbelegaj, ke la plej bona defendo kontraŭ ili estas oponi al ili ilian propran prezentaĵon. Ili sin mem timigas ; ili hirtiĝas kaj retroiras kontraŭ la insulta renkonto, kiel, kontraŭ spegulo, hirtiĝas kaj retroiras maljuna virino.

Ĉiu domo havis super sia pordo bildon de la sud-okcidenta vento. Tiu timeginda genio blovas braĝe varman spiron : ĝi konsumas la grenrikoltojn, ĝi sekigas per febro la homojn kaj la bestojn. Oni ĝin renkontis en ĉiuj grandoj kaj el ĉiuj materioj : el bronzo, el flava ŝtono, el ruĝa jaspo, el bakita argilo. Sur aglaj kruroj ĝi starigas korpon de malgrasega hundo. Ĉe la ekstremaĵo de maldikaj homaj brakoj ĝi returnas kaj streĉas ungegojn de leono. Vosto de skorpio armas ĝian postajojn. El ĝia dorso eliĝas du paroj da membranaj flugiloj, unu minacas la altaĵojn, la alia minacas la teron. La kapo estas tiu de homo, kies karnon duonronĝis la morto. El ĝi preskaŭ elstaras du dikaj rondaj okuloj ; plata nazo profundigas inter elstaraj ostoj. La lipoj malfermitaj montras kruelajn dentojn. Du kapraj kornoj, kun radiko inter la okuloj, serpentas sur la kalva kranio.

La loĝantoj informis siajn gastojn, por ilin trankviligi, ke la plej timigaj bildoj estas enterigitaj sub la sojlo, barante al la malbonaj spiritoj la subteran trapason.

Ĉu enterigitaj, ĉu lokitaj laŭlonge de la muroj, potencaj gravuritaj forpelaj kantoj pliiĝis la efikon de la statuetoj. Ofte oni ripetis per laŭta voĉo tiujn forpelajn kantojn.

Antaŭ ol eniri oni diris :

- La pesto, la febro, kiuj forprenus min aŭ forpre-

nus miajn parencojn; la malsano, la konsumiĝo, kiuj de-  
zertigus mian landon, malutilaj al la karno, detruaj por  
la korpo; la malica inkubo, la malica sukubo, la malica  
demono, la malica koboldo, la malica homo, la malica oku-  
lo, la malica buŝo: ili estu forpelitaj for de la homo,  
ido de sia dio, elpelitaj el mia korpo, elpelitaj el miaj  
internaĵoj. Ili neniam venu kontraŭ mian korpon, neniam  
vundu mian okulon, neniam venu malantaŭ mian dorson. Ili  
neniam eniru en mian domon, neniam trairu la pardonon de  
mia loĝejo, neniam malsupreniru inter la murojn, inter  
kiuj mi loĝas, neniam supreniru inter la murojn, kie mi  
vivas. Duoblaĵo de la Ĉielo, forigu ilin, duoblaĵo de la  
tero, forigu ilin.

La morgaŭan matenon oni reekiris pli multope. Ĉiam  
kelkaj Kaldeanoj aliĝis al la multo de la vojaĝantoj.

Anstataŭ rigardi naturon novan por siaj okuloj, Rifat  
ofte miriĝis pri la homoj lin ĉirkaŭantaj. Tiu moviĝanta  
oceano lin dronigis en admiro. Obstine, kiel nescianto,  
kiu ne imagas la potencon de kalkulo, li reprenadis pli  
peze la formulon, kiu ridigis la pastrojn de Kalanna:

- Sesdekoble sesdekoble...

Lia voĉo, nelacigebla kiel la ripetoj de sonĝo, daŭr-  
igis senfine:

- Sesdekoble sesdekoble sesdekoble...

Poste, kun gesto de malŝato pri la nombroj kaj ilia  
malforteco, li konkludis:

- Pli nekalkuleblaj ol la steloj en la ĉielo.

Li ridis je la rememoro pri tiu Hamurabi, kiu preten-  
dis esti nombrinta, de sur sia zigurato, la legiojn de la  
ĉiela armeo.

- Ĉiuj mensogoj - li diris kun ŝultrolevo - eliras el  
tiu marĉo, la buŝo de pastro.

Ankoraŭ pli ol la multeco de la homoj, ilia diverseco  
klinis lin sub premezo de maltrankvilo kaj ĝojo. Versajne  
por esti riĉaj je diferencaj virtoj, tiuj fratoj zorgis  
ne simili inter si. Tiel la grenoj kaj la fruktoj ĝojigas  
per la diverseco de siaj gustoj, kaj la floroj havas ko-  
lorojn pli nuancajn ol la ĉielarko.

Liaj rigardoj ripozis kun senmiksa ĝojo sur la beleco de la Arjoj, grandaj, sveltaj, kun regulaj kaj noblaj trajtoj, kun okuloj reflektantaj la profundan koloron de la ĉielo, kun haroj blondaj kiel saliko en la finiĝanta sezono, aŭ nigraj kun bluaj nuancoj kiel la vestaĵo de iuj birdoj. Sed li admiris, almenaŭ ĉe la viroj, la forton de la Sumeranoj, kun kurta nazo, grandaj kruelaj okuloj, nigraj, opakaj, kvazaŭ pezaj, longaj vizaĝoj, fortikaj korpoj, membroj kun muskoloj tiel elstaraj kaj dikaj kiel tiuj de leonoj. Lin ĉarmis la Akadanoj, pli sveltaj, gracilaj, sed kies larĝa frunto ŝajnis farita por porti la tutan sciencon, kaj kies rigardoj estis penetrantaj, lumo kaj rideto.

La negroj lin ĉarmis per sia gajeco, sia daŭrema infaneco, kaj, inter la kuspita malhelo de la ridantaj lipoj, la ĝoje blanka brilo de la dentoj. Tro ofte la maljunuloj kaj la maturuloj portis antaŭ si ventron ŝvelan kiel sako el malhela ledo. Sed ĉarma estis la svelteco de la junuloj, statuoj el ebono aŭ bronzo. Inter la frakasbruo de cimbaloj kaj tamburinoj, tiuj statuoj dancis dancojn jen harmoniajn, jen, por eksciti la ridon, propravole misritmajn, kvazaŭ tiklajn.

La Elamanoj, venintaj de la marbordo, similis al ili per la laneca hararo, la plata nazo, la lipoj dikaj kaj kuspitaj, la barbo mallonga, maldensa kaj krispa. Sed ilia delikata haŭto estis blanka, kaj ilia paŝado restis grava ritmo.

Kiom da aliaj popoloj, kies nomojn li eĉ ne sciis, kies karakterojn li ne povis analizi, igis lin ekkrii:

- Ho mirinda frateca riĉo !

Estis sveltaj talioj kaj puraj linioj ; gigantaj kaj senformaj korpoj ; malgrandaj homoj, fortikaj kaj viglaj ; fragilaj nanoj, belformaj kaj emociaj kiel infanoj, aŭ de ridindaj proporcioj, kruroj de vertago sub cilindra busto, kiu, sen kolo, ŝajnis porti senpere la pezan kapon. La detalo de belo kaj malbelo variis kiel plej bribunta spektaklo. La haŭtoj prezentis ĉiujn kolorojn, de la brunruĝo kaj la gagatnigro ĝis la blanko plej malbrila aŭ plej delikate diafana kaj rozeta. Oni retrovis en ili la nuancojn de fumo, de bronzo, de olivo, de kupro, de alabastro. La haroj

havis la koloron de pajlo, tiun de eburo, tiun de mielo, tiun de tro bakita briko, tiun de tro kruda briko, aŭ la nuancojn de daktilo en ĝiaj diversaj gradoj de maturiĝo; aŭ ankaŭ ili estis nigraj kiel flugilo de korvo. Unuj falis longaj kaj rektaj, aliaj frize flugis, aliaj estis tiel krispaj kiel lano de ŝafoj. Ili estis krudaj kaj maldensaj kiel stoploj, sur kiuj pasis la sud-okcidenta vento, aŭ fajnaj, densaj, supraj, kiel, en facila brizo, la foliaro de tamariko.

Vane estus provi diri la trajtojn kurtajn aŭ longajn, platajn aŭ forte elstarajn, fajnajn aŭ krudajn, pli brutalajn ol nazegoj, pli hidajn ol inkubsonĝoj de maljuna publikulino, pli purajn ol revoj de infano. Sed precipe la okuloj kaj la rigardoj donis ideon pri infinito : grandeco kaj eteco, multspecaj arkitekturoj, elstareco aŭ enprofundeco, kaj tiom da kareso, da ridemo, da fiereco, da ruzo, da perfortemo, kaj tiom da gradoj de lumo, aŭ iafoje tiom da ombro kaj da mistero, aŭ tiom da afa- bla naiveco, aŭ tiom da plata stulteco.

Ĉu la kutimoj estis pli malsamaj, aŭ la tipoj ?

La Kaldeanoj trenportis la pezon de tri surmetitaj vestaĵoj : blanka jako, kiun preterpasis tuniko el bunta lanaĵo ; sube, alia tuniko el lino, kiu falis ĝis la piedoj. Nu, la lana robo estis plipezigita ne nur de brodaĵoj, sed la malsupro estis garnita per franĝoj, kvastoj, amuletoj el ŝtono aŭ metalo. La longa hararo subtenis mitron. La Egiptoj sin kovris per simpla blanka zontuko, sed ilia razita kapo ŝvitis sub frizeta peruko. Rufaj barbaroj portis sur sia larĝa korpo felojn de sovaĝaj bestoj, kaj oni ne sciis, kiuj haroj brilis pli rufe, ĉu iliaj ĉu tiuj de ilia vestaĵo. Jen iuj, tute kovritaj per pezaj peltaĵoj. Aliaj neglekteme nodis malpezan antaŭtukon antaŭ sia subventro. Venintaj de Tĭlos kaj de Akkad, insuloj en la Eritrea maro, la prapatroj de la estontaj Fenicianoj marŝis kun nuda busto, sed bunta zontuko estis ligita ĉirkaŭ ilia talio per longa zono, kies ekstremaĵoj pendis. Certaj montaranoj estis ingigitaj en longa robo ruĝa kaj blua, kiu formis pelerinon sur la ŝultroj.

Egala estis la fantazio en la materio de la vestoj, en iliaj formoj kaj koloroj : la lino najbaris kun la bisino, kun la farbitaj toloj kaj la tinkturitaj lanoj ;



Ĉi tie ellaboritaj ŝtofoj, riĉaj peltoj ; tie zonvestoj el ŝelaĵoj, plektitaj junkoj, teksaĵoj el folioj, plumoj blankaj, blujaj aŭ arde ruĝaj. Sur iuj ĉio libere flirtis. Iuj roboj pro sia mallarĝo ĝenis la marŝadon. Iuj sovaĝuloj iris nudaj, sed idoloj kaj amuletoj kliketis inter la haroj de ilia brusto. Aŭ tatuajoj faris kvazaŭan striktan veston, en kies bunto glitis strangaj serpentoj, elvolviĝis floroj kaj steloj kaj flugis, al la malpezo de gazeloj kaj birdoj, al la pezo de rinoceroj kaj elefantoj, la pinta glito de sagoj kaj ĵetlancoj.

Ĉu malpli varia estis la aranĝo de la hararoj ? Ĉi tie bukloj flirtis ĝis la zono, kaj la frunton ornamis kvar frizaĵoj. Tie la haroj amasiĝis en moviĝantaj grapoloj dekstre de la kapo, maldekstre de la kapo kaj sur la nuko, sed sur la frunto ili estis tenataj per bendeto. Aliaj estis plektitaj en sennombraj plektaĵetoj, el kiuj ĉiu finiĝis per terbuleto. Kaj mallarĝaj ĉapetoj parte kaŝis zorge razitajn kraniojn.

Multaj homoj marŝis nudpiede. Aliaj sin ŝirmis per botetoj altaj ĝis la suro. La plimultaj portis platajn plandumojn sen kalkanumo, diversmaniere tenatajn per longaj aŭ mallongaj rimenoj. Kaj la piedvestoj estis el ŝtofo, el ligno, el ledo, el ŝnuro.

Oni vojiris piede ; oni estis portataj per ĉaroj de mirigaj formoj, el nekonataj lignoj. Pluraj surrajdis azenojn grandajn kaj kokete viglajn kiel ĉevalojn. Pluraj, kun busto drapirata en mantelo el blanka lano, nerve premis inter nudaj kruroj ĉevalojn malgrandajn kiel azenidoj, viglajn kiel infanetoj, rapidajn kiel ventoj. La neniam stumblantaj muloj puŝegis grandegajn jungitajn hundojn, kies kruroj multobligis paŝetojn. Kamelo portis inter siaj ĝiboj, sur siaj ĝiboj, sur sia kolo, tutan familion kun ĝia tendo kaj ĝiaj riĉaĵoj. Sed pluraj familioj sin premis sur la etaĝoj de turo starigita sur la larĝa dorso de elefanto.

La plimultaj, jam antaŭ longa tempo; forĵetis siajn armilojn, neutilan ŝarĝon. Kelkaj konservis ilin pro svaga malfido aŭ pro ligiteco al rememoroj. Estis bastonoj finiĝantaj per bulo el bitumo, kurbaĵoj, tre rektaj tranĉilegoj, mallongaj glavoj, bumerangoj,

lancoj, sagoj, arkoj, ŝtonaj hakiloj.

Iun vesperon, kiam oni sin preparis por tendumi ĉe rando de vilaĝo, maljuna Kaldeano venis al Rifat kaj diris :

- Mi volas fariĝi unu el la masonistoj, kiuj konstruas la Turon de l'Popoloj. Hodiaŭ ankoraŭ mi estas gastejestro. Por mi kaj por ĉiuj, morgaŭ mi amasigos sur cian ĉaron kaj sur mian ĉaron la vinojn kaj la nutraĵojn, kiuj restos al mi. Venu tamen ĉe min kun ciaj plej karaj kompanoj, por ke ni trinku ĉi-vespere kaj por ke ni trinku ĉi-nokte.

Do Rifat venis al la gastejo kun pluraj el siaj amikoj. Je la unua vido la domo ne diferencis de la aliaj domoj. Alta kaj mallarĝa, kaŝita en angulo de la fasado, la pordo laŭkutime malfermiĝis al longa koridoro. Sed la koridoro kondukis senpere al granda rektangula korto. En la centro, puto ombrata de sikomoro. Sur la ĉirkaŭo, etaĝoj da ĉambretoj, en kiuj parto el la gastoj vespere retiriĝis. La teretaĝo estis dividita je malmulte da grandaj ĉambroj, el kiuj la plimultaj servis kiel rezervejoj aŭ keloj, sed kelkaj estis staloj. Tamen, ligitaj al ringoj el bronzo, multaj azenoj kaj dromedaroj kuŝis sur la korto.

Multaj estis ankaŭ la homoj, ĉu klientoj ĉu invititoj. Kuŝantaj aŭ sidantaj sur matoj, ili trinkis. La servistinoj kuris de unu al alia, ilin ekscitante :

- Trinku - ili diris, - drinku ĝis ebrío. Faru al ci feliĉan vesperon. Aŭskultu la ĝojajn konversaciojn de ciaj najbaroj, kaj ne ĉesu amuziĝi.

Ili insistis :

- Forigu de cia vizaĝo tiun malŝatan paŭton. Kiam ciaj lipoj plilongiĝas kaj rondiĝas, cia buŝo ne plibeligiĝas. Ekdecidu. Mi ne lasos cin antaŭ ol ci estos trinkinta.

Ili laŭdis la diversajn trinkaĵojn :

- Ci povas elekti. Jen estas granatvino ; jen estas lotusvino. Ĉu ci deziras daktilvinon ? ĝi estas enlanda kiel ci. Ĉu ci preferas tiun ĉi vitvinon ? ĝi venas de malproksime ; la vojaĝoj formis ĝin ; la aĝo donis

al ĝi forton kaj dolĉon. Ĉu ci preferas palmobrandon? ĝi pli rapide ebrigas. Ni havas ankaŭ plurajn likvor-ojn, kiuj parfumas la buŝon kiel amornokto. Sed ne, ci tro soifas : unue biero necesas al ci. Kia ? Ci estas en bona domo, en kiu oni trovas ĉiujn specojn : biero dolĉa, ĝuste ĉi-matene farita ; biero amara, igita neputrebla per mikso de lupolo, biero de feŝo, ŝaŭma biero, biero malvarme aromigita, biero parfum-ita per bolantaj spicoj.

Ili laŭdis la hordean kaĉon kaj la giston faritan el fermentita panmolo.

Iuj drinkantoj ridante replikis :

- Dek ok pokalojn, per cia bela mano, servistino kun belaj manoj, domu al mi dek ok pokalojn da vino. Mi volas drinki ĝis mi falos. La mato, sur kiu mi ku-ŝos, estos bona lito por fordigesti mian ebrion. Mi sonĝos tie pri kisoj, kaj se ci venos ilin doni al mi, miaj okuloj, kvankam fermitaj, tamen vidos cian belon kaj cian rideton.

Aliaj diskutis inter si, kun seriozo de ebruloj, pri la efikoj de drinkaĵoj :

- Nur vinon mi trinkas plu : ĝi gajigas, ĝi inkli-nas al bonvolemo kaj tenereco. Sed biero pezigas, bestigas, glitigas al brutala kolero.

- Mi, mi preferas bieron. Ebria de vino, mi falas sur la vizagon kaj kontuziĝas. Sed la biero milde ren-versas min sur la dorson kaj mi dormas.

Rifat malŝatis nek la freŝon de la biero nek la kvazaŭ lirikan forton de la vino. Li trinkis por sia plezuro, ankaŭ por komplezi la bonvoleman gastiganton. Sed, malamiko de la ekscesoj, li diris :

- Unu pokalo estas bona al la korpo kaj al la animo. Tro da pokaloj, ho plej regalema el la gastigantoj, rompas la krurojn kaj dispecigas la animon. Haltu ni, antaŭ ol ni fariĝus similaĵoj al remiloj forŝiritaj el sia loko kaj ne plu obeantaj ĉe iu ajn flanko. Kiu tro drinkas estas ankaŭ tia kia senpana domo, kies mu-ro kaj pordo ŝanceliĝas.

Li aldonis ridante :

- Aŭ pliĝuste, ebria homo aspektas al mi kiel templo, en kiun pastroj eniris kantante. Kaj la brua ĉeesto de la pastroj forpelis la dion.

Tamen li lasis sin treni, certe ne ĝis la stulta ebrio, sed ĝis la ĝoja kaj longa nervomalstreĉo. Li pasigis la nokton preskaŭ sendorme, inter revoj kaj revaĵoj, jen ridetaĵ, jen maltrankvilaj. Tel-Loh, la svelta novedzino, kiu en Kalanna emociis lian junecon, aperis al li en duondormo. Li volis kapti ŝin ; li vekigis, elrevigite, aŭ ŝi fuĝis, songo, inter la implikiĝo kaj la flirtanta renoviĝo de la songoj.

Matene, sur sia ĉaro, li trairis unu el tiuj herbejoj. en kiuj la densaj floroj koloris la piedojn de la ĉevaloj, la radojn de la veturiloj, la krurojn de la piedirantoj, kie la odoroj ebriligis tiom kiom la vino. Sur la duonebrion de la nokto, ankoraŭ ne tute disvaporigintan, la parfumoj ĵetis ian pezan kaj feliĉan ŝanceliĝon ; ĉion ŝajnis kovri vualo, blua, apenaŭ flirtanta, sursarĝita de gemoj. Rifat, kun duonfermitaj palpebroj, ja vidis tra momentoj, ĉielkoloran vualon ornamitan ĉu de gemoj, li ne sciis, ĉu de floroj. Ĉio ĉi alproksimiĝis, glitante ĉirkaŭ korpo de virino ; kaj la duonvidata korpo estis la korpo de Tel-Loh.

Li kredis esti tute endormiĝinta, ĉar dolĉa nekonata voĉo vokis :

- Rifat !

La voko, renoviĝante, igis lin malfermi la okulojn kaj la lipojn. Ankoraŭ necerta, li balbutis la nomon de sia revo :

- Tel-Loh ?

- Ha! - ŝi ĝoje diris, - mi ja sciis, ke ci rekonos min.

Ŝi aldonis :

- La edzo, kiu min aĉetis, estas al mi abomena.

- Kial li estas al ci abomena ?

Jenaj vortoj eskapis de ŝi :

- Li ne similas al ci.

Sed ŝi ekruĝiĝis, kaj kun parolfluego, kvazaŭ rapida

amasigo de vortoj povus kaŝi la vorton :

- Li estas fama en la urbo pro sia malico kaj sia krudeco. Li havas jam du edzinojn, kies larmojn mi ofte sekigis en la vento de bonaj paroloj.

Ŝi skuis la kapon :

- Ne eblas ami tiun viron... Ci ne scias, ci fremdulo, ke ĉi tiu monato estas nomata en la ceremonioj la sabatmonato, sed en ordinara lingvaĵo estas nomata la lunmonato de mezurado. Sub tiu luno oni mezuras la kampojn. Sub tiu luno oni celebras la geedziĝojn. Nu, dum li kondukis min al sia domo, la viro, kiu aĉetis min, proksimigis la du aferojn en ia simbolo malbele rida. Mi estus mortinta prefere ol aparteni al li.

Li diris, iom elrevigite :

- Tiel, ci fuĝis. Mi, naiva, kredis, ke ci kuris al mi... Sendube ci estas kapabla por malamo, ne por amo.

La rigardo de Tel-Loh ŝajnis flirti sur Rifat. Ŝi havis la rideton de virino, kiu preparas koketaĵon. Poste ŝi havis tiun malŝatan geston, kiu repuŝas iajn pensojn. Kaj ŝi diris, kuraĝe sincera :

- Se la viro, kiun mi ne amas, estus min posedinta, mi estus mortinta en Kalanna. Se la viro, kiun mi amas, ne amas min, mi mortos tie ĉi.

- Mi amas cin, kaj ci estos mia edzino.

La koketa rideto revenis sur la lipojn de Tel-Loh.

- Ĉu mi estos, ŝi demandis, la unua inter ciaj edzinoj ?

- La viroj el mia raso havas nur unu edzinon, kaj ili estas al ŝi fidelaj.

La okuloj de Tel-Loh grandiĝis pro miro, sed ŝia rideto estis radianta astro. Kaj ŝi almetis manon al sia koro por subteni subitan pezon de feliĉo.

\*  
\* \*  
\*

En la ĉaro, Rifat kaj Tel-Loh parolis. Aŭ ili kontem-  
plis unu la alian. Eĉ iliaj ridetoj ŝajnis reciproke sin  
rigardi. Iliaj ridetoj : jen du floroj elvolviĝintaj en  
la ĝardeno de l'silento, jen du floroj balancataj en la  
vento de la parolo.

Foje Tel-Loh diris :

- Parolu !

Foje Rifat sin tenis por ne petegi :

- Silentu !

La eta buŝo kaj la dikaj lipoj estis pli ĉarmaj en la  
floranta rideto de la silento. La parolo, peno kaj maller-  
to, deformis ilin. Kaj la tro malgranda buŝo ne sciis la  
delikatajn nuancojn de la Arjalanda parolo. Sed la silento  
de Tel-Loh havis oni-ne-scias kian riĉan kaj suplan vivon.

Kvankam la lingvo, kiun ŝi parolis, estis de li malbone  
konata, Rifat divenis ĝin malriĉa kaj mallerta. Eĉ poste,  
kiam li ĉion komprenos, li antaŭsentis, ke la voĉo de Tel-  
Loh neniom partoprenos en lia admiro. Ĉu ĝi ne ĉiam iom  
ĝenos lian admiron ?

Sed la manoj kaj la piedoj de Tel-Loh estis pli belaj  
ol la piedoj kaj la manoj de la Arjinoj. Rifat ne satiĝis  
per la esprimriĉa gracio de la gestoj. Vere, tiuj manoj  
kaj eĉ tiuj nudaj piedoj, malpeze dancantaj, estis pli  
elokventaj ol tiu buŝo. Ofte, kiam ŝi ne parolis, Rifat  
aŭdis ŝin ; iafoje, kiam ŝi parolis, Rifat ne plu aŭdis  
ŝin.

Ĉiu el ŝiaj teniĝoj, precipe tiuj, kiujn akompanis  
muziko de silento, sonigis himnon en la ĉarmita spirito  
de Rifat.

- Parolu, diris Tel-Loh.

- Ho Tel-Loh, korpo elokventa kiel voĉo ĝuste kantan-  
ta, manoj elokventaj kiel bone regulata duo, piedoj elok-  
ventaj kiel danco sur floranta herbo, ho Tel-Loh, ci as-  
pektas kune stranga kaj familiara al miaj okuloj :  
stranga kiel tiu, je kiu saman oni neniam renkontis sub  
la helo de la ĉielo ; familiara kiel tiu, kiun oni jam  
duonvidis en la lumo kaj la forfuĝo de ĉiuj revoj. Ho  
Tel-Loh, ci diferencas de la virinoj el mia raso, sufiĉe

por ke, je cia vido, estu unue frapo kaj ekmiro. Sed ci estas sufiĉe majbara al miaj fratinoj, por ke la frapo finiĝu en rideto ; kaj la ekmiro de ci kaŭzita riveliĝas, malpli kaj malpli skuata, la tigo sur kiu floras amo.

"Sed, ho Tel-Loh, ci ne similas la aliajn virinojn de Kaldeo. En cia longa gracio nenio memorigas pri la masiva pezo de tiu, kiu diras : "Mi estas filino de Akad". Nenio, en cia supla, kvazaŭ fluida, gracio, memorigas pri la senforma pezeco kaj la amaso da karnoj de tiu, kiu diras : "Mi estas filino de Sumer".

"Ho Tel-Loh, unika Tel-Loh, ĉu vere ci estas el tiu ĉi lando ?"

Nu, dum la manoj de Tel-Loh, kaj ŝia korpo kaj ŝia rideto parolis pli bone ol ŝiaj vortoj, Tel-Loh respondis. Ŝiaj paroloj estis embarasitaj kaj malklaraj, arbaro en kiu la arboj sin interfrotegas kiel batalantoj, en kiu la lianoj sin intermiksas kiel ĉenoj kaj nodoj. Sed la teniĝo, la gestoj, la rigardoj estis lumoj, kiuj heligas la arbaron kaj indikas la vojetojn.

Ŝi diris :

- Mi ne scias... Atendu... Mi memoras... Unue, en Kaldeo estas multe da rasoj. En Kaldeo estas ne nur Sumeranoj kaj Akadanoj. Kaldeo estas fundo, en kiun la rasoj verŝiĝas kiel riveregoj en maron... Kaldeo estas maro el homoj, kaj el popoloj, kaj el rasoj. Kiuj estas kompetentaj pri tiuj aferoj, tiuj diras, ke en Kaldeo estas okdek diversaj rasoj. Mi ne parolas pri la homoj, kiuj pasas kaj tendumas, sed nur pri la homoj, kiuj konstruis domojn sur tiu ĉi tero, kaj kiuj enradikiĝis en tiu ĉi tero... Atendu. Mi memoras. Jes, kiam mi estis tre eta knabino, jes, mi memoras, aŭ eble mi kredas memori... Ĉu la patrino de mia patrino ne rakontis al mi, ke la patro de ŝia patro estis veninta de trans la dezerto, de la lando de Misraim ?

La paroloj havis por Rifat apartan plenecon. La hezitanta rivereto de la vortoj estis por Rifat belega kaj rekta riverego. Emociite kiel de ĥoro el certaj voĉoj, li rigardis la esprimriĉan gracion de la gestoj, de la ridetoj, de la rigardoj.

Li ripetis :

- De trans la dezerto ?

Lia voĉo ŝajnis venanta el la profundo de revo.

- Ĉu do estas ankoraŭ landoj kaj homoj trans la dezerto ?

La parolo de Tel-Loh kaj ŝia teniĝo, kaj la gestoj de ŝiaj manoj, kaj la skuiĝo de ŝia kapo lumigata per la rideto de la lipoj kaj la brilo de la okuloj, asertis :

- Estas ĉiam ankoraŭ landoj kaj homoj.

- Ĉiam ?...

- Estas da ili trans la riveregoj, trans la dezertoj, trans la maroj.

- Se mi marŝus sufiĉe longe, mi trovas la ekstremaĵojn de la tero.

La gesto de la manoj de Tel-Loh, kaj la duondanco de ŝiaj piedoj, kaj la movo de ŝia kapo kaj de ŝia tuta korpo diris "ne" en ekstaĵa radiado.

Kaj la voĉo prononcis :

- Ne estas ekstremaĵo de la tero.

- Ĉia parolo min mirigas tiom, kiom cia belo.

- Se ci marŝus sufiĉe longe kaj povus venki ĉiujn obstaklojn, ĉu ciaj paŝoj cin direktus al Oriento, ĉu al Okcidento, ĉu al la Ursino, ĉu al la Sudo, ĉu al kiu ajn punkto de la fuĝanta horizonto, ciaj paŝoj fine cin rekondukus apud Tel-Loh, kiu cin atendus senmove en siaj larmoj... Ne estas ekstremaĵo de la tero, komprenu... Ĉar la tero,... malgranda universo... estas ronda...Kaj la universo... granda tero... estas ronda.

- Kion ci diras ?

- Mi diras la plej belan inter la formoj, la formon de la homo.

- La homo - kontraŭdiris Rifat maltrankvile - ne havas la formon, kiun ci diras.

- Li ne havas ĝin. Kaj li havas ĝin. La homo estas neperfekta. Lia kapo, belega sfero, ne sufiĉas al si mem. Lia neperfekteco kaj liaj bezonoj metis, sub la belo kaj la flugo de lia kapo, la treniĝantan malbelon de korpo...



Same, sub la impeto kaj la belo de arbo, la radikoj malbelaj kaj rampantaj kiel serpentoj...

- Ho Tel-Loh, kiu blasfemas la diinon Tel-Loh. Cia kapo estas bela, pli bela estas cia korpo.

La rideto de la juna virino dankis. Sed ŝiaj manoj faris "ne". Kaj ŝia parolo, iom koketa :

- Se mia kapo estas pli malbela ol mia korpo, kiom neperfekta mi estas... La mondo, ĝi estas perfekta... Eĉ la tero, eble, estas perfekta. Sub kapo al si mem sufiĉa, la mondo ne bezonas korpon.

- Ĉu cia kapo diras al ci unuafoje tiujn belajn kaj strangajn aferojn ? Aŭ ĉu ciaj oreloj ricevis ilin de aliaj buŝoj ?

- La patrino de mia patrino instruis al mi tiujn aferojn. Kaj ŝi ricevis ilin de la patro de sia patro.. Mi estis ilin forgesinta... Ci igis min retrovi ilin... Ĉio, kio dormis en mi, vekigis, kiam mi cin rigardas. Kaj ĉio, kio dormis en mi, ŝajnas al mi bela je la vekigo. Tial, ke mi cin rigardas, miaj malnovaj pensoj fariĝas novaj, kaj ili similas al Rifat.

- La aferoj, kiujn ci diris pri la tero kaj pri la universo, verŝajne cia prapatro prenis ilin de iu pastro el Misraim ?

- Mi ne scias.

Ili longe silentis. Rifat blindigite admiris la elokventan duonriponon de la manoj, la elokventan duonriponon de la piedoj, la kvazaŭ glitantajn pozojn de la korpo. La aŭditaj vortoj elfloris en li, pli belaj ol ili estis diritaj. Unuafoje la penso de Misraim renkontis la penson de Arjolando mirigata kaj ĉarmata. En la amo de Rifat al Tel-Loh estis nun kvazaŭ ĝermo de la amo de Pitagoro kaj Platono al la penso de Egiptio.

Rifat, kun duonfermitaj okuloj, ŝajnis dormi. Sed li vidis kaj li pensis.

- Parolu, petis Tel-Loh.

- Oni neniam scias, - diris la Arjo - de kiu lando kaj de kiu revo venos al ni la ĝojo.

Li malfermis tute grande siajn okulojn blujn kiel

la ĉielo en la helo de l'tago. Ili renkontis la okulojn de Tel-Loh, nigrajn kiel la nokto, profundajn kiel la mistero. Li etendis la manojn al manoj, kiuj sin etendis. Ilin tuŝante, ŝajnis al li, kvazaŭ li tuŝus du ridetojn kaj stringus du pensojn. Li sin tutan proksimigis al ŝi, kiu sin tutan alproksimiĝis. En revo, en kiu la mondo ŝanceliĝas kaj ŝanĝas siajn formojn, iliaj lipoj geedziĝis...

## Nupta vojaĝo

Rifat kaj Tel-Loh estis du amaj estuloj : plenaĵoj dezirantaj doni, abismoj avidaj je fremdaj riĉaĵoj. Ilia tenera pasio ĉiutage unuigis ilin per pli profundaj ligoj el flamanta lumo. Ili estis unu por la alia mirigo pligrandiĝanta, antaŭsentata kiel neelĉerpebla. Ĉiu vorto kaj ĉiu gesto emociis ilin kiel kiso, donis al ili kune volupton de posedo, ĝojan impeton de deziro. Ĉiu vorto kaj ĉiu gesto projekciis moviĝantan lumon sur iun novan trezoron, dezirigis lumojn ŝvebantajn kaj pludatrantajn, dezirigis lumojn vojaĝantajn al aliaj pli misteraj trezoroj.

- Parolu, petis Tel-Loh.

Kaj Rifat parolis :

- Ho Tel-Loh, mi malsupreniras en cin kiel en montaran groton. En la lumo de mia amo mi marŝas inter la gemoj, kiujn ĝi briletigas. Ĉiu paŝo liveras al mi neantaŭviditajn riĉaĵojn. Iafaĵe, kredante ekvidi la fundon de la groto, mi hastas. Sed estas ĝirejo, kiun mi trovas, kaj ĝi turnas al vastegaj spacoj. Ĉu iam mi trovos la veran fundon ? Aŭ pliĝuste, ĉu la nobla groto havas fundon ? Ho Tel-Loh, ĉiutage mi eltrovas en ci novajn belaĵojn, kaj ĉiutage mi divenas pli forajn radiaĵojn. Radia mistero, blindiganta lumo-tenebro, ci estas por mi pli kaj pli klara, pli kaj pli nekonata.

- Ci diras, Rifat, tion, kion mi spertas cin konante, kaj sentante, ke mi ne konas cin. Sed mi, mi estas la plej simpla el la virinoj. Ami Rifaton, ĉu tio ne estas la unika sekreto de Tel-Loh, kaj ĉu ĝi ne estas en Tel-Loh la sola klaro ?

- Mi estas viro simpla kiel parolo de infano. Tamen mi ofte eltrovas en mi ion, kion mi ne konis hieraŭe.

Sed en ci, estas mil aferoj, kiujn mi ĉiutage eltrovas.

Ilin kaptis bezono posedi unu la alian ĝis en la pasinteco, kiu antaŭis ilian renkonton.

- Parolu pri iam antaŭe. Parolu pri Rifat infano. Parolu pri la gepatroj de Rifat. Parolu pri la lando de Rifat.

La Arjo rakontis sian vivon de paŝtisto sur la altebenaĵoj. Vigla, ŝanĝiganta kaj supla, lia parolo pasis, kvazaŭ glitado de ŝipo, antaŭ la montopintoj vestitaj per persistentaj neĝoj, la montaroj kovritaj de nudaj rokoj, la verdaj suproj, sur kiuj sin paŝtas la gregoj, la arbokovritaj deklivoj, kie la belo de la arboj estas diversa kaj varia kiel la belo de la homoj.

- Malgraŭ iliaj riĉaĵoj, la ebenaĵoj ŝajnis al mi monotonaj kaj enuigaj, kiel longe mi ne trovis, inter la tropleno de iliaj indiferentaj riĉaĵoj, la solan trezoron, en kiun mi povis meti mian koron, la groton de mistero kaj klaro, kiu nomiĝas Tel-Loh.

Li elvokis la lokŝanĝojn de la triboj, la mallongedaŭrajn instaladojn, la tendojn, kiujn oni starigas dum la vojaĝo, la lignajn domojn, kiuj sufiĉas, kiam oni haltas por prepari aŭ atendi rikolton.

La Arjoj ne konis la plugilon. Por fari kampon, ili bruligis dornaĵojn. Poste, kurba bastono skrapis la grundon, al kiu oni konfidis la grajnoj. Tiu peno sufiĉis al la fruktodonemo de virga tero, ravita, ke ĝi fine naskis. La greno de la Arjoj estis malpli bela ol tiu de Kaldeo, kaj ĝi malpli multobliĝis. Rifat asertis, ke ĝi donas pli bongustan panon.

Li parolis pri la ĝoja ĉasado kaj la pelado al la sovaĝaj bovoj. Li priparolis la vartadon al la dombestoj : ĉevalo, hundo, ŝafoj, kaproj, anseroj. Sed la granda bonfara amikino estis la bovino ; la granda riĉaĵo ŝia lakto, kun la butero kaj la fromaĝo, kiujn oni faras el ĝi.

Liaj fratoj sciis submeti al jugo kaj jungi al ĉaroj bovojn kaj ĉevalojn. Sed ili ne rajdis sur bestoj,

kaj Rifat admiris kiel duoblajn animalojn la unue renkontitajn rajdantojn.

Li parolis kun emocio kaj tremado pri la arja familio : la respektigata avo, la obeata patro, la unika, profunde amata edzino, la fratoj kaj la fratinoj felicitaj sub la milda komando de siaj gepatroj. Li parolis pri la dividado de la laboro en la unueca familio : la taskoj de forto rezervitaj al la viroj, la taskoj de lerteco kaj pacienco allasitaj al la virinoj. Ili donis al la gregoj atentajn vartozorgojn, kaj la nomo, kiu signis la junulinon, signifis : tiu, kiu melkas.

Li laŭdis la noblajn ritojn de senpastra religio, kiu malhavis templojn kaj sangajn oferojn, ĉion fermitan, ĉion malklaran, ĉion kruelan. Sur altaĵo oni starigis en la sunlumo brilblankan ŝtonon. La familipatro, surverŝinte ĝin per oleo, ekbruligis sur ĝi malpezan flamon. Li suprenĵetis kun ĝi la preĝon al li inspiratan de la ĉirkaŭa belo, aŭ li kantis la himnon, kiu elflugis el lia koro kaj el lia ĝojo.

La Arjoj ne konis la laboron pri la metaloj, kaj tiun tutan industrion, en kiu sin lacigis la Sumeranoj, kaj tiujn tutajn sciencojn, pri kiuj sin gloris la Akadanoj.

- Ni faras plibone ol posedi tiujn aferojn ; ni scipovas ne bezoni ilin.

La Kaldeanoj, malgraŭ siaj diversaj scioj, ŝajnis al li de peza inteligento ; ĉu ilia spirito estis malpli masiva kaj kruda ol la korpo de la Sumeranoj ? Per vortoj ekbruligantaj strangajn lumojn, li riproĉis al ili ignori la poezion kaj la belajn pasiojn ; li malŝatis ilin, ĉar ili estis fermitaj al la melankolio, delica tristeco de l'nomado, kiu ĉiam aspiras al io alia. Ĝi, la delikata nostalgio, ne serĉas vivon pli riĉan, pli agrablan aŭ pli potencon, ĝi serĉas vivon diferencon. Ĝi ne amas iun tian lokon, ĝi amas ĉiujn lokojn kaj la tutan nekonataĵon. Ĝi postulas novajn stelojn por rigardi, novajn riveregojn el kiuj trinki, kaj, sub novaj arboj, la fuĝantan rideton de novaj revoj ; ĝi deziras ĵeti al ankoraŭ ne sentitaj ventoj ankoraŭ neaŭditajn kantojn. Rifat insultis kiel krudan prostituadon la kaldean familion ; lin indignigis la brutala aĉeto de la virino, kaj la senpudoreco de tiu sklavino, kiu neniam fariĝas vera edzino.

Ofte Tel-Loh aprobis. Sed ŝia miro ne ĉiam estis ŝoja kaj admira.

- Do ĉenu en cia lando - ŝi demandis - scias legi kaj skribi ?

- Kia! estus bezone skribi ?... La beleco de la mondo konsistas el tio, ke ĝi estas variema. Gardu cin fiksi la parolon : la beleco de la parolo estas variil laŭ la ritmo de l'mondo.

Tamen li konsentis lerni la kojnoformajn literojn, kiuj konsistigas la kaldean skribon. Dum la mano de Tel-Loh gvidis, sur la argila tabuleto, la fingrojn, kiuj tro forte stringis la triangulan stileton, iafoje Rifat maltrankviliĝis.

- Ĉu poste mi ne pli pene parolos ? Ĉu mia lango ne perdos tion, kion gajnos mia mano ? Se la malrapido de la skribado kutimigus mian spiriton al irado malrapida kaj enua... Se mi strebus ŝanĝi en laboraŭ tirbeston ĉevalon faritan por kurado...

Post kelkaj spertoj, li trovis en la skribo aliajn difektojn. Li sin perdis inter la multaj signoj. Ĉu oni ne povus ilin plisimpligi ? Li, tre svage, revis reprezenti la sonojn, jam ne la objektojn. La sonoj, zorge pristuditaj, eble reduktiĝus al malgranda nombro. Tiel li marŝis al la vojo, kiu kondukos al alfabeto ; li komencis la meditadojn, kiuj ebligis al la Arjoj de Persio redukti al tridek sep pure fonetikaj signoj la nenombreblajn ideogramojn de la Kaldeanoj. Tel-Loh neniom komprenis el la konfuzaj aferoj, kiujn li tiam diris. Li mem, post ia reva fulmo, refalis en la nokton kaj la senkuraĝiĝon.

Ofte la juna virino petis :

- Parolu pri Rifat kiam infano. Parolu pri la lando de Rifat kaj tio, kion Rifat faris en sia lando.

Ankoraŭ pli ofte ŝi postulis :

- Parolu pri la gepatroj de Rifat, kaj kiel vivas la familioj sur la montoj.

Tiu bildo de unueco sen brutaleco aspektis al ŝi iluminata de feliĉo kaj de estonteco. Ŝi aŭskultis en reva ekstazo.

Iam mallertaj vortoj kaj esprimriĉaj gestoj demandis, ĉu la familio estas malpliigita per la morto, ĉu la mortinto estas ekzilita for de la familio.

- Ne. Respektita dum sia vivo, la praavo post sia morto fariĝos dio.

Tel-Loh, iafoje konvertita al la naŭzo de la tre amata pri la religio de Kaldeo ; Tel-Loh, kiu plej zorge revokadis el sia spirito sian infanecon kaj la instruojn de sia avino, ekĝojis pro simileco inter Arjolando kaj Egiptio.

- Ankaŭ en Misraim la mortinto fariĝas Oziriso, dia kaj senmorta spirito. En Misraim la tomboj estas la veraĵ domoj ; por pliriĉigi sian domon de eterneco, la Egipto neglektas, kiel tendon, la hodiaŭan loĝejon.

Ŝi haltigis lin antaŭ kaldea tombo. Ŝi kompatis la mortintojn pro la malriĉeco de ilia instalado. La okuloj vidis nur monteton el tero. Tel-Loh, per la mallerto de la vortoj kaj la subtila suplo de la gestoj, diris tion, kion oni trovas sube : sur simpla brika pavimo, apenaŭ sufiĉa por ŝirmi kontraŭ inundoj, estis, sen ia aperturo, malalta kupolo. Deko da korpoj obstrukcis, ĉiu en sia argila ĉerko, la mallarĝan kaj blindan monumenton. Ili ne estas lerte transformitaj en eternajn momiojn kiel la kadavroj de Egiptio. La pli zorge vartitaj, envolvitaj en malriĉaj bendoj ŝmiritaj per bitumo aŭ mielo, rezistos apenaŭ unu jarcenton al la putrigaj fortoj. Du grandaj cilindraj potoj enfermis unu la krurojn, la alia la bruston kaj la kapon ; la kunproksimigitaj aperturoj estis kungluitaj per nafto.

Helpate per kelkaj malcertaj vortoj, precizaj gestoj kaj elvokivaj pozoj montris la mortinton sternitan tute vestitan sur la longo de mato. La kapo kuŝis sur briko. La manoj kunigis sur la mezo de la brusto. La mortotuko estis firme tenata per rimenoj ĉirkaŭ la femuroj kaj la piedartikoj. Aliaj kadavroj, sternitaj sur flanko, ĵetis super ŝultro manon tenantan vazon. La plej malfeliĉaj, kaŭrantaj en maloportuna pozo, ŝajnis al Tel-Loh suferantaj je siaj tutaj membroj kuinturnitaj, fleksitaj, premitaj en la malgrando de unu sola ĵaro.

Eĉ ĉe la riĉaj, kia mizera meblaro kompare kun la luksego de egipta mortinto : unu lanco, tri aŭ kvar ĵet-

lancetoj, la bastono kun emblemo, la cilindro. Kelkaj pladoj el argilo surhavis manĝaĵojn : daktiloj, fiŝo, kortobirdo, ĉasaĵo. En pokalo sekiĝis vino. Por pli longe daŭri, pluraj oferaĵoj estis el ŝtono. Ĉiuj donis mizeraĉan impreson. Tamen Tel-Loh konis, apud Ur-Kalanna, tombon tute okupatan de unu reĝino, kaj en kiu, laŭdire, dormis belegaj juveloj, ornamaĵoj por ŝanĝo, floroj, flakonoj da parfumoj, kombiloj, nadloj por ŝminkado, eĉ provizo de tiu nigraĉa pasto, per kiu la filinoj de Akado aŭ de Sumero ŝmiris siajn okulharojn kaj brovojn.

Pakaĵo, cetere, ja neutila, se oni kredis la pastr-ojn. La stato de kaldea mortinto estis pli teruraĉa ol la plej teruraĉa inkubsonĝo. La penso pri la infero, en kiun li falis, retroigis antaŭ la liberigo eĉ la nekuraceblan, kiu vidas nur estontecon de plujaj torturoj.

Ĝi estis subtera lando, en kiu la nokto densigis oni-ne-scias kian nebulon preskaŭ ŝliman. Sep muroj ĝin ĉirkaŭis. Sep pordoj ĝin fermis, ĉiu gardata de senkompata pordisto.

Reĝlando sen lumo, loĝata de teruraj demonoj. Oni spertis batojn kaj mordojn ; oni divenis, ondantajn en tenebra postsulko, formojn de timo, en kiuj besto kaj homo abomeninde sin miksis. Ĉe la ekstremaĵoj de ŝakala korpo pluraj portis leonan kapon, kaj, strange pligrandigitan, voston de skorpio. Iliaj piedoj finiĝis per aglaj ungegoj.

Ne nur el la buŝo, sed ankaŭ el plej nediveneblaj organoj de tiuj kunmiksitaĵoj, eliĝis blekegoj, hurloj, sibloj, miaŭoj, bojoj. Ĉiu bruo estis akompanata de naŭzaj odoroj, ĝojis pro la kaŭzitaĵoj torturoj aŭ postulis novajn animojn por turmenti kaj novajn torturajn instrumentojn.

- La tuta malico de pastro - rimarkis Rifat - kaj tuta lia amo al malbela.

Pli horra kaj pli kruela ol la demonoj, en la Infero regis diino Allat-Vila kaj kun ridindaj proporcioj, ŝia cilindra busto, kvazaŭ kriaĉanta kolono, estis insulto al la virina beleco. Senĉesaj grimacoj,



variantaj malbelaĵoj, animadis ŝian leoninan vizaĝegon. La flugiloj kaj la piedoj estis tiuj de predobirdo. Ĉiu el ŝiaj enormaj manoj svingis kiel sagon enorman serpenton. Du leonidoj estis pendantaj de longaj kaj faltitaj mamoj. Genuante sur fortika ĉevalo, kiun premegis ŝia pezo, ŝi kuradis de unu al alia ekstremaĵo de sia imperio.

Antaŭ ol prezentiĝi antaŭ la suverenino, la ombro estis senigita je ĉio, kion ĝi kunportis. Se la nuda ombro malplaĉis al la abomena juĝanto, oni liveris ĝin al plej variaj torturoj : malsato, soifo, lepro, malsanoj monotone nemortemaj, kies vundoj malfermiĝas kiel fetoraj oscedoj, aŭ bruskaĵoj atakoj, kiuj malaperas por reveni pli grave, premegante la koron, kiu komencis dilatiĝi, premegante la esperon en ĝermo. La plej favorataj mortintoj vivadis mornan ekzistadon. Unu sola ĝojo, streĉita, amara kaj malica : sin faciligi je la ideo de pli malbonaj plagoj, kiuj ilin ĉirkaŭas. Nesatigebla malsato ne trovis alian nutraĵon ol polvon kaj malpuregaĵon ; la hurlanta brulo de la soifo plongis en fetora ŝlimo, poste retroiris, naŭzite, nepacigite kaj fumante. La korpo tremetis sub povra vestaĵo el plumoj. Movante grandajn senbruaĵajn flugilojn, similaĵajn al tiuj de otuso, ĝi flugetis inter funebraj krioj. En la kapoj pezaj de aŭflinko forviŝiĝis ĉia penso kaj preskaŭ ĉia sento. Oni plu spertadis nur malesperon, vertiĝon, kaj plorantan bedaŭron pri la neatingebla tero.

Kiel ajn malicaj estas la pastroj, kiel ajn kruela kaj malpurega sin manifestas ilia fantazio, ili ne povas plene liberiĝi de ĉia humaneco. La poezio de la rasoj, floro, kies tigo boras sterkaĵon, ŝprucas el iliaj putraj mensogoj. Eĉ la plej aĉa el la inferoj ricevis, tra onine-scias kia fendo, delikatan desupran radion. Kun entuziasmo Tel-Loh recitis la malsupreniron de la brava Iŝtar en la reĝolandon de Allat.

Iŝtar, kvankam diino, havis ion vere diecan : restinte virino per la koro, ŝi amis. Tammuz, ho ve! estis mortema. Ŝi perdis lin. Sed ŝi decidis, por lin forŝiri de Allat, alfronti ĉiujn danĝerojn, eĉ riski eternan kaptitecon.

Ŝi konis grandan sekreton ankoraŭ nekonatan de la homoj.

La sojlo de la palaco de Allat kuŝas sur fonto, kiu,

se oni trinkas el ĝi aŭ sin banas en ĝi, redonas la vivon kaj ties dolĉaĵojn. Por ke la akvo elŝprucu, sufiĉas, ke vi levu la ŝtonon. Sed eĉ la plej potenca el la dioj neniam levos la ŝtonon sen permeso de Allat.

Ĉar la spiritoj de la tero, la Anunas'oj, gvatas ĉe la fonto kun ĵaluza gorgo.

Tel-Loh recitis :

- Ili estas sep, ili estas sep ; en la fosaĵo de la abismo ili estas sep. Nek masklaj nek femalaj, tiaj, kiel disfluantaj torentoj, ili ignoras kompatemon kaj bonfaremon, ili aŭskultas nek petegojn nek singultojn. Ili ne prenas edzinon, ili ne havas infanojn. Ilia koro estas abismo el kiu ŝprucas malamo ; ili disfluigas malamon sur la ebenaĵoj kaj sur la montoj. Ili estas la malamikoj de Ea ; ili estas la kurieroj de la morto kaj la servistoj de Allat.

Tel-Loh daŭrigis :

- Al la lando, de kiu neniu revenas, al la regiono de mallumo, Iŝtar, filino de Sin\*, direktis sian spiriton. Iŝtar mem direktis sian spiriton al la domo de mallumo, sidejo de diino Nikingal-Allat. Al la nemovebla lando, al la regiono, de kiu oni ne revenas, al la loĝejo, en kiun oni penetras, sed el kiu oni ne eliras, al la vojo, kiun oni malsupreniras, sed kiun oni ne resupreniras, al la subteraĵo, en kiun oni ĉiam pliprofundiĝas, al la prizono, en kiu oni havas nur polvon por sia malsato, kaj por sia soifo nur ŝlimon. Kaj, tremantaj sub vestaĵoj el maldensaj plumoj, la ombroj, tiaj kiaj birdoj, ĉion plenigas, ĝis la volbo, de flugoj palpantaj, sin interbatantaj, de flugilbatoj skuantaj fetoraĵojn, de plorantaj kaj ŝirantaj krioj. Sur la pordoj, sur la seruroj, ĉie estas dismetita grasa malbonodora polvo.

Iŝtar frapas kaj diras :

- Gardisto de la vivigaj akvoj, malfermu cian pordon ; malfermu cian pordon, ke mi povu eniri. Se ci ne malfermos la pordon, por ke mi povu eniri, mi frapos

\* Sin : la dioluno.

la klapegon, mi rompos la riglilon, mi deŝiros la seruron, mia senbride fortega piedo frapos la sojlon, kaj mia venka malamikeco trairos la pardonon. Mi resuprenirigos la mortintojn, por ke ili voru la vivantojn, kaj sur la pestigita tero la mortintoj estos pli multaj ol la vivantoj.

La gardisto parolas, li diras al Sinjorino Iŝtar :

- Haltu, ho Sinjorino, ne enpuŝegu la pardonon. Prefere permesu, ke mi iru, kaj ke mi anoncu cian nomon al Nikingal-Allat, reĝino de la infero.

La gardisto, malsuprenirinte, anoncas la nomon de Iŝtar al Nikingal :

- Ho diino, cia fratino Iŝtar venis por serĉi la vivigan akvon. Skuante la potencajn riglilojn, ŝi minacis perforte enpuŝi la pordojn.

Kiam Allat aŭdas tiujn vortojn, ŝi malfermas tute grande sian fetoran faŭkon de leonino. Ŝi blekegas. Ŝia unua blekego estas rido, kiu tremigas la inferon. Tie supre sur la tero, la homoj aŭdas ĝin kiel subteran tondron. Tie supre sur la tero, la rido de Allat-Nikingal renverŝas la domojn ; la montoj, kiuj ĝin aŭdas, disfalas en la valojn ; la valoj sin malfermas je voremaj abismoj.

Sed la diino ne refermis sian leoninan faŭkon ; en la sekvantaj blekegoj la ridoj sin miksas kun prononcataj vortoj :

- Kiel falĉata herbo, Iŝtar malsupreniris al la infero ; kiel kliniĝanta kaj velkanta kano, ŝi pripetegis la akvon de vivo. Nu, kion faras al mi ŝia deziro ? Kiel gravas al mi ŝia kolero ? Ŝi diras : "Per tiu akvo, kun mia edzo mi volus satigi min per ĝi kiel per nutraĵo, sensoifigi min per ĝi kiel per reviviga trinkaĵo." Se mi sciopovus plori, mi plorus, ne pri ŝi, sed pri la herooj, kiuj devis forlasi siajn edzinojn ; mi plorus pri la novedzinoj, kiujn ci forŝiris, ho gardisto, de la sino de iliaj edzoj ; pri la infanetoj mi plorus, pri tiuj, kiujn ci forrabis, antaŭ ol ilia tago estis veninta. Iru do, ho gardisto, kaj malfermu la pardonon ; sed respektu la malnovajn leĝojn, kaj senigu la eniranton de ĉio, kio estas sur ŝi, por ke ŝi aperu antaŭ mi humiligita kaj nudigita.

La gardisto, resuprenirinte, malfermis la pardonon.

- Eniru, ho Sinjorino, kaj kiel la urbo Kalanna ĝojas pro ci, same povu la infera palaco ĝoji pro ci.

Li trapasigis la unuan pardonon al Iŝtar kaj refermis la klapegon. Poste li ĵetis en la polvon la potencon kronon, kiu estis sur la kapo de la diino.

- Kial, ho gardisto, ci malsuprenĵetis la potencon kronon de mia kapo ?

- Antaŭeniru, ho Sinjorino, ĉar tia estas la ordono de Allat.

La malluma kaj belega rakonto plu daŭris, malrapida kaj ripetiĝanta. Post la trapaso de ĉiu pordo, ĝi diris, kion la gardisto deprenis de Iŝtar : ŝiaj orelringoj, ŝia koliero, la vualo, kiu kovris ŝian bruston, ŝia emajlumita zono, ŝiaj brakringoj, ŝiaj piedringoj. Sepfoje la diino maltrankviliĝis :

- Kial, ho gardisto, ci forprenis de mi la altvalorajn ferringojn, kiuj ornamis miajn orelojn ?

Sepfoje la gardisto respondis :

- Antaŭeniru, ho Sinjorino, ĉar tia estas la ordono de Allat.

Ĉe la sepa pordo, li senigis la diinon je ŝia lasta vestaĵo. Sed li fermis okulojn, kiujn ĝislarne vundis la brilo de la nuda diino.

Allat ekvidis Iŝtar'on sen krono, sen juveloj, sen vestoj. La belo de Iŝtar estis suno, kiu incendiis la tenebron. Tial Allat deturnis siajn ĝislarne vunditajn okulojn. Kaj, sin deturnante de la lumo, ŝi insultis la lumecan.

Sed Iŝtar respondis al la insultaj mensogoj de la infero per insultaj veroj :

- Kapo de grimacanta leonino kaj koro de hundino, korpo de malbela, kiu malhonoras la virinon kaj koro de malbela, kiu malhonoras la diojn...

Allat do vokis Narutar'on, demonon de la lepro.

- Venu, Narutar. Prenu kiel cian predon diinon Iŝtar, kaj konduku ŝin for de mia ĉeesto. Sesdekfoje frapu ŝin per malsanoj. Verŝu en ŝiajn okulojn la mal-

sanon de la okuloj. Verŝu en ŝiajn flankojn la malsanon de la flankoj, en ŝiajn piedojn la malsanon de la piedoj, en ŝian kapon la malsanon de la kapo. En ŝin, en ŝin tutan kaj en ĉiun el ŝiaj membroj verŝu malsanon. Precipe la lepro kovru per sia skvama kaj malbrila blanko la insultan kaj vundantan brilon de tiu korpo.

Dum la suferado de Iŝtar, dum diino Iŝtar suferis en sia tuta korpo kaj en ĉiu el siaj membroj, la universo suferis en sia tuta korpo kaj en ĉiu el siaj membroj. Plantoj, bestoj, homoj, dioj, ĉio konsumiĝis.

Ea, la superega dio, emociiĝis pro tiu universala doloro, kiu kondukis al universala morto.

Ea, la superega dio, ne volis, ke la imperio de Allat fariĝu la sola imperio.

Obeante al la saĝo de sia koro, la superega dio fabrikis homon. Sed li ne faris lin kompleta. Li faris Asusonnami'ron, kaj li faris lin eŭnuko.

- Iru, Asusonnami'ro, turnu cian vizaĝon al la pordoj de la infero, malfermigu antaŭ ci la sep pordojn de la infero. Allat vidu cin kaj ekĝoju pro cia ĉeesto. Ĉar la dioj de la morto ĉiam amis la eŭnukojn. Kiam cia ĉeesto estos metinta la koron de Allat en ridetan ripozon, kiam la kolero de Allat estos pacigita je la dolĉo de cia ĉeesto, ĵurpetu ŝin per la nomo de la grandaj dioj. Poste, kun ŝia permeso, turnu la kapon, kaj marŝu ĝis la retirejo de la fulmotondraj ventoj, en kiu estas enfermita la pura fonto de vivo. Trinkigu el la fonto de vivo al Iŝtar kaj al ŝia edzo Tammuz.

Allat ne aŭdacis malobei al Ea, la superega dio. Ĉar Ea, la superega dio, estas pli forta ol Allat. Ea, la superega dio, povus per unu sola vorto mortigi Allat-Nikingal'ron, kaj tiam ĉio, escepte de Nikingal-Allat, estus viva. Sed Ea, la superega dio, ne volas mortigi Nikingal-Allat'ron, ĉar per la morto de la morto la homoj fariĝus similaj al la dioj. Nu, la homoj estas tro malicaj, por ke Ea, la dio bona, permesu, ke ili ricevu potencon kaj daŭron similajn al la potenco kaj al la daŭro de la dioj. Kaj en la mondo estas jam sufiĉe da malbonfaraj demonoj, ke la homoj ne fariĝu senmortaj.

Do Allat obeis. Ŝi vokis Narutar'ron kaj ordonis al li

Ĉion prepari por redoni al la diino la brilegan vivon.

Narudar iris kaj frapis la solide konstruitan palacon. Li rompis la sojlon, kaj elvokis la sep spiritojn de la tero. Li sidigis ilin sur sep tronoj el fero. Li parolis al ĉiu el ili. Ĉiu el ili respondis al li. La malrapida rakonto malrapide ripetis la sep samajn parolojn adresitajn al la sep genioj de la tero kaj la sep samajn respondojn. Post tio Narutar, ricevinte la akvon de la fonto de vivo, verŝis ĝin sur Iŝtar'on kaj rekondukis la brilan diinon al la brila taglumo.

Malrapide, la malrapida rakonto diris pri ĉiu trairita pordo, kaj kiel ĉe ĉiu pordo unu el ŝiaj vestaĵoj aŭ unu el ŝiaj ornamoj estis redonita al la diino.

Je la paso tra la sepa pordo, ŝia kapo ricevis la potencan kronon, kaj Narutar anoncis al ŝi, ke ŝia edzo estas al ŝi redonata.

- Se Allat ankoraŭ ne redonis tion, kion ci tiel pene aĉetis, reiru al ŝi por depostuli Tammuz'on, la edzon de cia nemortema juneco. Verŝu sur lin la vivigan akvon, ŝmiru lin per altvaloraĵaj parfumoj, vestu lin per purpura robo.

Tammuz renaskiĝas ; la naturo kaj la ĝojo renaskiĝas kun li.

Tiel, eĉ en la plej nigra el la religioj, kaj en la plej opaka el la inferoj, la amo venkis la morton.

Tiu rakonto ebriligis Rifat'on kaj Tel-Loh'on. Ĉirkaŭ iliaj kisoj pli pensemaj kaj pli profundaj ĝi metis la florantan ĝojon de printempo.

Cetere la etapo estis ĉarma, kaj la ekstero preskaŭ tiel floranta kiel la koroj. Oni trairis la vastegan ebenaĵon, kiu ĝuste, ĉar ĉiu planto tie floras dufoje en ĉiu jaro, kaj dufoje fruktodonas, estas nomata en iuj libroj la ebenaĵo de du printempoj, en aliaj libroj la ebenaĵo de du rikoltoj.

La herbo svarmis sub danco de ebria lumo. La ebenaĵo ondis ĝis la horizonto. Foje la vento fleksis ondojn da verdaĵo kaj parfumoj, kiuj tuj releviĝis. Ofte la floroj dense starantaj formis tapiŝon kun moviĝantaj koloroj. Aŭ pliiĝuste, ĉu la balancataj koloroj ne metis sur

la vizaĝo de la tero miliardojn da ridetoj fuĝantaj kaj revenantaj ? Leporoj aŭ perdrikaroj, leviĝantaj preskaŭ sub la piedoj, helpis la ĉarman laboron de la ventetoj, abrupte delokis la mildan gracion de la ombroj, la glazuron de la heloj. Fore, hordoj da gazeloj kaj sovaĝaj kaproj maltrankviliĝis pro la bruo de la homoj. Oni vidis ilin levi la kapon, flari, ĉiufanken rigardi ; poste, per unu ekmovo, ili saltis, sin perdis en la blindiga horizonto.

Vespere oni tendumis je unu stadio de iu urbo. Sub la felta tendo, inter Rifat kaj Tel-Loh ekleviĝis, malpeza kiel flugilbato, la tremeto de beleta kverelo.

Kvankam ŝi aprobis plurajn malŝatojn de la Arjo pri la kaldeaj moroj, Tel-Loh penis igi lin admiri la teknikan scion de la Akadanoj kaj eĉ la industrion de la Sumeranoj kaj ilian komprenon pri la praktika vivo.

Ŝiaj paroloj honore al la kono de la nombroj ne sukcesis venki la altecan indiferenton de Rifat.

- Nenion ci povas kalkuli - li deklaris skuante kapon, kiu malŝate ridis. Eĉ la dioj ne scias la nombron de la homoj, nek la nombron de la plantoj, nek la nombron de la bestoj. La mondo estas bela ĉar ĝi estas moviĝanta nombro, nombro, kiu neniam estas nombro, kaj kiu varias dekmilojn da fojoj, antaŭ ol ci povus kalkuli la milionan parton el ĝiaj elementoj.

- Mi povas almenaŭ kalkuli tion, kio estas proksima, por ke mi faru la aferojn laŭ nombro kaj mezuro.

- Nenion, nenion ci povas kalkuli. Ci estas mensogantino, se ci aŭdacas kalkuli eĉ ĝis du. La daktilo, kiun mi manĝas, ne havas la guston de la daktilo, kiun ci manĝas. Ĝi estas pli malgranda, kaj ĝi estas pli matura. Unu estis glata ; la alia faltita. Ilia koloro malsamis ; ankaŭ ilia odoro. Mi ne scias, ĉu por ci ekzistas pluraj viroj, sed mia koro konas unu solan virinon. Kalkuli estaĵojn kaj aferojn, kiuj inter si ne similas, estas diri, ke ili similas. Estas provi tiun neblan taskon : detruu la diversecon de la aĵoj - kaj estas sukcesi tiun facilan taskon : detruu mian konon pri la diverseco de la aĵoj. Kalkuli eĉ ĝis du, estas igi min surda kaj blinda. Estas fermi ĉiujn miajn sensojn.

Li aldonis en rido :

- He, kiu ne sin fermas al la aĵoj, tiu eĉ ne scipovus kalkuli ĝis unu. La afero varias. La nomo, patro de la nombro, estas jam mensogo, ĉar ĝi ne varias tiel rapide, kiel la afero.

Tel-Loh, senprudentigite, ĵetis la brakojn ĉirkaŭ si, kiel por serĉi, en mondo fuĝanta kaj disfalanta, apogon. Kaj ŝi protestis :

- Ĉu mensogo ? Mi ne scias. Sed ĝi enhavas tiom da vero kaj da utilo.

Vive, por ne plu aŭdi la frenezigajn kontraŭdirojn de la Arjo, ebria de infinito kaj de variado, ŝi laŭdis la tri numeradsistemojn de la Kaldeanoj. La decimala sistemo estas kvazaŭ frukto de nia korpo ; ni plukis ĝin ĉe la dek fingroj de niaj du manoj. Sed la dek-duuma sistemo estas pli perfekta : dek estas dividebla nur per du kaj per kvin ; dek du estas dividebla per du, per tri, per kvar kaj per ses. Tamen alia metodo estas ankoraŭ supera : sesdek, admirinda nombro, oblo de dek kaj de dek du, estas bazo de sistemo, kiu mirinde kunigas la avantaĝojn de la du aliaj.

La fingro de la juna virino strekis cirklon sur la sablo, kaj ŝi klarigis la dividon de la cirklo je tricent sesdek gradoj. Ŝi diris, kiel la grado enhavas sesdek minutojn, la minuto sesdek sekundojn, la sekundo sesdek sesdekonojn.

- Ci vidu. La scienco sekvas de proksime la malplej grandajn ŝanĝojn ; ĝi sukcesas mezuri tre malgrandajn diferencojn ; ĝi mirinde malpligrandigas la mensogon dormantan en la nombro kiel en ĉiu vorto.

Ŝi aldonis :

- Ĉar ci estas prava, kaj ĉiu vorto enhavas mensogon. Kiel ĉiu vivo enhavas morton. Tamen nia vivo luktas kontraŭ la morton, ĝian gaston. Same per la parolo kaj aparte per la nombro mi luktas kontraŭ la mensogon, mi repuŝas for de mi la malbonon, kiu ne povus esti detruita.

Ŝi aplikis al la cirkla daŭro dividajn analogajn al tiuj de la spaca cirklo.



- Aŭskultu. La tempo similas al la spaco. Ciklo de kvardek tri mil ducent jaroj povas esti reprezentata per la cirklo, kiun ni rigardas. Tiu cirklo estas unu tago de la universo. Tiu tago dividiĝas je dek du sar'oj, horoj de la universala vivo. Ĉiu el tiuj horoj daŭras tri mil sescent el niaj jaroj, kaj ĝi enhavas sesdek sesse'jn aŭ minutojn de la mondo. Ĉiu el tiuj minutoj daŭras sesdek jarojn. Tiel unu revolucio de la suno estas unu sekundo en la kurbo eterneco.

Post longa silento ŝi ree parolis :

- Ci diras, Rifat : ĉio estas diversa. Mi, mi diras : ĉio similas. Estas mensogo, mi ja scias, en mia diro, kiel estas en cia diro. Sed, se mi eltrovos la similaĵojn, mia mensogo instruos al mi ian veron ; nenion iam instruos al ci cia mensogo. Nenie la nombro estas ĉio, tial la aferoj restas diversaj ; ĉie estas nombro, tial la aferoj estas similaj. Ĉio varias, sed ĉu ne estas ia ritmo en la variadoj, kaj ĉu hodiaŭ ne similas al hieraŭ ? Mi studas kaj mezuras plej bone, kiel mi povas, la hodiaŭan ritmon, por iom koni morgaŭon ?

Ŝi aldonis :

- Matene, se ci volos, ni eniros en la urbon. Sed, se ci preferos, ni haltos rigardante kiun ajn izolitan konstruaĵon. Mi montros al ci unu utilecon de scio. Ni admiros, kiel la egoj de ĉio konstruata en Kaldeo estas turnitaj al la kvar domoj de la ĉielo : unu al Oriento, unu al Okcidento, unu al Ursino, la alia al Sudo.

- Kiel gravas tiuj aferoj ?

- Ili malpli gravas ol la amo, malpli ol la revo, malpli ol la ebriga belo de cia vizaĝo kaj de cia parolo. Tamen ili estas gravaj. Ili igas pli ridetantaj, sen ke ili tion scias, la amon, la revon, la vizaĝon kaj la parolon. La ombroj projekciataj de la tiel konstruitaj domoj diras ekzakte, kioma horo estas. La tiel konstruitaj domoj estas pli sanaj kaj pli agrablaj : neniu faco rigardas rekte al la Ursino kaj estas senigata je la radioj de la suno ; neniu rigardas la brutalan sudon kaj fariĝas tia kia la muro de forno. Neniu perdas aŭ ricevas la sunlumon en tro bruska maniero.

La morgaŭon, ŝi estis pli postulema ol ŝi anoncis.

Ŝi trudis Rifat'on supreniri kun ŝi sur ziguraton.

Pli ol unu fojon tiuj artefaritaj montoj, tiel impresaj sur la ebenaĵo sen altaĵoj de Mezopotamio, estis allogintaj la rigardojn kaj la revojn de la Arjo. Niaj rigardoj kaj niaj revoj, gracilaj rampantaj plantoj, volonte volviĝas ĉirkaŭ tio, kio alte staras. Tamen, ĝis tiam, nenia deziro supreniri venkis iujn malinklinojn de la montarano.

Sendube, tie supre la spektaklo estas vaste bel-ega. Sed tro multe da ruzaĵaj pastroj, tro multe da naivaj kredantoj sekvis tiujn deklivajn vojojn. Ŝajnis al Rifat, ke tie fetoro de mensogo kaj stulteco lin sufokus. Li estis al si promesinta, ke li supreniros nur sur la Turon de l'Popoloj.

Li ridetante cedis al la insistado de la tre amata.

Tiuj masoj estis monumentoj nur laŭ la ekstero. Montopintoj sen grotoj, sen kavernoj. Longe de la deklivo, kelkaj kapeloj invitis al piaj ripozoj. Neniu pordo permesis eniri en la masivan monteton. Inter la morna maso kaj la krenela parapeto, en kiu ĉiu murodento, eta piramido, reproduktis la ĝeneralan figuron de la konstruaĵo, necesis sekvi la kvar flankojn de la etaĝo, imite al la monotona rivoluo de sep planedoj. Nenia vario krom en la koloroj. Oni unue preteriris kvar murojn nigritajn per bitumo, tiel ke nigro ĝojigas la okulojn de Adar. Poste kvar muroj, honore al la blanka Iŝtar, estis ŝmiritaj per kalko. Por plaĉi al la brila Marduk, la tria etaĝo estis flavigita per feroksido. La kvara, bluigita per kobalto, ĉarmis la inĝenian Nebo. Kupr-oksido ruĝigis la kvinan dediĉitan al la sanga Nergal. Plakaĵo el arĝento igis la sesan agrabla al Sin, la dio Luno. Ĝia kovraĵo el oro faris la sepan inda je la suno. Ankaŭ la supra kapelo estis kovrita de oraj lamenoj. Kvar kolosaj statuoj staris ĉe la anguloj de la platformo kiel hirtaĵoj el oro. La tuta supro de la konstruaĵo brilis kiel krenelita krono.

Admirinda estis la spektaklo, kiun la supreniro prezentis pli kaj pli vasta. Sed Rifat ne liveris sin tutan al la vasta volupto de sia rigardo. Ofte lia parolo malŝatis la pastrojn, la templojn, kaj tiun

ridindan fantazion, kiu rigardas la planedojn kiel diojn.

Tel-Loh respondis :

- Ĉu ni rampas laŭlonge de stulta templo, aŭ ĉu ni supreniras al sublima observejo ? Malŝatindaj kiel pastroj, la homoj, kiuj pasigas noktojn en la supra kapelo, estas estimindaj kiel astronomoj. Dank'al ili ni scias antaŭvidi la luneklipsojn. Al ili ni ŝuldas, ke ni ne plu konfuzas la vagantajn planedojn kun la fiksjaj steloj. Ili instruas nin grupigi laŭ konstelacioj tion, kio por ne-sciantaj okuloj restas kaoso da briloj, kaj ni retroviĝas en la ĉielo kiel en familiara urbo. Ni sekvas la iradon de la suno tra ĝiaj dek du domoj. Nu la steloj, ĉu ili estas dioj aŭ ne, regas la okazojn sur la tero. Iuj, en tiu blindiga libro, legas nian estontecon. Ĉu ci ankaŭ ne scias, ke ĉiu planedo estas patrino de unu metalo ?

- Kion ci diras ?

- Mi diras, ke la brila oro estas subtere filo de la suno. Mi diras, ke la pala arĝento estas kreita de la anemia luno. La plumbo apartenas al la trista Adar ; la fero, al la militisto Nergal ; la stano al la potenco Marduk. Mi diras, ke, se mi sufiĉe konus la ĉielon, mi malsciis nenion el tio, kio estas sur la tero, aŭ kio estas en la tero ; nenion el tio, kion kaŝas la refaldita pasinteco, kion etendas la vasta estanteco, kion rivelas la malrapide disfalantaj kavernoj de la estonteco. Se mi sciis la tutan ĉielon, mi sciis ĉiujn morgaŭojn ĝermantajn en la ventro de hodiaŭ. Mi povus riveli ĉiujn eblojn dormantajn sur la grundo aŭ sub la grundo. Mi konus mian destinon, kaj la cian, kaj tiujn de la idoj, kiuj elfluas el ni. Mi konus la sorton de ĉiuj hodiaŭaj homoj, la gestojn de ĉiuj morgaŭaj homoj. El unu metalo mi povus fari alian metalon. Mi povus...

- Silentu - petegis Rifat. El la aferoj, kiujn ci diras, mi kredas, ke kelkaj estas veraj. Sed aliaj vundas min kiel ponardoj de mensogo. Ĉar la pastro utiligas eĉ la veron por siaj mensogadoj. Kaj li miksas la veran kaj la falsan kun tiel subtila tekniko, ke li ne plu retrovas sin.

- Sur la Turo de l'Popoloj, ni observos la astrojn kun la sola deziro scii. Ĉar ne estas pastroj inter ni, nia menso estos la ĝusta kribrilo, kiu disigas la veran

disde la falsa. La peza greno restos en la fundo de la kribrilo, kaj ĉiu el niaj pensoj estos la ekskuo, kiu liveras al la ventoj la malpezan pajlon.

- La vivo estas mallonga, diris Rifat.

Sed Tel-Loh, kun ĝoja kaj brava entuziasmo :

- La vivo estas longa. Mi donos al ci idojn, kiuj siavice naskos. Tiel, eĉ en la domoj de la tempo, ni estos senmortaj. Ni do faru al ni la paciencon kaj la ne malkuraĝigeblan esperon, kiuj konvenas al senmortaj estaĵoj.

Ili proksimiĝis al Eŭfrato. Ĝia nomo signifas, eminentasence, la Riverego. Eŭfrato estas vira, diris la pastroj kaj la popoloj. Sed tiu Tigro, kiun en la ebenaĵo, pro ĝia fortega kaj rekta rapido, oni nomas Hiddekel, t.e. Altaj Bordoĵ, Tigro estas ino. Rifat memoris pri ĝia brua kolero. Samtempe kiel brutalajn akvojn, li ankaŭ memoris, la riverego-virino kunportas ŝtonojn ruliĝantaj kaj interfrapiĝantaj.

En tiu malproksima epoko, la rivero vira kaj la rivero ina ne sukcesis intermiksiĝi. Tel-Loh asertis, ke ili strebas al unuiĝo. Ne povante sin kunigi sur la tro mallonga tero, ili ĵetis antaŭ sin abundajn ŝlimojn, retroigis la maron, kaj, samkiel gefianĉoj konstruas la liton por la estonta interpariĝo, konstruadis novan teron. Iliaj konkeroj ne estos ĉiam vanaj, sed ilia geedziĝo efektivigis. Tel-Loh amis pro kompato la disajn geamantojn ; amis pro admiro ilian sovaĝan kaj obstinan laboron.

Rekta kaj rapida, virino frenezigita de atendado, Tigro kuris al edziniĝo aŭ morto. Eŭfrato, malrapida, majesta, malfruiĝis, multobligis serpentumojn kaj provojn. Je ĉiu stadio li provis, bruska angulo aŭ insida turno, proksimiĝi al la tre amata. Ĉiam iu obstaklo lin repuŝis. Ĉiam li rekomencis la aman strebon. La ŝipanoj, kiuj sekvis la obstinajn malcertaĵojn de lia fluo, pasis ĝis trifoje preter la samaj kanoj aŭ preter la sama vilaĝo.

Eŭfrato estis la granda komerca vojo inter la ebenaĵo kaj la montoj. Oni timis la kapricojn kaj la

brutalaĵojn de Tigro. Funden tirate de neantaŭvidita kirlo, multaj ŝipoj dronis kun sia ŝarĝo kaj sia ŝip-anaro. Aliaj, malpli malfeliĉaj, estis ĵetataj al la bordo. La homoj, savitaj el ilia frakaso, pene rekolektis parton el la varoj. La riverbordanoj estis tiel ŝtelistoj kiel la rivero ; ili haltigis kaj prirabis la bargarojn ; en siaj tagoj de modereco, ili igis ilin aĉeti liberan pason per donacoj. Malgranda parto el la kargoj alvenis al la celo.

Eŭfrato, pli milda kaj pli regula, ŝajnis persvadi la riveranojn pri malpli akraj moroj. Ĝi estis kovrita de rondaj flosoj subtenataj de ŝveligitaj felsakoj kaj ŝarĝitaj per plej diversaj varoj. Kiam la varoj estis venditaj, oni reportis laŭ tervojtoj la lignon de la flosoj kaj la malŝveligitajn sakojn.

Ankaŭ multegaj ŝipoj ĝin malsupreniris aŭ trairis. Rondaj, kiel enormaj kuvoj, sen distingo inter pobo kaj pruo. Du starantaj viroj, armitaj per stangoj, ilin direktis. Laŭ alterna movo ritmata de tre simpla kanto, unu levis sian stangon dum la alia puŝis. Ĉiuj similaj laŭ unua aspekto, tiuj ŝipoj tamen apartenis al du specoj, ĉu ili venis de la ebenaĵo aŭ de la montaroj. La unuaj nur interkomunikigis la du bordojn. Ili alportis sian kargon al ĉaroj el cedroligno aŭ al kameloj genuantaj sur la bordo. Ili estis simplaj korboj el interplektitaj branĉoj de tamariko. Oni ŝtopis la interspacojn per pajlo ; la tuto estis interne kaj ekstere ŝmirita per asfalto, kiu sufiĉis por venki la premon de la akvo. Sed la armenaj ŝipoj vestis per dika felo solidan ŝelon el salika ligno. Multe pli ampleksaj, ili portis grandegan pezon, ĝis kvin mil talantoj. Ĉiu el ili portis unu aŭ du azenojn. Oni vendis ne nur la kargon, sed ankaŭ la trabaron de la ŝipo, altvaloran en lando, kie ligno estis rara. Poste oni reiris al la montaro pelante antaŭ si la azenojn portantajn la ledaĵojn.

Iun tagon, kun mikso de espero kaj envio, Tel-Loh kaj Rifat haltis por rigardi junan Kaldeaninon. Sidante, ŝi lulis infaneton sur siaj genuoj.

Ŝi kantis melopeon lantan kaj ordonan. Tel-Loh dume tradukis la kanton kaj iafoje ĝin akompanis per rapida komento. Potenca pripetego, tiu kanto, por protekti la infanon, kuniĝis kun la efiko de la amuletoj. Tiu kanto,

asertis Tel-Loh, kuniĝis kun la amuletoj kaj sin miksis kun ili - samkiel bitumo sin ŝovas inter brikoj - por levi antaŭ la infano, kontraŭ ĝiaj malamikoj, netraireblan muron.

Ĉi diris :

- Forvaporiĝu, kadavrulo, kiu venas en mallumo, kiu ŝtele eniras, kun la nazo malantaŭe, kun la vizaĝo retrotornita ; foriĝu, senigite de tio, por kio ci venis. Se ci venis por kisi ĉi tiun infanon, mi ne permesas, ke ci kisu ĝin. Se ci venis por pacigi ĝiajn kriojn, mi ne permesas, ke ci pacigu ilin. Se ci venis por ĝin preni, mi ne permesas, ke ci prenu ĝin. Mi fabrikis por ĝi sorĉaĵon kontraŭ ci per la laktuko, kiu cin pikas, per la ajlo, kiu cin dolorigas, per la mielo tiel naŭza por la mortintoj kiel dolĉa por la vivantoj, per la dornoj de mormir'o, per plektaĵo el stupo kaj per la spino de lotuso.

La glosa de Tel-Loh klarigis : la fantomo alproksimiĝis kun la kapo retrotornita, por ne perfidi sin per la truoj de la vizaĝo. Sian perfideman kapon ĝi plilongigis, en oportuna momento, por kisi la infanon kaj elsuĉi ĝian vivon. Kiam la infano kriis, la kadavrulo alkuris por luli ĝin ĝis la senvekiĝa dormo. Eble li provos bruske forpreni ĝin kaj kuri por trankvile vori ĝin en sia tombo. Feliĉe, ĉe la kolo de la etulo estis pendigitaj substancoj abomenaj al vampiroj. Kaj la kantata formulo duobligis ilian efikon.

\*  
\* \*

La amaso pli densa anoncis, ke oni proksimiĝas al la fino de la vojaĝo. Sed la lastaj etapoj estis malgajigitaj de la malfeliĉo de amiko.

Sulaj, la gastejestro, kiu invitis Rifat'on la antaŭtagon de ilia ama renkonto, estis liginta sin al li kaj al Tel-Loh. Ili, pro naiva kunligo de ideoj, amis lin kiel la kaŭzon de ilia feliĉo. Cetere, li elverŝis karesajn profetaĵojn, ilin envolvis en la parfumo de espero. Li promesis al la gejunuloj, ke baldaŭ ili ricevos idon. Tiu infano estos bela al la okuloj de la patro kiel la patrino mem, al la okuloj de la patrino kiel la patro. Al ĉies okuloj li estos bela kiel liaj gepatroj.

Li havos la suplan teniĝon de Tel-Loh, ŝiajn ritmajn kaj esprimajn movojn ; sed lia parolo estos potenca kiel tiu de Rifat. Kaj li estos, tiu infano, destinita al ĉiaj feliĉoj.

- Memoru, kion diras la maljuna Sulaj, via amiko. La infano venos en la lumon kun ĉapo sur la kapo, kaj la bona aŭguro eniros mezen de vi.

Sed jen : de post kelkaj tagoj Sulaj ne diris plu ĝojajn kaj karesajn vortojn. Nun li estis malsana, kaj la flegado de Tel-Loh ne faciligis lin.

La maljunulo ripetis kun devota kaj malgaja tono :

- Mia tago nun estas nur suspiro, kaj mia nokto fluas en la torento de miaj larmoj. Mia lunmonato estas nur turmento, kaj mia jaro daŭra krio. La tuta forto de mia korpo estas likvaĵo fuĝanta el traborita ujo. Miaj piedoj stumblas ŝarĝite de la ĉenoj de langvoro. Mi estas kuŝanta, muĝanta kiel taŭro ; mia angorego beas kiel ŝafino, kiu perdis sian idon. Kaj neniu dio jam venis helpe al mi ; neniu diino etendis al mi helpan manon. Neniu dio kompatas min ; neniu diino venas sin meti apud min.

Iun matenon, kiam la maljunulo plie plendis, Tel-Loh diris al Rifat :

- En tiu ĉi okazo, ci vidos, kiel la scienco povas esti utila.

Inter la Kaldeanoj, kiuj aliĝis al la Arjoj, ŝi konis Purnapurjas'on, bonfaman kuraciston. Kun konsento de la malsanulo, ŝi kuris voki lin.

Purnapurjas longe ekzamenis la okulojn kaj la vizaĝon de Sulaj. De li kaj de Tel-Loh li ricevis klarigojn pri la komenco kaj la fazoj de la malsano. Fine li skuis maltrankvilan kapon :

- Ĉio demonstras, li diris, ke tiu viro estas frapita de potencaj sorĉoj.

Li demandis la pacienton pri la malamikoj, kiujn li povis koni.

Sed Sulaj faris la geston, kiu neas. Kaj lia voĉo preskaŭ nedistingebla :

- Neniun malamikon. Ne, mi ne havas malamikojn.

Insistis Purnapurjas, viro certa pri sia scio. Subite Sulaj paliĝis. Li ekmemoris. Tri monatojn antaŭe, pastro insultis lin. La maljuna gastejestro, nevole frapinte la pastron je kontraŭpaso, estis kliniĝinta, multobliginta la ekskuzojn. Sed la pastro, sen haltigi sian marŝon kaj sen sin deturni, ripetadis, tiel longe, kiel Sulaj povis aŭdi, insultojn kaj minacojn.

La rideto de Purnapurjas disradiis la indulgemon kaj la ĝojon de neŝancelitaj certecoj. Rideto de supera homo, kiu, sen ia miro, vidas realiĝi siajn nerareblajn antaŭdirojn. Sulaj kaj Tel-Loh skuadis malgajigitajn kaj ne plu dubantajn kapojn. Rifat, kiu sciis la pastrojn kapablaj je ĉiaj malicaj intencoj, kaj ne sciis la limon de ilia povo, estis preskaŭ persvadita.

Purnapurjas diris :

- Pli efika estas la medicino celebrata en templo. Bedaŭrinde, ci estas tro malfortiĝinta por elporti longan transporton. Estas singardeme, ke mi kuracu cin en tiu ĉi tendo... Atendu min en ĝojo kaj konfido. Mi baldaŭ revenos, por la liberiga sorĉo, portante miajn librojn kaj herbojn de mi mem kolektitajn laŭ plej efikaj ritoj.

Je sia reveno, la kuracisto, ĉe la sojlo de la tendo, demetis siajn piedvestojn kaj sin purigis per akvo kaj per nedistingeblaj vortoj. Poste li venis al la malsanulo per egalaj paŝoj alterne oblikvaj al dekstro kaj la maldekstro. Sur la grundo, apud la mato, sur kiu suferis Sulaj, li ekbruligis fajron el odoraj plantoj. Dum ili konsumiĝis, kronate de hela, preskaŭ senfuma, flamo, la kuracisto parolis per firma kaj precize ritmata voĉo. Li diris :

- La malbeno, potenca demono, falis sur la viron. La voĉo de la pastro, peza plago, falis sur lin. Sur lin falis la malica voĉo, la malbonfara malbeno, la sorĉo, la febro. Tiun viron buĉas la akra malbeno, kiel tranĉilo buĉas ŝafidon. Lia protektanta dio retiriĝis de lia korpo. Lia protektanta diino retiriĝis de li. La malica voĉo sin sternis sur lin, kaj la pezo



de la malica voĉo lin paralizas, lin premezas, lin konsumas, kiel la piedo de la vinfaristo malplenigas la traŭbon kaj ĝin sekigas.

Sin turnante al Rifat kaj Tel-Loh, la magiisto deklaris, ke la malsano estas terura. Tamen ne endis malesperi, ĉar la dioj estas potencaj, kaj jam, tion li sciis, Marduk emociiĝis favore al Sulaj.

Revenante al la malsanulo, li daŭrigis :

- Marduk ĵetis rigardon sur Sulaj'on. Marduk eniris en la domon de sia patro Ea, dirante : "Ho mia patro, la malica malbeno falis sur Sulaj'on kiel demono." Dufoje Marduk parolis al sia patro, kaj diris : "Mi ne scias, kion tiu homo devas fari. Kio povas resanigi lin ?"

La kuracisto konservis scioplene maltrankvilan silenton. Poste, kun necerta rideto sur la lipoj, li streĉis la dekstran oreilon.

- Mi aŭdas - li diris - la suverenan voĉon de Ea. Ea respondas : "Ho mia filo, kion ci ne scias, kaj kion mi povus instrui al ci, kion ci ne jam scias ? Kion mi scias, tion ci scias. Iru do, mia filo Marduk ; konduku la homon al puriga bano ; elpelu la sorĉon, kiu estas en li. Forpelu la sorĉon, la malsanon, kiu voras lian korpon, ĉu ĝi estas kaŭzita de forgesita malbeno de lia patro, de forgesita malbeno de lia patrino, aŭ de forgesita malbeno de lia pliĝa frato, aŭ de la nesciata malbeno de iu nekonato, aŭ de la malbeno de la nevole frapita pastro. Tiu malbeno, kia ajn ĝi estas, kaj de kie ajn ĝi venis, estu forigita per la sorĉo de Ea."

Post paŭzo Purnapurjas reparolis. Je momentoj nun li plilaŭtigis la voĉon, kaj malrapide li akcentis la silabojn, kiel oratoro, kiu altiras la atenton al la esencaj punktoj de sia parolado :

- Tiu malbeno do estu forigita per la sorĉo de Ea kiel ajla bulbero, kiun oni senhauĝigas ; tiu malbeno estu forigita per la sorĉo de Ea kiel daktilo, kiun oni distranĉas je pecoj ; tiu malbeno estu forigita per la sorĉo de Ea kiel branĉo provizita je floroj, kiujn oni deŝiras. La malican sorĉon, ho spirito de la ĉielo, forturnu ĝin ; kaj ankaŭ vi forturnu ĝin, spirito de la tero.

Sulaj kaj Tel-Loh ĝojis, ĉar la dio indikis la kuracilon. Tel-Loh, momenton elirinte, revenis kun en la manoj ajla bulbero, daktilo kaj branĉo kovrita de floroj.

La magiisto metis la tri objektojn je kelka distanco de la fajro per tranĉilo el siliko. Poste, helpate de Tel-Loh, li purigis la malsanulon. Li lavis liajn piedojn, liajn manojn, lian vizaĝon, kaj aspergis la tutan korpon per parfumita akvo. Kiam tiu preparado estis finita, li tiris la maton por pli proksimigi la pacienton al la fajrujo. Ĉiuj ĉi ceremonioj estis akompanataj per vortoj eble apartenantaj al iu fremda lingvo, eble apartenantaj al neniu lingvo. Starante apud la malsanulo, li senhaŭtigis la ajlan bulberon kaj ĵetis ĝin en la fajron. Dume li kantis laŭ du notoj jenan alpreĝon en kaldea lingvo :

- La malica sorĉo estu tia, kia tiu ajlo senhaŭtigita kaj ĵetita en la fajron. La arda flamo konsumas tiun ajlon ; ĝi jam ne estos plantita en ĝardeno ; ĝi ne ĝojos pro la akvo de la pluvo aŭ pro la akvo de kanaletto ; ĝiaj radikoj ne enprofundiĝos en la teron, ĝia tigo ne kreskos kaj neniam vidos la sunon ; ĝi ne servos kiel nutraĵo al reĝoj aŭ al popoloj. Same povu Marduk, generalo de la dioj, peli la sorĉon for de Sulaj kaj denodi la ligilojn de la voranta malsano, de la peko, de la kulpo, de la perverseco, de la krimo.

Per forta voĉo akompanata de impetega gesto, Purnapurjas kriis :

- Hilka, Hilka, bessâ, bessâ ! \*

T.e. :

- Foriru, foriru, malbona, malbona!

Post signo de la kuracisto, Tel-Loh, trenante per la mano Rifat'on mirigitan, proksimiĝis al la hela fajro. Ŝi klinis pian kapon al la hela fajro. Kaj sur argila tabuleto, kiun etendis al ŝi la magiisto, ŝi pie legis :

---

\* Ankorau nun niaj sorĉistoj atribuas grandan potencon al tiu formulo, kies signifon kaj devenon ili ne scias.

- La malsano, kiu estas en la korpo de Sulaj, en lia karno, en liaj membroj, ĝi povu esti senhaŭtigita kiel tiu ajla bulbero kaj en tiu ĉi tago konsumita de la voranta fajro. Eliru la sorĉo. Povu Sulaj longan tempon plu vidi la lumon.

Kiam Purnapurjas estis denove kriinta :

- Hilka, Hilka, besŝa, besŝa...

...Li signis al la malsanulo, kiu ripetis per eksvenanta voĉo :

- La malsano, kiu estas en mia korpo, en mia karno, en miaj membroj, ĝi povu esti senhaŭtigita kiel tiu ajla bulbero.

Kaj li petis, ke lia malsano estu konsumita de la flamo. Kaj li ordonis al la sorĉo, ke ĝi eliru. Kaj li esprimis la deziron vidi la lumon longan tempon plu.

Kiam la malsanulo estis fininta sian langvoran preĝon, Purnapurjas distranĉis la daktilon po etaj pecoj. Li ĵetis tiujn fragmentojn en la fajron. Kaj, laŭ du alternaj notoj, li kantetis :

- La sorĉo estu tia, kia tiu daktilo distranĉita kaj ĵetita en la fajron. La arda flamo konsumas tiun daktilon. Tiu, kiu ĝin kolektis, jam ne remetos ĝin sur ĝiantigon, kaj tamen ĝi ne servos al nutrado de homo. Same povu Marduk, generalo de la dioj, peli la sorĉon for de Sulaj kaj rompi la ligilojn de la voranta malsano, de la peko, de la kulpo, de la perverseco, de la krimo. Hilka, Hilka, besŝa, besŝa.

Kaj Tel-Loh, kun la kapo pie klinita al la fajro, sed sen plu bezoni la libron :

- La malsano, kiu estas en la korpo de Sulaj, en lia karno, en liaj membroj, ĝi povu esti distranĉita kiel tiu daktilo kaj en tiu ĉi tago konsumita de la voranta flamo. Eliru la sorĉo. Longe plu povu Sulaj vidi la lumon.

Kaj la plendotona voĉo de la malsanulo esprimis la deziron, ke la malsano estu distranĉita kaj bruligita kiel la daktilo, ke la sorĉo estu forpelita, ke Sulaj povu longe plu vidi la lumon.

La ceremonio plu daŭris, ripetigis. Ĉar la dioj, la homoj kaj la aferoj cedas nur al insistado kaj al tedado.

Samaj gestoj, samaj formuloj akompanis la oferon de la floranta branĉo.

Sekvis aliaj oferoj, kiujn la dio ne bezonis indiki, ĉar ili konkludis ĉian similan preĝadon. La fajro konsumis sinsekve lanflokon, hartufon kolektitan de sur virga kaprino, faskon da tinkturita fadeno kaj fabon. La formuloj revenis, monotona fono, sur kiu elstaris kelkaj karakterizaj trajtoj : la folioj de la branĉo neniam estos remetitaj sur la arbo nek utiligitaj en la laboro de tinkturisto ; la lano kaj la haroj ne revenos sur la dorson de la besto kaj ne servos por teksti vestaĵojn.

Je la fino de la ceremonio Sulaj svenis. Purnapurjas ĝoje asertis, ke tiu sinkopo estas la plej favora el la signoj : ĝi pruvas, ke la bonfaraj dioj energie komencis la lukton kontraŭ la malicaj feoj.

Por helpi la penon de la bonfaraj dioj, Tel-Loh kaj la kuracisto metis pikantajn odorojn sub la naztruojn de la malsanulo ; ili frotis lian vizagon kaj liajn manojn per vinagro.

Kiam Sulaj elsvenigis, li manifestis strangan malkvieton. Li tremis per tutaj siaj membroj. Li eligis ekĝemojn. Abrupte, kun akutaĵ krioj, li ruliĝis sur la grundo.

- La batalo, la bona batalo - glori kriis Purnapurjas. Kuraĝe, Marduk, kuraĝe, generalo de la dioj, daŭrigu la bonan batalon. Ĉiaj servistoj cin rigardas kaj admiras. Kuraĝe, Marduk, potenca generalo de la dioj ; kuraĝe, la venko estas proksima.

Kiel bona helpanto, li poste multigis la minacajn gestojn kontraŭ la duone venkita malamiko. Kaj li kriis :

- Hilka, Hilka, besŝa, besŝa.

Profunda malviglo sekvis la malkvieton. Sternite, kun la korpo malstreĉita, la membroj dise kuŝantaj, la malsanulo glitis sur la rapida deklivo de la dormo.

Tuj kiam li fermis la okulojn, Purnapurjas asertis :

- Kompleta venko de Marduk, generalo de la dioj. Gloron, gloron, trifoje gloron al Marduk, la venkinta dio.

Li lastafoje alvokis Ea'on kaj Marduk'on. Li pagis per laŭdoj la fajrodion, kiu bonvoleme helpis la ekzorcon.

- Ho fajro, moviĝanta ĉefo, kiu estas laŭdata en la lando, filo de la abismo, filo de la ĉielo, heroo laŭdegata en la lando... Ho fajro, vi instalis la lumon en la domon de tenebro. Vi mikŝas, ilin fandante, kupron kaj stanon. Kiu, dum la nokto, tremigas la maliculojn, estas vi. La vivo, estas vi : la korpo, kiu ne plu enhavas vin, estas kadavro. Brilanta aŭ kaŝita, lumo aŭ varmo, vi, ho heroo, cirkulas en la membroj de la homo, en la gloraj koroj de la astroj, en ĉiuj partoj noblaj aŭ malnoblaj de la universo. Bonfara fajro, vi dolĉigas la amarajn nutraĵojn, vi mildigas la malmolon de la viandoj. Patro de la vivo, patro de la iloj, kiuj plibonigas la vivon, patro de la armiloj kaj de la sorĉoj, kiuj ŝirmas la vivon... Mi vin preĝe alvokas, ho heroo, por tiu homo, kiu vin amas. Ke la membroj de tiu homo refariĝinta filo de sia dio estu, per via potenco, brilaj pro pureco. Ke tiu homo refariĝinta filo de sia dio estu pura kiel la ĉielo ; li estu brila sur la tero ; ke li brilegu kiel la mezo de la ĉielo, kaj ke la malica lango, kiu lin ensorĉis, ne havu plu potencon sur li.

Purnapurjas retiriĝis kun la kapo alte levita, iomete klinita malantaŭen. Tia, kia generalo, kiu sukcesis plej malfacilan kaj plej decidigan venkon.

Tel-Loh kaj Rifat sekvis lin ekster la tendon. Li donis al ili kelkajn svagajn instrukciojn. Sed li parolis per neglektema tono kaj pro nura komplezo, ĉar nun Sulaj estis savita.

La plej scioplena kuracisto povas erari. Okazas, ke li deklaras mortonta malsanulon, kiu estos tiel imperinenta, ke li resaniĝos. Iafoje ankaŭ, tiu, kiun la kuracisto asertas, ke li savis, havas la strangan malicon refali kaj ruliĝi ĝis la abismo.

La morgaŭon Sulaj fartis pli malbone.

Purnapurjas, denove pripetita de Tel-Loh, repuŝis

ŝiajn petojn kun indigno :

- Mi ne revenos. Mi estis lin resaniginta. Ĉar li duafoje kulpis sin liverante al la potenco de la demonoj, la ofenditaj dioj ne obeos mian alvokon favore al li. Nek Marduk nek la Fajro nek mi povas ion plu fari por li.

Tel-Loh ekmemoris, ke en Ur-Kalanna oni eksponas la malsanulojn sub unu pordo de la urbo. La pasantoj demandas pri la simptomoj kaj pri la provitaj kuraciloj. Ĉiam troviĝas iu, kiu, spertinte la saman malsanon aŭ koninte malsanulon simile trafitan, indikas la efikan kuracadon.

Helpate de Rifat, ŝi portis Sulaj'on al la loko de la kampo, ĉe kiu pasis plejofta amaso. Ŝi sternis lin sur maton kaj metis sub lian kapon unu el tiuj kurbaj taburetoj, kies konkavaĵo servis kiel kapkuseno.

Pluraj sin deturnis, ŝajnigante ke ili ne vidis la pacienton, forirante per pli urĝa paŝo. Nuntempe, estas kontagaĵaj malsanoj, kiujn ne ĉiuj alfrontas kun sama kuraĝo ; tiam estis nesatigeblaj demonoj, kiuj volonte forlasis konsumitan predon por sin ĵeti sur sanan homon, nutraĵon pli abundan kaj pli bongustan. Tiel, soifanta animalo forlasas la duone elĉerpitan kaj malklarigitan fonton por fonto pli freŝa.

Aliaj, pli kompatemaj, pli bravaj aŭ pli scivolaj, alproksimiĝis kaj demandis Tel-Loh'n.

- La preĝpetegoj fiaskis, diris maljuna virino. Kiuj ? Ĉu ci igis cian amikon reciti la sorĉalvokon al la sep demonoj ? Ĝi estas tre potenca. Sed la sorĉo de Eridu havas ankoraŭ pli da efiko.

- Diru la sorĉon de Eridu, bonfara patrino, kiun benas mia penso kaj mia parolo.

- Jen, ho plej bela kaj plej dolĉa el la junaj virinoj. Ci prenas la lanon de juna ŝafino ankoraŭ nescianta pri la virŝafo. Poste sorĉistino - ci bone aŭdas? sorĉistino, ne sorĉisto - ligas tiun lanon al la temploj de la malsanulo, dekstre kaj maldekstre. Ŝi metas du trionojn maldekstren, unu trionon dekstren. Necesas, ke la nodo estu farita sep fojojn sinsekve. Kaj la sep

nodoj estu faritaj dufoje. Poste ci streĉas ŝnuron ĉirkaŭ lia kolo, ŝnuron ĉirkaŭ ĉiu el liaj membroj. Ĉar konvenas kateni lian duan memon, kiu povus voli elŝteliĝi. Kiam ĉiuj ĉi antaŭzorgoj estas faritaj, ci verŝas sur lin la magiajn akvojn. Kaj li resaniĝas.

Aŭskultinta maljunulo siavice ekparolis :

- Iafoje sukcesas la sorĉo de Eridu. Sed kio ĉiam sukcesas, tio estas la envulto. Mi tion scias pro sperto : ĝi savis min el tri malsanoj, kaj ĝi resanigis du el miaj filoj. Jen estas la plejbona envulto : ci prenas argilon kvazaŭ ci volus fabriku brikojn ; sed ci formas el ĝi homan figuron. Sur tiun homan figuron ci verŝas oferon da pura vino, dirante : "Ekde nun, argila figuro, ci jam ne estas argila figuro, sed ci estas Sulaj kaj la malsano de Sulaj." Poste ci recitas sorĉon, kiun skribitan sur tabuleto mi donos al ci. La malsano forlasas la homon el karno kaj transpasas en la statuon. Rapide kaj profunde ci enterigas la statuon kaj la malsanon, tiamaniere ke la malsano jam ne povu resupreniri sur la teron.

Sed junulo laŭdis alian rimedon :

- Mi estis pli proksime ol Sulaj al la pordo de la morto. Mia patrino kunmiksas sep diversajn specojn de ligno. Kaj ili estis ligno de saliko, ligno de palmo, ligno de kano, ligno de lentisko, ligno de rozujo, ligno de hedero kaj ligno de klematido. Ŝi pistis ilin kune kun peco de serpento. Ŝi aldonis vinon el vito kaj iom da virkapra viando. El ĉio ĉi ŝi faris paston, kiun mi glutis. Mi vomis tiun paston. Kun tiu pasto mi vomis amaran galon . Kun la pasto kaj la galo mi vomis la sorĉon. Poste mi dormis. Je mia revekiĝo, mi estis resanigita. Nun, jen mi estas pli fortika ol mi iam ajn estis.

Tel-Loh hezitis inter la diversaj sistemoj, kiuj ĉiuj ŝajnis havi ion dian, kiuj ĉiuj estis sukcesintaj, kiuj ĉiuj estis laŭdataj kun akra kaj dankema konvinko.

Ŝi fine decidis pri la lasta. Ĝia avantaĝo estis, ke ĝi pli diferencas de la procedoj de Purnapurjas, potencaj en certaj okazoj, tion ŝi sciis, sed ŝi vidis ilin senefikaj kontraŭ la malsano de Sulaj.

Ŝi trovis sen tro da klopodoj la indikitajn lignojn.

La junulo mem alportis la altvaloran pecon da serpento. Estis vino en la ĉaro, kaj ŝi ricevis de amikino la virkapran viandon.

Nu, dum ŝi pistis la bonfarajn ingrediencojn, Sulaj eligis grandan krion. Ŝi alkuris. La lipoj estis duone malfermitaj ; la okuloj, larĝaj kaj fiksjaj, ŝajnis mirantaj pri nekonita spektaklo. Ŝi proksimigis manon al la buŝo : el ĝi eligis neniun spiro. Ŝi metis sian manon sur la maldekstran flankon de la brusto : nenio batis.

Tiam, kiel estis ŝia devo en neĉeesto de iu parenino, ŝi komencis eligi longajn ululadojn. Ŝi disŝiris sian robon. Ŝi gratvundis siajn vangojn kaj sian bruston. Kaj ŝi kovris sian kapon per fluantaj cindroj.

Rifat mallaŭdis tiujn troajn elmontradojn. Sed Tel-Loh asertis :

- Tiel estas farate. Tio estas farata ĉe ĉiuj piaj popoloj, en Egiptio kiel en Kaldeo.

Kaj ŝi rekomencis siajn furiozajn hurladojn.

Alkuris najbarinoj. Ili helpis Tel-Loh'n por parfumi la kadavron, ĝin volvi per ŝtofendoj per bitumo ŝmiritaj. De la plej proksima potisto oni alportis la du ritajn longajn ĵarojn. Sulaj estis en ili enfermita kun la funebra akompanaĵo. Oni lutis per nafto la junton de la du vazoj.

En Tel-Loh miksiĝis la sango de Misraim kaj la sango de Akado. Sed, krom per la longatempe forgesitaj rakontoj de ŝia avino, ŝia edukado estis tute kaldeana. Ĉar Rifat amis ŝin pro ŝia nesimileco al la aliaj virinoj de Mezopotamio, ŝi per instinkto, favore al sia amo, revekis la Egiptinon, kiu dormis en ŝi. Nun, ne temis pri Rifat. Fronte al la morto de la kaldeano Sulaj, ŝi retrovis sin plene kaldeana. Ŝi pensis, sentis, agis same, kiel estus sentintaj, pensintaj, agintaj Halalat aŭ Mannutammat.

Bone traktita, Sulaj ŝin protektos kaj protektos la tre amatan. Sed, se la ritoj ne estus plenumitaj kun sufiĉa zorgo, Sulaj, suferante pro kulpo de Tel-Loh, fariĝus malamiko de Tel-Loh kaj de ĉio, kion amas Tel-Loh.



Ankoraŭ pli ol pro timo, ja pro kompato ŝi estis emociita. Precipe ŝia bonkoreco metis en la ĉerkon el bakita argilo la instrumentojn, la armilojn, la nutraĵojn. Ĉar, senpovaj por havigi al si mem la necesaĵojn, la mortintoj estas senkompataj unuj al aliaj. Avara kiel malsatulo, neniu konsentos plej etan almozon al senigita kadavro. La dua memo de sentomba aŭ malbone entombigita mortinto vagadas, kompatindega kaj kruela, tra urboj kaj kampoj. Ĝi pluekzistas nur per rabado kaj krimoj. Ĝi sin ŝovas en la domojn aŭ en la tendojn. Ĝi sin rivelas al la loĝantoj per hororaj aspektoj, kaj ilin frenezigas. Ĝi impetas al vivulo, kapon ĉe kapo, manojn ĉe manoj, piedojn ĉe piedoj. Tiu, kiun ĝi blokas, homo aŭ besto, ne ĉiam sukcesas eskapi de ĝi, eĉ per la plej potencaj helpoj de magio. Vampiro estas unu el tiuj teruraj demonoj, kiujn ne ĉiam forpelas la alvokoj al la dioj aŭ la petegoj al la duaj memoj de ĉielo kaj tero.

Ŝi klarigis tiujn aferoj al Rifat. Kaj dume ŝi zorgeme plenumis ĝis la plej eta rito.

Rifat demandis :

- Kiel estus eblaj la aferoj, kiujn ci diras ? Kiel ci povas timi, ke la mortinto estu sur la tero por persekuti la vivantojn, kaj samtempe kompati lin, ke li estas en la regno de Nikingal-Allat, malantaŭ la sep pordoj, kiujn oni ne trapasas, persekutate de la demonoj ?

Poste eble, en kvieta horo, ŝi komprenus la kontraŭargumenton. Ŝi siavice mirus pro la kontraŭdiroj en la frenezaj mensogoj de la pastroj. Kaj ŝi ruĝiĝus pro sia hodiaŭa timego.

Sed nek ŝi nek Rifat divenus, ke pastra religio estas disfalanta kunmiksaĵo de materioj el diversaj devenoj. Nek ŝi nek Rifat suspektus, ke la pastroj de Kaldeo hazarde kunigas, kiel egale profitdonajn kaj ekspluateblajn, la krudajn superstiĉojn de la Ĥamidoj, la kulton al la spiritoj naive elpensitan de la Sumeranoj kaj la adoron al la astroj, naturan al la naturaj astronomoj, kiuj estis la Akadanoj.

En tiu horo, tute korkontuzita de kompato kaj timego, ŝi estis nekapabla pri ia rezonado. Eĉ racio ŝajnis al ŝi frenezo kaj vundo. Ŝi diris preskaŭ malmilde :

- Estas cirkonstancoj, en kiuj konvenas, ke oni lasu

paroli nur sian koron.

Kaj, lasante paroli siajn paroksismigitajn nervojn, ŝi rekomencis hurlante ripetadi :

- Ho ve, Sulaj... Ho ve! povra, povra, povra amiko!

Kaldeanoj kaj kaldeaninoj kunvenis en la tendo kaj apud la tendo. Iliaj krioj respondis al la krioj de Tel-Loh, iliaj ĝemoj ŝajnis multoblaj, nenombreblaj eĝoj de ŝia ĝema voĉo, ili ĥore hurlis post kiam ŝi hurlis. Rifat, kun la kapo pezigita per la bruego, kredis aŭdi la teron mem, la meblojn, la flirtojn kaj klakojn de la tendo ripeti :

- Ho ve, Sulaj!... Ho ve, Sulaj!

## Ĉapitro VII.

# La Laboro de la Popoloj

Kvankam la vojaĝo kutimigis ilin al multopaj amasoj, proksimiĝante al la ebenaĵo de Sennaar, vidante kiom da fluoj kaj amasoj da homoj, pelataj de aliaj ondoj, urĝiĝis al tiu maro da homoj, Rifat kaj Tel-Loh estis kva-zaŭ diluitaj de miro. La Arjo provis diri siajn malnov-ajn miriĝojn perditajn en la supermezuro de la nova frenezetigo :

- Ni estis du gutoj inter la fluado de la vasta Eŭfrato. Sed nia riverego mem, ĉu ĝi ne fariĝas, en tiu oceano da popoloj, simila al povra akvoguto ?

La diverseco de la korpoj, de la koloroj, de la manieroj, de la lingvoj, de la kostumoj ĝoje emociis lin sur la vojo. Ĉi tie ĝi fariĝis doloro kaj ŝiranta frenezigo. Ĉu la plej frateca strebado sukcesos transformi tiun pe- non en plezuron, tiujn mil interbatojn en larĝan kareson?

Kio iom similis al io jam vidita ĉarmis lin per pacigo kaj familiareco. Sed tro da novaĵoj, oni emus diri abso- lutaj, kune atakis lin. Iam li ĝemis, kiel oni vomas amaraĵon :

- Trinki, jes ; drinki ĝis ebrio. Sed ne droni !

- Ci sufokiĝas - replikis Tel-Loh - ĉar ci volas trin- ki tro rapide.

La unuajn tagojn, ama hasto inklinis lin viziti mult-ajn tendarojn. Urĝis al li distingi la diversajn rasojn. Baldaŭ li estis homo, kiu, rigardinte tro da lumoj, sen- tis, ke ĉirkaŭ lia kapo turniĝanta pro vertiĝo la lumoj miksiĝas, turniĝanta blindigo, kaj konfuziĝas. La vund- itaj okuloj de lia spirito sin fermis, kiel oni fuĝas. Tel-Loh, malpli gluteme impetinte al tiu scienco, rekonis pli bone ol li la originon de la renkontitaj homoj.

Filino de tiu Mezopotamio, kava deversuĵo de homoj,

en kiu, jam antaŭ la entuziasmo por la Turo de l' Popoloj, najbaris laŭdire okdek diversaj rasoj, ŝi havis super li aliajn avantaĝojn.

En la palpebrumiga bunteco de la ebenaĵo de Senaar, ŝi senhezite signis al li la devenanton de Malgranda Azio, kuntreniĝanta robo, longa barbo, ronda turbano sur razita kapo ; - la afrikanon kun ebonkolora haŭto, haroj el nigra lano, korpo zonita per blanka aŭ blua zonvesto, kolieroj el konkoj, brakringoj el koralo. Jam ŝi estis instruinta lin pri la Akadanoj, la Sumeranoj, la Ĥamidoj, la nomadoj, prapatroj de la estontaj Hebreoj, kaj dudek specoj de Turananoj aŭ de Kuŝitoj.

Tamen Rifat instruis ŝin pri la diversaj skitaj rasoj. Li konis tiujn, kiuj en plata vizaĝo havas malgrandajn angulformajn okulojn ; ankaŭ tiujn, kies ovala vizaĝo, kun neta elstaro, en kiu rabobirda nazo antaŭenigas sian maltiman promontoron, estas lumata de grandaj blujaj okuloj.

Sed ili egale hezitis fronte al malaltaj homoj kun pinta ĉapo, kun rakedaj ŝuoj ; fronte al masivaj nudaj estuloj, kies akra odoro iritis la gorgon, kies fumanta haŭto ŝajnis bruligonta tiun, kiu ĝin tuŝus ; - fronte al homoj kun strange dupinta/dukorna kapvesto, kiuj portis, inter la abundaj haroj de sia brusto, malgrandajn idolojn. - Kiu estis ankoraŭ tiu ĉi, kun flavbruna haŭto kaj kapvesto el plumoj ? - De kie venis tiu alia, kun flavaj haŭto kaj robo, oblikvaj okuloj, pendanta harplektaĵo ? - Ankaŭ nekonata tiu, kies nazo estis traborita per ringo, kaj kies tute nuda korpo estis ombrata per larĝa ĉapelo el palmofolioj. - Stranga popolo, rifuzanta tendojn kaj domojn, rifuzanta kuŝi sur litoj, sur matoj aŭ sur la nuda tero, sidis ĉiunokte en la arboj. Viroj, virinoj aŭ infanoj, tiuj estuloj kun simiaj moroj prezentis kalvan kapon, senharan vizaĝon, kaj nenie sur ilia monotona korpo kreskis plej eta haro. Ilia plata nazo ŝajnis profundiĝi malantaŭ la elstaro de tre forta mentono antaŭeniĝanta kiel la beko de iuj ŝipoj.

Malsamaj laŭ korpoj, laŭ lingvoj, laŭ moroj, laŭ kostumoj, tiuj estuloj estis kuniĝintaj en unu loko, en sama sento kaj por sama celo. Ĉiuj estis entuzias-

maj masonistoj de la Turo de l'Popoloj.

Tiu turo starigis en pluraj spiritoj fantaziegajn esperojn. Kelkaj pelis sian naivecon ĝis la kredo, ke de sur la supro ili tuŝos per sia emociata mano aŭ per sia orgojla kapo la solidan volbon de la ĉielo. Eĉ ĉe la plej krudaj, ĝi tamen restis simbolo de liberiĝo kaj voko al libero. Ĝi supreniros tra la nuboj, ĝoja krio de tiuj, kiuj ne plu obeas al la pastroj kaj al la reĝoj, fiera kaj kontaga konsilo ne plu obei al la reĝoj kaj al la pastroj. Ĝi estis ankaŭ la monumento de la universala frateco, la signo de la unueco, kiun la homoj sentis inter si sub la riĉaj aŭ vundantaj diferencoj.

Kun kia ardo laboris tiuj propravalaj laboristoj ! Unuj, en dors- aŭ mankorboj, alportis materiojn : modl-argilo, brikoj, ŝlimo kaj bitumo. Aliaj hakis la pajlon, kiu donas al la cemento el bitumo aŭ ŝlimo fidelan teniĝemon. Jen iuj, kiuj plektas la kanmatojn, kiujn oni metos, po ĉiu trideka tavolo, inter la rangojn el brikoj. Jen iuj, kiuj fervore havigas kaj poluras la lignomuldilojn, ĉiam tro malmultajn laŭ la deziro de la muldistoj. Oni donas al ili diversajn formojn. La plimultaj, kvadrataj, dividas la argilon je brikoj de dek-unucolaj lateroj kaj unucola diko. Sed la brikoj destinitaj por formi la eĝojn ricevas triangulan formon. Tiuj, kiujn oni uzos por la volboj havas aspekton de kojnoj. Ĉar la Turo de l'Popoloj, tia, kia Ner, la kaldea giganto, portas ĝian planon en sia potenco kapo, ne estos banala zigurato masiva, sen ia aperturo. Ĉiu etaĝo ofertas, ombran mildecon, misteron kaj ŝirmon. Eĉ inter la kvadrataj brikoj, la laboristoj faris diferencojn. Tiuj de pala ruĝo, duone bakitaj, utilis nur por la mezo de la grandaj masoj. Pli prizorgitaj kaj pli malmolaj, la nigre bluaĵaj ĉirkaŭis la unuajn. Sed eksponitaj al la aeroj estos nur aliaj brikoj, ankoraŭ pli altkvalitaj, kiuj estis dubeflave blankaj.

Iuj materioj venis de malproksime, kaj necesis tuta semajno por alporti la bitumon kolektitan en la rivero Is.

Tuj kiam ili ne plu vidis la komencon de la Turo, nostalgio ekkaptis la laboristojn. Hastante al ĝi kiel patrino al sia suĉinfano, ili revenis kun duona ŝarĝo. Neniu konsentis fari sinsekve du vojaĝojn. Post foresto,

ili bezonis labori longatempe en la radiado de forto kaj amo, kiu ŝajnis eliĝi el la konstruaĵo.

La plej ĝojaj estis la masonistoj. Kun kia ĝoja diligento ili flegis sian laboron ; kun kia tenera, volupta zorgo ili metis la brikon ekzakte sur la duonojn de du subaj brikoj, respondigis ĝian precizan mezon al la junto de la du aliaj.

Tamen en la transportoj oni kolektis florojn de frateca ĝojo. Oni ripetis al si : "Por la Turo de l' Popoloj mi laboras". La akcepto de la homoj restintaj en la vilaĝoj donis energion kaj kuragecon. Ĉie oni estis aklamataj, kovrataj de karesoj, ŝarĝataj de nutraĵoj. Tuŝante tiujn, kiuj venis de la apudo de la Turo, la plugistoj kredis tuŝi la Turon mem, kaj ili sentis sian koron eksalti pro amemo.

Tuj kiam la tero lasis al ili libertempon, tiuj kamparanoj venis, kantante kaj dancante, ĝis la tendaroj. Ili alportis la aferojn necesajn al la vivo, greno, pano, viando, freŝaj daktiloj, sekaj daktiloj, pulvoro el daktiloj, daktilvino kaj daktilmielo. Ili diris kun ekzalto : "Ankaŭ ni laboras por la Turo de l'Popoloj."

Tiuj malavaraj estuloj ne estis la solaj, kiuj vizitis la tendarojn. Alkuradis vendistoj, longaj karavanoj de dromedaroj, de senfinaj defiloj da muloj, de fortikaj cedrolignaj ĉaroj. Ili venis de foraj kaj diversaj lokoj. Sed la plimultaj eliris el du insuloj en la Eritrea maro, Arad kaj Tilos. Ili estis elturniĝemaj homoj, kiuj, kelkajn generaciojn poste, forpelitaj de tertremo el sia unua nesto, konstruos Tiron, Sidonon, ĉiujn havenojn ĉe la marbordo de Fenicio. Kiel la idoj de Sumero, ili havis kurban nazon, belfendajn okulojn, abundajn malhelajn harojn. Sed ili ne ondigis siajn kapharojn kaj ne aranĝis la nigron de sia barbo laŭ ellaboritaj etaĝoj. Oni diris ilin voluptemaj kaj kruelaj. Oni pretendis, ke tuj kiam ili sentas sin pli fortaj, ili rabas anstataŭ aĉeti. Eĉ oni akuzis, ke ili kaptas virinojn por vendi ilin fore kiel sklavinojn.

Ili sin montris babilemaj kaj fanfaronaj. Ili mensogis en ĉiuj lingvoj, per mensogoj kaj poeziaj kaj

kalkulitaj. Ili laŭdis kiel mirindaj la plej ordinarajn varojn. Ili timigis per ĥimeraj danĝeroj iun ajn, kiu emus ilin imiti. Iliaj paroloj kovris per dika kaj kolora vualo la sekreton de iliaj veturvojoj kaj de la produktolandoj. Lertaj kaj ŝanĝigantaj ruzoj, kiuj ankoraŭ nun erarigas nin, ne permesas certe identigi la orientan landon, kiun ili nomis Ofir, la okcidentan, kiun ili nomis Tarsis. Sisteme ili semis falsajn noci-  
ojn, kulturis legendojn. Poste, eĉ al la vojaĝantaj Grekoj, ili kredigis, ke oni trovas ĉe la bordo de Pado tiun sukceon, kiun ili kolektis ĉe la baltaj marbordo-  
j. Nuntempe ankoraŭ neniu divenas, de kie venis\* la stano necesa por la bronzo, kaj ĉu iliaj Kasiteritaj insuloj estis vere teroj per akvo ĉirkaŭataj, aŭ montoj enfermitaj en la nebulo nur de valoj.

Ili prezentis preskaŭ ĉiujn varojn kiel ĉerpitaj el maraj insuloj, el vastaj perfidaj dezertoj perditaj inter la maraj teroj. Pri la danĝeregoj de la navigado ili multigis terurajn rakontojn. Estas abismoj, en kiujn ĉio glutiga, insuloj, kiuj sinkas en la ondoj kiam oni proksimiĝas al ili, aŭ, pli malice, atendas por sinki ĝis oni penetras for de sia ŝipo. Moviĝantaj rokoj, inter kiuj oni kredas esti glitonta kun ĝustatempa rapido, fermiĝas sur homon kiel manoj sur muŝeton, kaj preme-  
gas lin.

En la plej bonaj insuloj de la maro, en tiuj, kiuj konsentis ne sinki sub la malgranda pezo de homo, la nocaj bestoj estas pli multaj kaj pli teruraj, ol vi povus imagi. Tie la rigardo de leono kaj tiu de serpento fascinas la homojn. Se certaj antilopoj ekvidas homon, li restas ŝanĝita en ŝtonon. Ulnolongaj skorpioj strekas ĉirkaŭ homo cirklon, kiun li ne povas transiri. Iuj estaĵoj estas tiel malsanigaj, ke oni ne vidas ilin sen morti, kaj neniu vivanto povas priskribi ilian ordinaran aŭ strangan formon.

La fabeloj pri la maniero havigi al si varojn estis iafoje ĝoja ŝerco aŭ gaja paradokso. La plej delikataj parfumo-  
j estas kolektataj de sur la barbo de fetoraj virkaproj, de kiu ili pendis kiel malpuregaĵo.

---

\* La stano troviĝis en sudokcidenta Anglujo (Kornvalo)  
Noto de la Lit. Komitato.

Sed la plimulto el la riĉaĵoj estas danĝeraj konkeroj. La incenso estas ĉerpata el arbusto, en kiu svarmas aparte venenaj flugilhavaj serpentoj. La kasio elvenas el lago, ĉe kiu svarmas speco de sangavidaĵaj vespertoj.

Precipe estas multekoste gajni la oron de Ofir. Ĝi estas gardata de grifoj. Nu, ĉu vi scias, kio estas grifo? Kvarpiedulo armita per ungegoj de leono. Sed ĝia dorso portas flugilojn. Ĝia brusto estas ruĝa, ĝiaj flugiloj estas blankaj, ĝia kolo estas blua. Kaj la timinda trikolora monstro havas aglan kapon. Dum ĝiaj ungoj de leono disŝiras vian korpon, ĝia beko de aglo krevigas viajn okulojn, poste malfermas vian kapon kiel maturan granaton. En ĉiu malhela faldo de monto, en kiu kaŝiĝas peco da oro, vi estas certa renkonti neston de grifoj.

Oro troviĝas ne nur en la montoj, en formo de pecoj aŭ gruzeroj defendataj de grifoj. En kelkaj dezertoj ĝi estas miksitaj, brila pulvoro, en la sabloj, kiujn amasigas, por fosi sian loĝejon, nekredebla speco de formikoj. Ĉu vi rimarkis la timindan forton de la formikoj? La plej malgranda portas dudekoble sian pezon kaj triumfas kontraŭ bestoj dudekoble pli grandaj. Nu, tiuj, kiuj fosas siajn subterajn galeriojn en orsabloj ne estas etaj kiel la formikoj, kiujn vi konas; ili superas la grandon de vulpo, preskaŭ atingas la grandon de hundo. Ilia malico estas terura; ilia rapido en kurado, nekredebla. Ni rabas ilian sablon sub la plej arda varmo, en la horo, en kiu, en la lastaj profundoj de siaj kuŝejoj, ili sinkas en la plej profunda dormo. Kun trema hasto ni plenigas niajn sakojn, per ili ŝargas la plej rapidajn kamelojn, ni eksaltas apud niajn necertajn riĉaĵojn, kaj ni rapidege fuĝas. Tuj vekiĝinte, la grandaj formikoj pelos nin laŭspure, kiel ĉashundoj pelas ĉasaĵon. Se nia plifrueco estas nesufiĉa, se ilia armeo nin atingas, ve al ni! La tuta karavano, homoj kaj bestoj, estas destinita al morto.

Kiam en la dezerto vi renkontas unikornon, gardu, ke vi ne pelu ĝin. Vi rekonos ĝin laŭ ĝia blanka korpo kaj ĝia ruĝa kapo. Vi rekonos ĝin precipe laŭ ĝia unika korno, kvar ulnojn longa, blanka ĉe la bazo, nigra



en ĝia mezo, ruĝa ĉe la pinto. Neniu animalo estas pli forta ol la unikorno. La galopo de la plej bona ĉevalo estas, kompare kun ĝia kurado, trenado de testudo. Tamen ĝi komence fuĝas de vi malrapide. Ĝi volas, ke via espero ĝin pelu. Tuj kiam vi proksimiĝas, ĝi hastas; poste ĝi sin returnas, kaj ŝajnas vin atendi. Tiel ĝi kuntrenas vin en izolejon. Fine ĝi sin ĵetas al vi. Ĝia impeto renversas vin kaj renversas vian rajdobeston. Per siaj dentoj, per siaj piedoj, per sia korno, ĝi frapas. Ĝi disŝiras kaj pistas la du kadavrojn.

La taŭrojn kun homa kapo vi renkontas, en Kaldeo, nur el glazuritaj brikoj ĉe la urbopordoj. Tamen Mezo-potamio iam konis ilian timindan vivon. Iam ili konstante trakuris la kamparojn, tie disvastigis morton, teruron kaj ruinon. Heroo Isdubar detruis ilin. Li detruis ankaŭ la homojn-skorpiojn kaj tiujn satirusojn, kiuj, embuskante en la dezerto, nur seksperfortis la pasantinojn, sed mortigis la pasantajn virojn, post kiam ili perfortis ilin... Ho ve! eĉ heroo ne iris en la insulojn de la maro. Tial vi plu devas tie defendi vin kontraŭ la mortiga stringado de la satirusoj, kontraŭ la pikado de la homoj-skorpioj, kaj kontraŭ dek specoj de monstroj kun homa kapo.

La plej timinda inter tiuj ĉi estas la martiĥoro, kiun oni ankaŭ nomas la hommanĝanto. Densa hararo, ruĝa kiel cinabro, kovras ĝian korpon pli grandan ol tiu de la plej grandaj leonoj. Ĝia vizagego, eĉ antaŭ ol ĝi malfermas sian buŝon armitan per tri vicoj da segilformaj dentoj, estas minaca kiel kolero de reĝo. Ĝia vosto portas mil pikilojn pli mortigajn ol venenitaj sagoj; ĝi ĵetas ilin al vi, ĉu vi estas malantaŭ ĝi, ĉu ĉe iu el ĝiaj flankoj. Se vi troviĝas antaŭe, ĝiaj pikiloj pasas super ĝia kapo por vin frapi.

Rifat ne aŭdis tiajn rakontojn sen ia incitiĝo. Li diris:

- Tiuj vendistoj estas mensogemaj kiel pastroj.
- Eble - ridante respondis Tel-Loh - pastro estas vendisto.

La harmonia paro sin deturnis de tiu avida kaj malnobla homaro, reiris al la grandanimeco de la masonistoj kaj helpmasonistoj, plonĝis en banon de frateco.

Ilia ĝojo aŭskultis la amikajn parolojn de tiuj homoj. Ili admiris, kiel, ĉi tie, ĉiuj rasoj sin amas kaj komprenas reciproke. Komence, la laboristoj de diversaj lingvoj sin interkomprenis nur per la rigardo, per la rideto, per la gesto, per la bonvolemo. Nun ili havis komunan parolmanieron, specon de sabiro\*, kiun kelkaj entuziasmoj laŭde nomis : la lingvo de la homoj, aŭ simple kaj eminente : la Lingvo. Ili asertis, tiuj entuziasmoj, ke la estonteco adoptos la solan lingvon de la Turo. Samkiel jam ne estis materiaj limoj inter la homoj, kiuj amis unu la aliajn sur la ebenaĵo de Sennaar, ne estos plu limoj inter la lingvoj, sed ĉiuj parolos la parolon de amo. Inter tiuj, kiuj diris tiujn esperplenajn vortojn, kelkaj aldonis, ke la komuna lingvo estos esprimilo de komunaj kredoj. Nomadoj idoj de Sem proklamis : "Estos samaj dioj por ĉiuj homoj."

Volonte masonistoj kaj helpistoj ritmis sian laboron per kanto. Ifoje ili kantis, ĉiu en sia lingvo, klerajn kantikojn verkitajn de iliaj profetoj. Pli kaj pli ofte ili kantis, en la komuna lingvo, kantojn, pri kiuj oni ne sciis de kiu kaj kiel ili estis faritaj. Malgraŭ la elementa kaj senstruktura karaktero de la lingvo, tiuj popolaj verkoj ofte brilis per simpla, kaj, se tiel diri, krude frateca beleco.

Laŭ sama ario, per la samaj vortoj - sed la prononcoj restis apartaj kaj diversaj - la laboristoj kantis :

"Ni estas la popoloj, kaj tiel longe, kiel la popoloj estas en akordo, ili nenion devas timi de la reĝoj.

"Se la reĝoj estus bonaj, ili amus la harmonion inter la popoloj. Sed la reĝoj estas malbonaj, kaj ili timas la harmonion inter la popoloj.

"Ni estas la homoj, kaj tiel longe kiel la homoj estas en akordo, ili nenion devas timi de la dioj.

"Iuj dioj, kiuj estas bonaj, amas la harmonion inter la homoj. Iuj dioj, kiuj estas malbonaj, timas la harmonion inter la homoj.

"Ni konstruas la Turon de l'Popoloj, la Turon de l'Homoj, la Turon de l'Fratoj, la Turon de la akordo kaj de la harmonio.

"Niaj idoj kaj la idoj de niaj idoj venos en pia

pilgrimado, de generacio al generacio, en la ebenaĵon de Sennaar. Ili rigardos la altan Turon : iliaj rigardoj supreniros, kaj iliaj koroj supreniros.

"Kaj ili aŭskultos tion, kion la alta Turo diras al la kvar ventoj de la ĉielo.

"La Turo diras al la kvar ventoj de la ĉielo vortojn, kiujn la kvar ventoj de la ĉielo rediros al la tuta tero.

"La alta Turo diras al la kvar ventoj de la ĉielo, kaj la kvar ventoj de la ĉielo rediras al la tuta tero: "La popoloj estas fortaj tiel longe, kiel la popoloj estas en akordo. La homoj estas nevenkeblaj tiel longe, kiel la homoj restas en akordo. Eĉ neniu aŭdacas ataki la grandan fratan familion, tiel longe, kiel la granda familio restas akorda kaj frateca.

"Tiel longe kiel la popoloj estas en akordo, tiel longe kiel la homoj estas en akordo, ĉiu popolo estas grupo de fratoj, kaj ĉiuj homoj faras familion de fratoj.

"Kaj neniu povas ion kontraŭ ili, kaj neniu aŭdacas ilin ataki, kaj ili faras, kion ili volas.

"La patroj, de generacio al generacio, instruas al la filoj tion, kion la Turo diras al la kvar ventoj de la ĉielo, kaj ke la Turo diras al la kvar ventoj de la ĉielo la solan veron.

"Kaj la filoj estos fratoj inter si, kiel la patroj estas fratoj inter si.

"La homoj ĉiam scios la solan veron, la popoloj ĉiam scios la solan veron, la patroj kaj la filoj ĉiam scios la solan veron, la generacioj marŝados sur la vojo de la sola vero.

"Kaj ne estos plu reĝoj, kaj ne estos plu pastroj, kaj tiuj inter la dioj, kiuj estas bonaj, ĝojos.

"Sed tiuj inter la dioj, kiuj estas malbonaj, eble fariĝos bonaj kiel la homoj. Kaj se ili ne fariĝos bonaj kiel la homoj, ili afliktiĝos, ĉar ili nenion povos kontraŭ la homoj.

"Tiu kanto ne estas farita en nenifarado. Tiu kanto estas farita dum portado de bitumo, dum knedado de argilo, dum muldado de argilo, dum bakado de argilo, dum hakado de pajlo, dum metado de ĉiu briko sur du brikojn, kiel infano sin apogas sur sia patro kaj sur sia patrino.

"La homoj ĉiam kantados tiun kanton farante laboron, kiu kaŭzas bonon al kelkaj, aŭ kiu kaŭzas bonon al ĉiuj, farante laboron, kiu kaŭzas malbonon al neniuj."

## Ĉapitro VIII.

# La Profetoj

Ofte, en la tago, la profetoj laboris inter la masonistoj kaj la helpistoj. Ili kantis kun siaj kunuloj. Iafoje subita inspiro envenis en ilin. Ili estis levitaj al la ĉielo, kvazaŭ grandigintaj, kun la okuloj en ekstazo, la manoj etenditaj supren ; iliaj lipoj, kiuj ne ŝajnis plu homaj, lasis flui, kiel la lirika abundo de la fontoj, la klaron de la komunaj sentoj. Klaraj vortoj diris la ardon al laboro, la malŝaton pri la servuta estinteco, la liberajn kaj lumajn esperojn ŝprucantajn al la estonteco. Nu, la estinteco, en ĉiuj iliaj paroloj, estis nomata : la nokto ; la estonteco, en ĉiuj iliaj paroloj, estis nomata : la tago.

En la unuaj tempoj, irante de grupo al grupo, ili provis paroli la diversajn lingvojn, aŭ ili esprimiĝis en la komuna lingvo. Sed la fremdaj idiomoj estis ribelaj al ilia buŝo. Ilia elokvento sin disŝiris en ili, ridinda kiel la vestoj de infano, kiu trairas dornejon. Naive, la simpluloj gajiĝis, kredante, kiam oni volas ebriigi ilin per noblaĵo, ke oni penas eksciti ilian ridon. La komuna lingvo, bonega en la praktiko, rifuziĝis al ĉio, kio estas penso. En la buŝo de la profetoj, ĝi ankaŭ repuŝis la gracion aŭ la potencon de la sentoj. Nur la simpluloj iafoje sukcesis, ne sciante kiel, havigi al ĝi la indon kaj la flamon de amo.

Post malgranda nombro da maltrafaj provoj, ĉiu profeto do resignaciis paroli nur al la popoloj de sia raso kaj al la malmultaj homoj, kiujn ia inklinio allogis al fremda tribo.

Vespere, la profetoj kunkolektiĝis. Same kiel ĉiuj simpluloj komune metis sian penadon por fari unikan monumenton, ili strebis komune meti siajn mil saĝojn por fari el ili unikan saĝon, kiu supreniros ĝis la ĉielo.

La profetoj malbone sukcesis reciproke sin riĉigi.

Ĉiu akuzis pri malriĉo la lingvon kaj la penson de la aliaj. Ĉiu strebis konvinki kaj persvadi la aliajn. En tiu strebado al konkero, en tiu strebado malharmonia kiel batalo, la vortoj de la saĝuloj sin interfrapadis tiel akre, kiel iam la armiloj de iliaj popoloj.

Rifat estis la malplej akra en la diskutado. Neniu kun tiel profunda sincereco provis kompreni la najbaran spiriton. Tamen, en la sekreto de lia koro, ĉu neniam okazis, ke li akuzis pri stulteco iun koncepton, kiu estis ne pli stulta ol iu el liaj konceptoj? Ifoje aŭdata argumento ŝajnis al li ne proponenda en bona fido, kaj li mem, la antaŭtagon, en tuta naiveco, estis analoge rezoninta.

Nur pro ama indulgemo li deklaris belaj la lingvojn de la idoj de Sem kaj de la idoj de Ĥam. Lia parolo ne nomis plu la fremdulojn, kiel iam antaŭe la parolo de la popolo, balbutantoj, konfuzaj parolantoj, duonmutuloj. Malgraŭ lia tuta bonvolemo, ĉu lia profunda penso neniam aplikis al ili tiujn malŝatajn nomojn? La malperfektaĵoj konstatitaj en la aliaj idiomoj plenis lin je orgojlo pri la arja lingvo. Ĉio, kion povis lia frateca sento kaj lia alligiteco al la paco, estis igi tiun orgojlon silenta.

Komparante sian lingvon kun tiu de la idoj de Sem kaj de la idoj de Ĥam, li kredis juste ĝin nomi interne de si, kiel liaj patroj ĝin nomis laŭte: la lingvo de la dioj.

Ĉu li estis malprava?

Ĝi estis mirinda, tiu lingvo, en la intenseco de libera vivo, ignoranta la ridindajn ligilojn de la gramatiko. Lingvo bezonas esti maljuna por konsenti kredi sin en infaneco, por akcepti la limojn kaj meti sian konfidon en akademiajn ĝenojn. La parolo de Rifat ignoris ne nur la subtenilojn, la randkusenetojn kaj la lambastonojn; ĝi ignoris ankaŭ la vojojn. Ĝia harmonio marŝis aŭ dancis inter la kampofloroj, spontanea kiel virgulina gracio, forta kaj supla kiel la libero. Admirinde sinteza, la frazo en ĝi sin mem aranĝis, certa kiel arbo, kiu metas en ilia ĝusta loko la radikojn, la trunkon, la branĉojn, la foliojn, la korolojn

kaj la fruktojn ; la instinkto ŝufiŝis por fari ĝin komplika kaj unueca, varia kaj hierarkia. Svarmo de abeloj ĉirkaŭ la reĝino, la duarangaj ideoj ĉirkaŭvolvis per sia murmuro la kantikon de la ĉefa ideo, Aŭ iafoje la akcesoraĵoj, la parentezoj, la komplementoj ĉirkaŭis la verbon kiel amikoj, kies ridetoj kaj rigardoj lumigas la vizagon de la parolanta profeto. Tia, kia ĝi sin montras al ni, jam en dekadenco, en la sanskrito, la jafeta konjugacio estas, inter ĉiuj, kiujn ni ankoraŭ konas, la plej profunda el la homaj inventaĵoj. Ĝi estas la parolo, la vorto, la tuta homo. Ĝi estas la perfekta spegulo de la senfina universo, konstante varianta, ne komprenebla, tuj kiam vi volas limigi kaj fiksi ĝin, klara kiel via rideto, se viaj flirtantaj klasifikoj diras, kun ĝia senfineco kaj ĝiaj varioj, ĝiajn konstantajn individuecojn, kiuj senfine, sen sin reciproke detruu, sin supermetas kaj interpariĝas.

La parolo de Rifat, tuj kiam ĝi sin altigis al ĝeneralaĵ ideoj, fariĝis himno sin ne konanta, sekvenco de senrimaj versoj, kun neegalaj tempoj, kies multoblaj ritmoj inventiĝas laŭsekve, laŭ la bezonoj kaj la movoj de la spirito.

La fleksebleco de la malnova arja konjugacio estus nekomprenebla al niaj krudaj oreloj, malĝustigitaj per gramatiko kaj retoriko, Nia malriĉeco miras fronte al la riĉaĵoj de la greka verbo. Nu, la greka verbo estas, apud la sanskrita verbo, almozulo ricevinta de raĝo kelkajn almozojn. La lingvo de Rifat estis supera al la sanskrito tiom, kiom la sanskrito povas esti al la palaj modernaj idiomoj. Nenia lernita sintakso, neniom da formulitaj reguloj, eĉ nenia malriĉiga kaj paraliza rutino. Nur la plej riĉa el la kreantaj instinktoj, Oni inventis, kun senerara supleco, la voĉojn, la modalojn, la tempojn, la kazojn. La orelo distingis la infinitezimojn, kaj la buŝo sciis sekvi, sen ilin haltigi, la plej subtile fuĝantajjn nuancojn. Oni deklinis\*, oni konjugis nur parolante aŭ kantante, en la momento, en kiu la emocio necesigas la dancantan kanton aŭ la marŝantan parolon. Ĉiu vorto estis plena, luma kaj inspirita. Nudaj kaj vivaj, moviĝantaj statuoj, la emocio kaj la penso sin prezentis en sia naiva originaleco.

\* deklinaciis.

Jen, en mia ĉarmita memoro, la tri voĉoj de la greka konjugacio. Mi imagas, sub ĉiu, tri subvoĉojn, kiuj mem dividiĝas kaj subdividiĝas laŭ la nuancoj de la penso ; en ĉiu el la kvin modaloj mi distingas, kapitanojn sub generaloj, tri submodalojn ĉirkaŭnatajn de soldatoj en nekaptebla nombro ; - en ĉiu submodalo, dek kvin, dudek, tridek tempojn, laŭ tio, ĉu la prezenco, la preterito, la futuro estas longa aŭ mallonga, agrabla aŭ malagrabla ; laŭ tio, ĉu la okazo estas proksima aŭ fora, pli proksima aŭ pli fora ol iu alia ; laŭ tio, ĉu mi volas esprimi fulmorapidan agon, aŭ kontinuan agadon, en kiu la paseo, la nuno kaj la futuro suple unuiĝas kiel la fuĝantaj, ĉiam renoviĝantaj akvoj de bela riverego. Lingvo en ĉiu momento kreata, en ĉiu momento kreanta, dank'al vi, antaŭ kvin mil jaroj, mi diris ĉiujn kolorojn, ĉiujn tonojn kaj duontonojn de la penso, mi starigis ĉiujn internajn kaj eksterajn perspektivojn. En la vasta flirtanta lumo, delikataj ombroj ridetis kiel parfumoj. Potenca lingvo, estas vi, kiu kreis la plej vivajn, la plej distingajn, la plej harmoniajn el la dioj, kiujn mi adoris en miaj sinsekvaj ekzistadoj.

La lingvo de Ĥam estis ankoraŭ balbutado. Ĝi vokis al helpe mil akcesorajn esprimilojn : mimikon, dancon, desegnon, sonon de instrumentoj. Kun la mallerto de siaj senfleksiaj unusilabaĵoj, kun siaj senkonjugaciaj verboj, kiuj konis nur tion, kion ni nomas infinitivo, kun la impliko de siaj pronomoj kaj de siaj post-pozicioj, ĝi ŝajnis bela al Rifat nur tiam, kiam antaŭ liaj ĉarmitaj okuloj kaj liaj nesatigitaj oreloj, Tel-Loh, pli ol ŝi ĝin parolis, ĝin dancis.

Ju pli li ĝin divenis, des pli la rigida kaj et-spirita mekanismo de la semida verbo, tiel mallerta por esprimi la tempojn kaj la modalojn, vundis kaj afliktis Rifat'on.

En kelkaj tagoj de interna gloro, li kredis sian penson tiel supera kiel sian lingvon.

Ja certe, la potencaj inspiroj de la profetoj, idoj de Sem, emociis lin : arda elokvento premata, ruĝe varmega fero, sur fumanta karno ; krioj multobl-



iĝantaj, ripetigantaj, penetrantaj kiel glavoj en la profundojn de la spirito. En tiuj el ili, kiuj restis nomadaj, la penso kaj la emocio esprimiĝis dufoje, kortuŝa balancado, kiu ŝajnis sekvi la dilatiĝojn de la koro kaj ĝiajn streĉiĝojn. En tiuj ĉi Rifat amis ankaŭ reveman noblecon kaj grandan moralan dignon. Volonte li konsentis al ili la nomon, kiun ili donis al si mem, kaj nomis ilin la Justuloj. Sed li riproĉis, ke ili estas perfortemaj, ke preskaŭ ĉiam ili baraktas ĉe la bordo de kolero, ke ofte ili skuegiĝas en la abismo de kolero. Tiom, kiom kontraŭ la reĝoj kaj la pastroj, tiuj tiranoj, ili foje prononcis malbenojn kontraŭ iu, kiu rifuzis adopti unike iliajn pensojn kaj ripeti nur iliajn vortojn.

La Egiptoj, idoj de Ĥam, ĉarmis lin per siaj larĝaj filozofiaj imagaĵoj. La Kaldeanoj, en kiuj la sango de Ĥam miksiĝis kun tiu de Sem kaj de Turan, sin montris superaj laŭ scienco kaj industrio. Sed la malnobleco de iliaj instinktoj naŭzis lin. Iafoje li akuzis pri tiu malnobleco ilian industrion kaj eĉ ilian sciencan.

Li havis tagojn de ĝoja aŭ laca akceptemo, kaj li aŭskultis preskaŭ kun disĉipla obeemo. Li volupteme lasis, ke lin penetru konceptoj adorindaj pro strangeco. Aliajn vesperojn tiu strangeco fariĝis al li vundanta, kaj li ripetis al si :

- Oni povas pensi nur en mia lingvo.

Nu, ĉiam mirinde flirtanta, la penso de Rifat alprenis du ĉefajn formojn. Aŭ pligiuste, ĝi estis, sur supro, la ĝoja bolsauĝo de fonto, kiu disverŝos sur la du deklivoj du disfluantajn riverojn.

Sed kiu modernulo iome komprenus la noblan flirtadon, se oni ne dirus al li kun mensoga neteco, kvazaŭ ili estus jam nunaj, la du estontajn direktojn ? Kiu nuna lingvo havigus vortojn sufiĉe fluidajn por la klara fluideco de la pensoj de Rifat ? Eĉ se la vortoj ankoraŭ ie ekzistus, ĉu mia menso povus rompi la karpacion de siaj kutimoj por sekvi, ekster la malrapidaj vojoj kaj la timidaj kategorioj, movojn kun tiel viva gracio, kun tiel aera fleksebleco ?

Per terminoj abstraktaj, inertaj kaj grizaj, mi estas trudata esprimi la plej konkretan, la plej vivan,

la plej kolorriĉan el la filozofioj. Ĉu la vorto filozofio, per si sola, ne ĵetas sur la moviĝantan, irizan spektaklon, lumon falsan, senmovan, pezan kiel unukolora vualo ?

Ni forgesu la interkontraŭajn konceptojn de materio kaj de forto, de materio kaj inteligento, de materio kaj volo.

Antaŭ ol li renkontis Ĥamidojn kaj Semidojn, nenio en la spirito de Rifar proksimis al tio, kion nia pezeco nomas materio. En la penso de Rifat, antaŭ lia renkonto kun fremdaj pensoj, nenio proksimis al la morna kaj paralizanta koncepto, kiun ni nomas unueco.

Li konis nur fortojn. Ho ve! kiel malbone mi diras. Ĉar la vorto forto estas relativa kaj abstrakta, kiel tiu, kiu ignoris la materion, estus povinta elpensi iun vorton, kiu, eĉ malproksime, respondus al ĝi ? Por Rifat ekzistis nur tio, kion ni nomus volojn, individuojn, animojn. Por Rifat estis nur vivantaj ekzistaĵoj. Kaj la estaĵoj estis el tri specoj : vegetaĵoj, animaloj, dioj. Sen ke la demando eĉ povus esti metita, ĉio ĉi estis eterna. Ĉiu estulo, ĉar ĝi estis vivanto, ŝanĝis siajn formojn kiel sin ŝanĝas la teniĝoj de marŝanto. Sed ĝia marŝado daŭris de post ĉiam, sed ĝia marŝado daŭros ĝis ĉiam. Kio estis la dioj, kiujn Rifat rekonis apud la moviĝantaj animaloj kaj la plantejoj al la tero ligitaj ? Ni gardu nin tion diri. Nia pezeco estus kapabla krude nomi ilin kemiaj substancoj kaj senpezaj fluido.

Ni provu, dank'al la mensogo de komparo, iom kompreni la moviĝan fundon de la arĵo. Komparo, aminda kaj trompa lamulo, penu, ke tiu el ciaj manoj, kiu portas povran lampon, ne tremu kiel cia marŝado. La penso de Rifat estis tro suple viva por enfermiĝi en la ĉerko de formuloj? Al la unua mensogo kaj al la unua perforto por ilin trudi, kiel aldoni la plian mensogon starigi per tiuj ĉerkoj la rigidan kaj disfalantan arkitekturon de sistemo ? Inter la pensoj, kiujn povas kapti nia postulema mallerteco, plej proksimiĝas al la mirinda revo de Rifat la plej viva, la malplej rigida el niaj sistemoj, la doktrino de Lejbnico : la sennombraj monadoj sendependaj kaj eternaj. Sed necesas almenaŭ liberigi tiun konstruaĵon el

la kupolo, kiu ĝin premeĝas kaj ruinigas ; necesas almenaŭ forigi la ridindan superegan monadon, la ridindan dion, kiu servas por nenio, krom krei la falsan problemon de la malbono, kaj transformi la genian Lejbnicon en groteskan Pangloson. Se al iu Rifat sufiĉe degenerinta por kompreni niajn formulojn, sufiĉe deformitan por respondi al ni, Lejbnic dirus : "Mia Dio servas por antaŭstarigi la harmonion", la degenerinta Rifat, kiun mi supozas, tamen ekridus himnon tremantan per pli da gajeco ol la tuta Olimpo de Homero. En universo tute formita de volaj kaj nedetruiblaj individuoj, la harmonio ne povus esti unua kaŭzo ; se oni ĝin konceptas, tio estos kiel ĝenerala rezultanto. Eble la supla kaj harmonia Rifat kredis, ke tiu rezultanto necese okazas. Sed laŭ li, ĉu ĝi okazas pli kaj pli, ascendado en pli pura lumo je ĉiu dekmilo da jaroj ? Aŭ, ĉu jen pli videbla, jen pli kaŝita, ĉiam sama, ĝi elvolvas kelkan belan ritmon similan al la fluso kaj al la malfluso de la maro, kiu estas tiel abunda en sia retrofluo aŭ en la tempo de siaj konkerroj ?

Se Rifat estus klasinta siajn diojn, mi kredas, ke li estus nominta unue la Teron, la Humon, la vastan patrinan Substancon, kies infanoj estas la vegetaĵoj, aŭ pli ĝuste la vastegan vivanton, kies haroj, diris lia kanto, estas la plantoj. Kiam li fermis la okulojn, Rifat vidis la teron ronda kaj plata, kiel grandega ŝildo. Ĉiuflanke ĝin ĉirkaŭbaras neatingeblaj montoj. Inter ĝi kaj tiuj montoj cirkle fluas riverego Oceano, salita kaj amara patro de ĉiuj sensalaj akvoj, amara kaj salita filo de ĉiuj sensalaj akvoj. La tero sin tenas en la aero, kiel ŝvebanta birdo, per la daŭro de sia feliĉa penado. Ĝi estas ĉirkaŭata per la kortego de la aliaj dioj : gasoj, vaporoj, fluidoj, kiuj lumigas, kiuj varmigas, kiuj elektrigas ; kiuj per siaj sintenoj, per siaj luktoj, per siaj edziĝoj inter si aŭ kun la tero, naskas ĉiujn fenomenojn, ĉiujn pasiojn, ĉiujn viziojn.

Kiom da demandoj pri Rifat ni metas al ni, falsaj demandoj, kiujn li ne metis al si, kiujn li ne povis meti, kiujn li ne estus kompreninta, se oni estus ilin metinta al li ! Ĉu, ekzemple, li estus kompreninta niajn distingojn inter la mondoj fizika, metafizika kaj morala ?

La distingo inter fiziko kaj metafiziko postulas materion, inertaĵon eternan aŭ kreitan, sur kiun la fortoj venas aplikiĝi. Ridinda dualismo, nekonceptebla al la spirito de Rifat. En la universo li vidis nur fortojn senpere agantajn sur fortojn. Animojn, se oni volas, kiuj propravole servas kiel materioj unuj al aliaj.

Por starigi distingon inter moralo kaj fiziko, necesas akcepti en sia universo aliajn estaĵojn ol moralaj estaĵoj ; estaĵojn, kiuj ne serĉas sian feliĉon, la daŭron en sia feliĉo, la floradon de sia feliĉo. Estaĵojn, kiuj ne penadas akiri la plej belajn eblajn morojn, kiuj ne strebadas al perfekta manifestado de siaj kapabloj. Pri tio, ordinare, ne konsentis Rifat.

Ordinare, perfekta politeisto, li konceptis la luktojn kaj la aliancojn de la eternaj voloĵoj, kiuj solaĵ konsistigas la universon, kiel variantaj laŭ la cirkonstancoj de la vasta varia harmonio, ido de iliaj konstantaj penadoj, patrino de iliaj ŝanĝiĝantaj formoj.

Tamen iafoje lia penso, malpli ridetanta, preskaŭ imagis la animojn kvazaŭ disigitaj, por eterne aŭ por ioma tempo, laŭ du potencegaj armeoj. Inter la plantoj, inter la animaloj, inter la dioj, li distingis la bonajn, la savantajn, la lumajn, la fekundajn ; kaj li distingis la malbonajn, la tenebrajn, la malvarmajn, la venenajn, la detruantajn. Kiam la fremdularo estos al li doninta la naivan kredon pri la kreado en la tempo, li diros la kreadon de la bono kaj la kreadon de la malbono ; li benos Ormuzdon kaj la Amŝaspandojn, li kontraŭbatalos Arimanon kaj lian armeon el Darvandoj.

Kun kia mirego li aŭskultus tiujn el ni, kiuj kredas pensi.

Kun kia mirego li aŭskultis la plej klerajn el la profetoj de Ĥam aŭ de Sem.

Iam la plej saĝa el la profetoj el Egiptio kondukis Rifat'on en sian tendon.

Nu Rifat amis tiun saĝulon, malgraŭ la mallertaĵoj

kaj la kvazaŭaj kubutfrapoj de lia parolo. La saĝa Bam-Ut ŝajnis, per siaj formoj kaj siaj pozoj, frato de Tel-Loh. Ankaŭ li havis la ŝultrojn larĝaj kaj la koksojn mallarĝaj, la kapon dika, la nazon ronda, la okulojn grandaj ; lia buŝo ŝajnis tro malgranda por la belaj paroloj, kaj liaj lipoj tro dikaj ; longaj kaj flekseblaj, liaj manoj kaj liaj piedoj estis en movado ĉiam elokventa. Lia maldensa barbo lasis vidi mentonon iom deklivan, delikate modlitan kiel tiu de la tre amata.

Nu, la saĝa Bam-Ut diris, preskaŭ malmilde :

- Se ci havas okulojn por vidi, rigardu. Kaj se ci havas orelojn por aŭdi, aŭskultu. Rigardu kaj aŭskultu, ĉar mi montros al ci kaj mi diros al ci, kiel la mondo formiĝis, kiel la mondo vivas, kiel la mondo ĉiam vivos.

Sur diskon el papiruso Bam-Ut disŝutis tre fajnan sablon. Per ekfroto de arĉo li vibrigis la diskon. La sablo, perforte pelita, ŝajnis senorda kaj kaosa. Poste ĝi fiksiĝis sur egaldistancaj cirkloj.

- Memoru, kion ci vidis, kaj ankoraŭ rigardu.

Li denove donis ekfroton de arĉo. Sed ĉi-foje li fiksitis per siaj piedoj la ekstremaĵojn de la sablaj diametroj. Tiel la sablo desegnis regulajn poligonojn.

- Memoru la aferojn, kiujn ci vidis, kaj ankoraŭ rigardu.

Nun, per serio de arĉaj ekfrotoj, la sablo regule kirliĝis ĉirkaŭ la centro.

- Ci vidis - glorie diris Bam-Ut - la kreadon de la universo.

Rifat admiris la regulecon de la ricevitaj rezultoj. Sed, fronte al la eteco de la spektaklo kaj al la grandegeco de la pretendo, li ekmiregis, sin demandis, ĉu la egipta profeto estas freneza.

Dume Bam-Ut reparolis :

- Ci ne vidis per la okuloj de la korpo la kreadon de la universo. Ĉar la universo ne estas surfaco kiel mia papiruso, sed ĝi estas volumeno. Se, kiam la okuloj de cia korpo vidas la surfacon, la okuloj de cia spirito ne sukcesas vidi la volumenon, neniam ci estos geo-

metro, neniam ci komprenos la universon. Tiam mi ordonas, ke ci eliru el mia tendo, kaj ke neniam ci revenu en ĝin.

Rifat havis ekskuiĝon. Tamen li restis, tenata de scivolemo.

Kun venka kaj indulgema rideto, Bam-Ut daŭrigis. Liaj mallertaj vortoj kaj liaj precizaj gestoj klarigis.

Rigardante la diskon, ne la diskon oni devas vidi, sed sferon. La nodaj linioj devas imagigi nodajn ebenojn. La regulajn poligonojn endas rigardi kiel projekciojn de regulaj poliedroj. Nu la regulaj poliedroj estas kvin, nome la kvaredro, la kubo, la okedro, la dekduedro kaj la dudekedro.

- Se do la nombroj vibrigas ne plu diskon, sed sferon da sablo, la tuta materio perforte sin aplikos sur kvar, ses, ok, dek du aŭ dudek ebenojn. La nombro de la ebenoj dependos de la grando de la sfero.

En la parolado de Bam-Ut, la primitiva materio estis ia sablo tro fajna por esti videbla eĉ al la okuloj de la dioj. Unua vibro de la arĉo de la nombroj determinis en ĝi infiniton da piramidaj molekuloj; kaj la centroj de tiuj piramidoj estis egaldistancaj; kaj la materio estis forigita el la tuta resto de la spaco.

- Nu, la amaso de la piramidaj molekuloj desegnas grandan kubon, kiu estas la fajro. Kaj se la arĉo de la nombro estus neniam doninta aliajn ekvibrojn, neniam estus estinta io alia krom la fajro.

Rifat, kun la kapo en la manoj, provis kompreni, jen kredis kompreni, jen pli ofte, frenezigiĝis kaj perdiĝis. Same vojaĝanto, meze de ia disfluantaj tenebroj de fulmotondro, ekvidas, en la eklumo de fulmo, la abruptan ĉeeston de formoj; poste li sentas, ke refermiĝas la monotonaj densoj de la nokto, kaj li senmove rigardas, nenion vidante krom la fuĝantaj fantomojn naskitajn de lia deziro aŭ de lia timo; aŭ li rekomencas la palpoprovojn fekundajn je batoj kaj faloj.

En la kubo, kiu estas la fajro, dua ekvibro enskribis sferon, kiu estas la mondo. Nova serio de ekvibroj igis la sferon turniĝi ĉirkaŭ unu el siaj diametroj fariĝinta la akso de la mondo. Nu, la sfero, kiu limas la mondon, estas kava globo. El materio analoga al polurita kaj diamanteca granito, ĝiaj molekuloj estas dekdudraj. De loko al loko ĝin traboras rondaj truoj, kiuj lasas vidi la eksteran fajron.

- La granda truo estas la suno. La due venanta en la vico de grando estas la luno. Sed ĝi alilokiĝas kaj variigas siajn formojn. La truoj pli malgrandaj estas la steloj. Kaj kvin el tiuj steloj, tiuj, kiujn oni nomas vagantaj, alilokiĝas kiel la luno, sed ĉiam konservas la saman formon.

Rifat faris etan aproban signon. Sin mem sendube li aprobis, fine kredante, ke li komprenas.

- Aŭskultu. La fajrokubo havas nenian movon. En la granita sfero, sep truoj, kiuj estas la suno, la luno kaj la planedoj, havas apartajn movojn, kaj la tuta sfero malrapide turniĝas, lokŝanĝante la stelojn laŭlonge de Granda Jaro. Interne de la granda, malrapide moviĝanta sfero, kies ĉiu molekulo prezentas dek du ebenojn, troviĝas alia sfero pli malgranda, sed dika kaj ne kava: ĝi konsistas el okedraj molekuloj. Ĝi estas tiu, kiun ni nomas aero aŭ atmosfero. Kaj la aero turniĝas ĉirkaŭ si mem en dudek kvar horoj. Sub la aertavolo, la solida tero formas trian sferon. Pli malgranda, ĉi vidas, ol la unua kaj la dua, ĝi konsistas el kubaj molekuloj. Ankaŭ ĝi turniĝas ĉirkaŭ si mem en dudek kvar horoj. En la centro de la mondo, troviĝas ankoraŭ vasta kubo el fajro. Koncerne la lastajn el la regulaj poliedroj promesitaj per mia parolo, ne kredu, ke mi forgesis ilin. Malgrandaj dudekedraj korpoj formas la akvon, kaj, pro ilia granda nombro da facoj, sur plej eta deklivo ili ruliĝas kaj glitas.

Rifat havis la kontentan ekmovon de homo, kiu, perдите en nekaptebla koncepto, subite komprenas unu detalon, kaj konfuze esperas, ke la eta lumo eble grandiĝos ĝis lumigi kaj ordigi la tutan konfuzan spektaklon.

Bam-Ut konkludis :

- Mi klarigis al ci la mondon, ĝian naskiĝon kaj ĝian vivon.

"La mondo estas sfera, ĉar la mondo estas la plej bela el la vivantoj, kaj la sfero la plej bela el la formoj.

"Kaj la mondo estas sfera, tial ke sole tiu formo konvenas al korpo, kiu enhavas ĉiuajn korpojn.

"Kaj ĝia ekstero estas ekzakte polurita.

"Kaj ĝi similas al la homo. Aŭ pliĝuste la homo similas al ĝi. Ĉar la homo estas sfero, kiun misformas la organoj, kaj kiu plilongiĝas kaj plipeziĝas per la trenaĵo de korpo.

"La homa korpo estas rimarkinde malperfekta kaj vundebla, ĉar ĝiaj malmolaj partoj estas en ĝia mezo anstataŭ ol ŝirmi ĝian eksteron.

"Eĉ la sfero de la kapo ne estas perfekta, ĉar ĝi havas organojn turnitajn al ekstero. Tial ke la homo havas bezonojn, kaj tial ke, ekster la homo, estas aferoj, kiujn la homo devas vidi, kiujn la homo devas aŭdi, kiujn la homo devas kapti.

"Sed ekster la mondo estas nenio. Tial la mondo havas nenion por vidi, nenion por aŭdi, nenion por kapti.

"Kaj ĝi ne havas okulojn sur sia ekstero, aŭ orelojn, aŭ manojn, aŭ iajn ajn organojn por rilatiĝi kun ĉirkaŭo, kiu ne ekzistas.

"Kaj ĝi estas perfekta.

"Ĉiu el la vivantoj, kiujn ĝi enhavas, estas, turnita al la interno de la mondo sole ekzistanta, organo de la mondo. Kaj, per la vivantoj, kiujn ĝi enhavas, la mondo ĉion vidas, ĉion aŭdas, ĉion kaptas.

"Iru, mia filo, kaj estu, se ci povas, okulo, kiu vidas la mondon, orelo, kiu aŭdas la harmonion de la mondo, spirito, kiu, kiel vasta mano, kaptas la tuton de la mondo."

Ebria de tiu fremda vino, Rifat renkontis profeton nomitan Heber. Li estis ido de Sem, unu el tiuj, kies patroj ĉiam vivis sub tendo, unu el tiuj, kies revoj kaj sintenoj restis noblaj.



Ankaŭ li, Heber volis klarigi al Rifat, kio estas la mondo. Dum parolis la nomado ido de Sem, ofte ŝajnis al Rifat, ke tiu penso estas al li pli proksima kaj pli agrabla ol la penso de Misraim. Iafoje ankaŭ, eble tial ke la balbutoj de Tel-Loh ne preparis lin por tiu penso, ĝi fariĝis al li ankoraŭ pli nekonceptebla ol la geometriaj revaĵoj de Bam-Ut. Kelkafoje ankaŭ, kiam li estis preta ĝin ami, tiu penso vundis lin pro la brutala maniero, per kiu ĝi asertiĝis, kaj pro tio ke, kiel trupo de soldatoj hirtiĝas per lancoj, ĝi ĉirkaŭiĝis kaj hirtiĝis per malbenoj kontraŭ la aliaj pensoj.

Heber eble havis, kiel Rifat, la koncepton pri la animo, pri la individuo, pri la eterna kaj memkonscia forto. Sed li kunigis ĉiujn animojn en unu solan, kiun li nomis Elohim, t.e. la Fortoj. Strange, kiam li priparolis iun agon de la Fortoj, li metis, post tiu pluralo, la verbon en singularo.

La apartaj animoj, solaj ekzistaĵoj laŭ Rifat, ĉu oni povis diri, ke ili ekzistas al la okuloj de Heber? Jes, laŭ la grado, en kiu ekzistas rebriloj. Ili elŝprucis aŭ neniigis, laŭ tio, ĉu Elohim radiis al ili, aŭ ĉesis radii al ili. Elohim estis la luma kaj varma radiado; la homa cerbo, sablo tiun radiadon ricevanta, varmigite, kvazaŭ fandite, de ĝi, ĝin reflektis per la okuloj. Kaj la videbla lumo, laŭ kia grado ĝi ekzistis? En la paroloj de Heber, ĝi ŝajnis al Rifat jen absorbi ĉiujn ekzistojn, jen perdi ĉian ekziston. La lumradioj, kiel niaj matematikaj linioj, havis nek larĝon nek dikon. Tial, rimarkis Heber, ili trairas la travideblajn korpojn, el kiuj tamen pluraj estas solidaj kaj kontinuaj. La lumo estis la animo, la absoluta kaj videbla energio de Elohim, unua centro de ĉiu radiado.

- Fermu la pardonon de ĉambro. Ĉiuj korpoj, kiuj estas en la ĉambro, restas en ĝi, sed la lumradio ne estas plu tie. Komprenu do la malsaĝon de tiuj, kiuj parolas pri la lumo, kiel ili parolas pri la korpoj senmovaj en la ĉambro.

Li plie asertis :

- Kiam oni tute bone parolas, oni diras, ke estas nur unu Estaĵo, kaj ĝi nomiĝas Elohim, kaj iafoje, en

la sekreto de mia koro, mi nomas ĝin Tiu-Kiu-Estas. Sed la homo volas diri tro da aferoj, tial li ne povas plu paroli tute bone. Eĉ tiam li parolu preskaŭ bone. Parolante laŭ la malforteco de sia parolo, li diru : "Estas du estaĵoj. Estas la estaĵo, kiu konceptas, kiu generas, kiu kreas, kiu moviĝas, kaj ĝi nomiĝas Elohim." Kiam mi parolas preskaŭ bone, ĝi estas la eminenta estaĵo, kaj ĝi estas la estaĵo de ĉiuj estaĵoj. Kiam mi parolas tute bone, mi diras : "Ĝi estas", kaj mi diras nenion pli ; aŭ mi prononcas ĝian nomon, kaj mi diras nenion pli. Kiam mi parolas preskaŭ bone, mi kredas distingi, sub Elohim, la nepenetreblan, la blindan, la materion, la rokon. En iaj okazoj ci povas paroli pri la nepenetrebla kiel pri afero, kiu estas. Sed, kiam ci parolas pri la nepenetrebla kiel pri afero, kiu estas, la vorto "estas" estas malriĉulo, kiu posedas nenion. Kiam la vorto "esti" fariĝas en cia penso riĉulo, kiu ĉion posedas, ci pro timo blasfemi hastas diri, ke la nepenetrebla ne estas. Kiam mia parolo, kiel Elohim, donas al ĝi almozon el lumo, kelkafoje, ĉar ĝi ne estas, mi nomas ĝin la Nenienco, la Vakuo aŭ la Abismo ; iafoje, ĉar ĝi estas blinda kaj fermita, mi nomas ĝin la Roko, aŭ mi nomas ĝin la Nepenetrebla.

"La radiado de Elohim estas la sola estaĵo, kiam ci parolas tute bone. Kiam ci parolas preskaŭ bone, ĝi generas ĉiujn estaĵojn. Sed la Roko, nekapabla sin movi kaj sin modifi per sia propra povo, estas, eĉ kiam ci parolas nur preskaŭ bone, kvazaŭ ĝi ne estus ; ĝi ekzistas kiel limo, ne kiel ekzistaĵo. Kiam, parolante tute bone, mi nomas Elohimon Tiu-Kiu-Estas, mi nomas la Abismon de blinda kaj nepenetrebla pleno Tio-Kio-Ne-Estas. Se la forto de cia penso nuligus la Nepenetreblan, tuj Elohim, luma punkto kaj luma radiado, renkontus neniun obstaklon, kaj ĉie estus perfekteco, esto, dieco, klareco, sfero. Se la malforteco de cia penso momenton forgesus Elohimon, ĉio fariĝus materio, malvarmo, tenebro kaj blindeco. Kaj estus kvazaŭ nenio plu estus. Aŭ pli ĝuste, nenio plu estus."

Rifat, konfuzigite, serĉis la solecon netroveblan sur la ebenaĵo de Sennaar, serĉis la silenton netroveblan sur la ebenaĵo de Sennaar, trovis almenaŭ, kiu lin ripozigis kiel vasta silento, la bruon de la

de la praktikaj laboroj kaj de la praktikaj paroloj, la bruon de la kantoj de amo kaj frateco.

Li diris al si mem, en tiu silento konsistanta el bruoj, kiuj ne plu turmentis lian spiriton :

- Mi ne volas nek povas pensi kiel Bam-Ut aŭ kiel Heber. Kaj mi ja vidas, ke nek Bam-Ut nek Heber volas kaj povas pensi kiel mi.

Li plie diris al si :

- Kiam mi volas eligi tion, kio estas en la fundo de mi, mi ne plu provas paroli iliajn lingvojn. Kiam ili volas eligi tion, kion enhavas iliaj profundaĵoj, ili sendube ne povus helpe de mia lingvo. Ho mia lingvo, ĉevalo, kiu konas sian mastron, ĉi estas obeema kaj rapida sub la pezo de mia penso ; sed, mi kredas, ĉi ekribelus sub aliaj pensoj, kaj ĉi ĵetus ilin kontuzitajn al la grundo.

Duonvoĉe, kun bela rideto, li daŭrigis :

- La laboristoj faris al si komunan lingvon, malpli belan ol la malplej bela inter la aliaj, tamen utilan por la praktiko. Ĉu ĉiuj homoj ne havas, eĉ pli belan ol la arja, komunan lingvon, kiu estas la rideto, kiu estas la gesto de amo, la helpo donita, la manoj sin premantaj, la lipoj sin kunigantaj ? Sed, se la komuna kaj malbela lingvo de la laboristoj povas diri tion, kion bezonas mia korpo, se la komuna kaj bela lingvo de ĉiuj homoj povas diri tion, kion bezonas mia koro, nek unu nek la alia diros tion, kio estas la fundo de mia spirito.

"Ĉiuj spiritoj de homoj similas inter si ; tial ĉiuj homoj parolas. Sed la spiritoj de la popoloj estas diferencaj, tial, tuj kiam ne temas plu pri praktiko aŭ amo, la popoloj bezonas paroli diversajn lingvojn."

Li marŝis momenton, silente; Lia rideto fariĝis pli profunda, kaj liaj okuloj radiis ekstazon. Poste li reparolis per ĝoja murmuro :

- Kiam mi havos infanon, Tel-Loh kaj mi rigardos ĝin kun malsamaj pensoj, sed kun sama amo. Nu, riĉaĵo estus perdita, se Tel-Loh, ĝin rigardante, havus samajn

pensojn, kiel mi. Nu riĉaĵo estus perdita, se Tel-Loh, ĝin rigardante, ne havus la saman amon, kiel mi.

"Mi ne volas, ke perdiĝu la diversa riĉo de mil lingvoj, idoj de la mil revoj de niaj patroj, patroj de la mil revoj de niaj idoj. Eĉ malpli mi volas, ke perdiĝu la komuna kaj profunda riĉo de la rideto, de la kiso, de la amo."

Tel-Loh estis rakontinta al Rifat tion, kion la Kaldeanoj nomis la historio de la komencoj. Ŝi pripaŝolis, laŭ la filoj de Sumer kaj Akad, la primitivan kaoson ; - la spiriton de la dioj flosantan sur la humidaj tenebroj ; - la disigon de la malsupraj akvoj kaj de la supraj akvoj ; - la kreadon de la mondo en ses tagoj ; - la homon, lastenaskiton de Ea ; - la ripozon de la sepa tago ; - la piecon de la unuaj generacioj ; - la koleron de la dioj, la diluvon, la arkeon de Ksisutros savantan la homojn kaj la bestojn ; - la teron nove loĝatan de la idoj de Ksisutros.

Tiuj rakontoj estis konfuzaj, densegaj, nemalimplikeblaj. Malgraŭ lia amo al la recitantaj lipoj, la troabunda, embarasita rakonto, en kiu la frenezaĵoj multobliĝis kaj grandiĝis kiel arboj de inkubsonĝo, kaŭzis ĝenon al la aŭdanto, aŭ ekscitis en li ridon de malŝato kaj de vekigo.

Sed Heber, la nobla kaj incitigema nomado, estonta patro de Peleg, patro de Rehu, patro de Serug, patro de Nakor, patro de Tare, patro de Abraham, iam rakontis al li la samajn historiojn. Komence Rifat ridis en la sekreto de sia koro ; nur la frata amo malhelpis lin insulte diri : "Ci ŝtelis tiujn fabelojn de la pastroj de Kaldeo." Tamen, iom post iom, kvankam Heber estis al li malpli kara ol Tel-Loh, tiuj rakontoj ĉarmis lin. Ĉu tial, ke ili perdis sian strangecon kaj tiun malamikan vizaĝon trovitan je la unua renkonto kun estaĵoj kaj aferoj, kiujn la tempo poste igis lin ami ? Rifat tion kredis. Esperante duobligi sian plezuron, li petis Tel-Loh'on, ke ŝi denove recitu al li la primitivan kaoson, la kreadon kaj la unuajn homojn. Nu, denove la rakonto ŝajnis al li monstra kaj ridinda. La Arĵo do admiris en Heber potencon de simpligo, kiu vestis eĉ frenezaĵon per ia racia dra-

pirajo kun malmultaj kaj noblaj faldoj. Heber izolis la belon de la arbo, ĝin malimplikis el la sufokaj liajnoj. Kion li ricevis groteska, li redonis ĝin poezia. Refaritaj laŭ la genio de la sobra nomado, la konfuzaj fabeloj de Kaldeo radiis kun simpla beleco, preskaŭ kun natureco kaj verŝajneco.

Kiam Heber mem inventis, liaj svagaj, kvazaŭ abstraktaj konceptoj, senkoloraj, senformaj kaj senvivaj, ne povis kapti la spiriton de Rifat. La inventoj de la Sumeranoj kaj de la Akadanoj vundis lin per sia peza kaj trenanta malbeleco. Sed Kiam Heber faris el ili la korpon de sia doktrino, li ĉerpis el tiu ridinda maso sveltan statuon. Kaj samtempe li plibeligis ilin, kiel lampon plibeligas tiu, kiu eklumigas en ĝi animon kaj flamon.

Ofte Rifat iris vespere al la kunveno de la profetoj pro nura bonvolemo, timante, ke lia foresto, se rimarkite, vundus liajn fremdajn fratojn. Ofte li penis silenti. Ifoje lia intelekta emocio estis tro forta. Tiam, ekstarante meze de la kunvenintaro, li levis sian personon fronte al aliaj pensoj.

Iun vesperon Heber, alte eksponinte kelkajn el siaj konceptoj, incitiĝis pro la kontraŭdiroj, la ridoj, la kapskuoj mokantaj aŭ kondamnantaj. Li ekkriis :

- Kiel ni amos nin, se ni ne atingos kredon pri samaj aferoj ?

Terura silento sekvis tiujn vortojn. La silento mem, kiu antaŭas iujn fulmotondrojn kaj iujn batalojn. Ĉiu sentis, ke li ne povas rezigni pri sia vero. Ĉiu memoris: tro da malsukcesoj montris al li, ke li ne povas inklinigi la aliajn al sia vero. Vortoj ankoraŭ mutaj kaj enfermitaj, sed baldaŭ ili estas impetontaj, interbatontaj, klaktintoj de armiloj kaj interfrapoj de malbenoj, akuzontaj la obstinan blindecon kaj la malsincerecon de la najbaroj.

Nun, la rido de Rifat eksonis kiel venkokanto. Kaj Rifat rebatis :

- Kiel ni amus nin, se ni kredus la samajn aferojn ?

Angore kaj malŝate, ĉies okuloj sin turnis al li kiel al frenezulo, kies frenezo subite eksplodis. Sed li daŭrigis :

- Viro amas virinon, virino amas viron, viro kaj virino amas infanon, tial ke tiuj tri estuloj intersimilas kaj ne intersimilas. Ĉu mi povus ami, alie ol kiel bildon flosantan sur la akvoj, estulon, kiu estas tute simila al mi ? Ne, kion mi amas, tio estas diferenca estulo ; kio ĉarmas mian koron, tio estas la amo de diferenca estulo.

"Por sin ami, necesas esti pluraj kaj samtempe esti nur unu. Niaj paroloj faras nin pluraj. Niaj ridetoj kaj niaj rigardoj povas fari nin unu. Nu, niaj paroloj falas de alta fonto, kiu situas en la kapo ; sed niaj rigardoj, niaj ridetoj, niaj kisoj ŝprucas el profunda fonto, kiu situas en la brusto kaj en la koro."

El ĉiuj flankoj oni ekkriis :

- Ĝuste. Ci pravas. Rifat estas prava.

Ho ve! tiuj aklamoj esprimis malfortan bonvolemon, kiu bezonas esti ofte vekita, kaj kiu, dormante, lasos morgaŭ paroli, lasos krii, lasos barakti la netolereman kaj invademan penson.

Alian vesperon Heber rakontis antaŭ ĉiuj pri la unua viro kaj la unua virino tiel, kiel li iam rakontis pri ili al Rifat. Nu, tiun nokton, Rifat ne estis inkлина admiri, kiel ebriiĝita poeto aŭ kiel kredema infano. Kiel foje okazis al li, li ne povis bridi grandan ekridon.

- Kial ci ridas ?

- Mi ridas, tial ke ci ŝajnas al mi malsana.

- Klarigu.

- Ĉu ne estas en ci speco de febro, kiu cin skuas, ĝis la aferoj, kiuj estas komplikaj, fariĝas simplaj en cia spirito, kaj ĝis la aferoj, kiuj estas multaj, fariĝas unu ?

- Kiam mi trovas unu, mi ekripozas en ĝojo.

- Sed la aferoj ne ripozas. Kaj ili daŭrigas sian laboron. Kaj ilia laboro iras de unu al pluraj.

- Tion mi diras.

- Kaj ilia laboro iras ankaŭ de pluraj al unu.

Heber levis la ŝultrojn.

- Jen, li rebatis, kion mi ne vidas. Kaj se ci kredas vidi la laboron, pri kiu ci diras, tio ne estas vera vido ; ĝi estas la kapturino de blindulo, kiu ricevis baton sur la kapon.

- Ci rigardas homon, kiu havas plurajn idojn. Tiu homo jam havis multajn fratojn, kaj antaŭ la patro de tiu homo. Tial ci diras : Unu homo estas la patro de popolo.

- Ĉu mi ne ĝuste diras ?

- Poste ci imagas, ke tiuj patroj de popoloj estis mem filoj de sama patro.

- Mi ne imagas. Tion diris al mi miaj patroj.

- Do ciaj patroj tion imagis.

- Ja ne. Sed Elohim, kiu amis ilin, ĝin diris al ili.

- Do - konkludis Rifat kun strangeta rido. Elohim tion imagis.

La amaso ekkriis :

- Insultu la pastrojn, kiom al ci plaĉos. Sed neniam ridu pri iu el niaj dioj.

- Ankaŭ la pastroj, antaŭ ol paroli, anoncas : Parolo de Bel, aŭ : Parolo de Marduk, aŭ : Parolo de Elohim.

- La pastroj mensogas. Sed miaj patroj estis verdiraj.

- Ili ripetis pro bona fido, kion ci ripetis pro bona fido. Sed la unua, kiu diris tiujn aferojn, estis mensoganto aŭ estis frenezulo.

- Neniu dio iam parolis al iu pastro. Sed Elohim parolas al la plej justaj inter la homoj. Kaj miaj patroj estis la plej justaj inter la homoj.

Tiam pluraj postulis favore al siaj patroj. Tiel la diskutado fariĝis konfuza kiel miksbatalo ; poste ĝi disiĝis je mil dueloj, disvadis en mil aventuroj.

La morgaŭon ĝi rekomenciĝis pri la unueco, kaj ĝi

sekvis alian vojon.

Rifat jene komencis :

- Tial ke ĉiu patro havas plurajn idojn, Heber diras, kaj la Kaldeanoj diras antaŭ aŭ post li : En la komenco estis nur unu viro kaj ĉiuj hodiaŭaj homoj devenas de tiu unika viro.

- Ĉu ni ne ĝuste diras ?

- Vi tiel ĝuste dirus, se vi asertus la malon : ke la aferoj iras de multo al unu.

- Mi diros ankoraŭ pli ĝuste, asertante, ke mi ĵus aŭdis frenezulon.

- Do aŭskultu min pacience, kiel oni aŭskultas frenezulon, eĉ ne incitiĝeman.

- Mi cin aŭskultas pacience kaj dolore, kiel oni aŭskultas frenezulon, kiun oni amas, kaj kiun oni volus resanigi.

- Por ke mi venu en la mondon, ĉu ne necesis al mi du gepatroj ?

- Sendube.

- Kaj al mia patro necesis du gepatroj, kaj al mia patrino necesis du gepatroj. La unu hodiaŭ ekzistanta postulas jam kvar antaŭhieraŭ. Ĉiu el tiuj kvar havis du gepatrojn. Kaj ĉiam same. Do ĉiu homo estas ido de popolo. Ju pli alten ci supreniras en la pasinteco, des pli multe da homoj ci devas supozi por klarigi la naskiĝon de unu el ni. Se ci reiras al tio, kion ci aŭdacas nomi la komenco, la ekzisto de unu sola hodiaŭa homo postulos nenombreblajn homojn.

La nomadaj Semidoj kaj la Kaldeanoj, sufokite de mirego, silentis. Pluraj levis la ŝultrojn, aŭ ilia gorgo faris konfuzajn rikanojn. Kaj ili incitiĝis en sia koro.

Sed kelkaj Arjoj proklamis :

- Vi havas nenion por respondi, tial ke Rifat diras la veron.

Tiam Rifat levis la ŝultrojn kiel la nomadoj kaj la Kaldeanoj ; sed li ridetis anstataŭ incitiĝi. Kaj li



deklaris mildavoĉe :

- Mi ne diras la veron. Mi ne povas diri la veron pri tiaj aferoj. Pri tiaj aferoj, mi ne povas scii la veron.

- Do silentu, kaj aŭskultu tiujn, kiuj scias.

- Mi diras unu veron, kiel Heber diras unu veron. Sed cia vero fariĝas mensogo, se ci kredas, ke ĝi sola estas la tuta vero.

- Mi ne estas mensogulo - ekkriis Heber - kaj mi diras la tutan veron.

- Cia spirito, kvazaŭ ĝi descendus tro glitan deklivon, marŝas nur en unu direkto. Nu, ĉiuj vojoj povas esti irataj laŭ du direktoj. Kiam mi marŝas, ja necesas, ke mi venu de ie, kaj ke mi iru ien.

"Mi tamen scias, ke la loko de kiu mi venas, eble morgaŭ estos la celo, al kiu mi iros. Sed ci, ci asertas deire de unu punkto de la vojo, kaj ci neas la vojon, kiun ne rigardis ciam okuloj. Do iafoje returnu cin, kaj rigardu.

- Mi resupreniras al la fonto. Ĉar la fonto eksplikas la riveregon.

- Ja ne. Riverego estas konsistigita de multaj riveroj, tiel estas multaj fontoj. Estas miloj da riveregoj, kaj ĉiuj fluas al riverego Oceano. Oceano estas ido de miloj da riveregoj, de dekmiloj da fontoj. Sed Oceano, patro de la nuboj, estas tra ili la patro de la fontoj, de la riveroj kaj de la riveregoj. Tiel, jen ci kredos trovi Unu en la komenco, jen ci renkontos ĝin en la mezo, kaj jen en la fino. Sed, se ci serĉos laŭ alia maniero, eble la multo elfloros en ĉiu loko, en kiu ci kunpremis la Unuecan. Eble la Unueca estas miraĝo kreita de cia febro, kiel certaj akvoj ĉe la horizonto de la dezerto estis, laŭ tio, kion mi aŭdis rakonti, miraĝoj kreitaj de cia soifo.

- La komenco estas simpla kaj malgranda.

- La komenco ?... Kiu komenco ?...

La voĉo de Rifat nun ŝajnis supreniri el la malcertaj profundoj de sonĝo.

- La multaj fontoj, kiuj ĵetas siajn akvojn en Eŭfraton, ĉu ili estas la komenco de Eŭfrato ? Sed la akvo ne komenciĝas en la momento, kiam ĝi elŝprucas el tero. Ĉiu fonto jam estas ia Oceano, en kiun la akvo venas de mil punktoj, kaj ĉiu guto havas apartan historion. Kaj, antaŭ ol enprofundiĝi en la teron, ĝi flugis sur la flugiloj de nubo. Kaj la nuboj venis de la oceano, filo kaj patro de la riveregoj kaj de la fontoj. Eble ĉiu movo, se ci sekvas ĝin sufiĉe longe, fariĝas tia kia cirklo. Eble ne estas komenco.

Je tiuj vortoj, la nomadaj Semidoj, kaj la Kaldeanoj, kaj la profetoj de multaj aliaj rasoj faris grandajn insultajn ridojn. Kaj ili skuis la kapon kun vervego. Kaj ilia tuta korpo ŝajnis iom post iom supreniĝi en iliajn levitajn ŝultrojn. Eĉ la Arjoj maltrankvile sin interrigardis. Heber ŝajne parolis por la tuta kunvenintaro :

- Nei la komencon estas moki, kaj prononci sensignifajn vortojn. Estas detruo ĉiujn aferojn, ĉar ni vidas ĉiun aferon komenciĝi. Kaj ni estas malsanaj, kiel ci hieraŭ diris, ĝis ni trovis la komencon.

- Tio estas ja malsano, febra soifo, senespera voko de cia spirito. Kaj ankaŭ mia spirito spertas tiun ardon.

- Do kial ?...

- Sed mia spirito spertas alian maltrankvilon. Ĝi ne sukcesas koncepti komencon.

- Kion ci diras ? Ĉu ci ne iam naskiĝis ?

- Mi konceptas la komencon de unu afero, aŭ eble de ŝajno de tiu afero. Sed la komencon de ĉio, ja ne. Por ke unu afero komenciĝu, necesas, ke komenciĝu alia afero, aŭ pliĝuste, mi kredas, pluraj aliaj aferoj. Mi ne estus komencinta ĉi tiun vivon, se ne estus estintaj mia patro kaj mia patrino. Pri ĉiu ekzisto estas same kiel pri la mia.

- Elohim kreis la unuajn estaĵojn.

- Li do estis antaŭ tio, kion ci nomas la komenco.

- Ni estas en akordo - ekkriis la Kaldeano Saga-

raktijas. Nenia komenco por la dioj ; komenco por ĉio cetera.

- Laŭ kio ci rekonas, ke estas dioj ?

- Laŭ iliaj faroj.

- Dio, kiu nenion farus, ci do ne scius, ke ĝi ekzistas. Kaj ĉu ĝi ekzistas ? Oni ne povas ekzisti nenion farante. Ĉiaj dioj ĉiam kreis. Se dioj ekzistas, la mondo, kiu estas ilia gesto, estas eterna. Kaj se ne estas dioj...

Oni de ĉiu flanko interrompis lin :

- Ne blasfemu. Estas dioj.

- Sed ci ne povas koncepti la komencon de la dioj aŭ de la unua inter la dioj. Kaj ci ne povas koncepti tempon, en kiu la dioj nenion faris. Tiel ci ne povas koncepti la komencon de la mondo.

Li reparolis :

- Se esti eterna signifas esti dio, do ekzistas nur dioj, ĉar ĉiu estaĵo alprenas diversajn formojn por fari diversajn agojn. Sed neniam iu estaĵo ĉesas agi. Kaj ĉiu estaĵo de ĉiam alprenadas sinsekvajn formojn. Kaj ĉiam eĉ la plej malgranda el la estaĵoj...

Nomadaj Semidoj kaj Kaldeanoj ekkriis tiel laŭtege, ke oni ne aŭdis plu la voĉon de Rifat, kvankam oni ankoraŭ vidis lian buŝon malfermita por la trapaso de paroloj. Li ekkonsciis, ke neniu povas plu aŭdi lin. Kaj ridetante li pensis :

- Mia voĉo estas simila al tio, kion ili nomas mortinto : ĝi estas, ĝi plu agas, sed ĝia agado estas neperceptata.

Tuj kiam duonsilento ebligis sin aŭdigi, Sagaraktijas deklaris, kun preskaŭ universala aprobo :

- Ci diras, ke ni estas malsanaj. Estas ci, kiu volus igi nin malsanaj. Sur cia parolo ni estis balancataj kiel sur freneza ŝipo kaj per freneza tempesto. Kaj nia koro supreniĝus al niaj lipoj, en la sengusto kaj la leviĝo de naŭzo. Tial, ekster la frenezo de cia parolo, ni eksaltas sur la firman grundon kaj sur la firman saĝon de niaj

pensoj. Ni fuĝas for de cia ŝanceliĝa parolo por re-  
trovi la firmecon de la aferoj.

- Ĉio, kion ci vidas, estas varia.

- La dioj...

- Cijaj dioj estas pli variemaj ol la kontinua flu-  
ado de riverego, ili estas variemaj kaj abruptaj kiel  
la falo de kaskadego, se ci imagas tempon, dum kiu ili  
nenion faris kaj tempon, dum kiu ili laboris. Sed la  
variado, kiun ci trovas en ĉiuj aferoj, de kie ĝi ve-  
nus, se ne de la kaŭzo de ĉiuj aferoj? Stabildaj dioj  
ne estus kreintaj moviĝantan mondon. Eĉ, kie ili estus  
prenintaj la ideon pri movado kaj variado?

Heber diris kun subita soleno :

- Mi, mi kredas, ke estas nur unu dio.

Nu tiu penso, pli proksima al matureco ol la penso  
de Rifat, tamen ŝajnis stranga. Ĝi igis revemaj la no-  
madojn idojn de Sem. Ĝi incitis ĉiujn aliajn profetojn.  
Sagaraktijas ekkriis :

- Ci estas freneza alie ol tiu viro, sed preskaŭ  
tiom, kiom tiu viro.

Li aldonis, en freneza kolero :

- Vi estas du malamikoj de la dioj !

Reveninte en sia tendo, Rifat ripetis ĉiujn ĉi vort-  
ojn al Tel-Loh, kies miro iafafoje atingis timegon kaj  
tremon. Post kiam li ripetis tiujn vortojn, li ekkriis:

- Ne, ne, ne. Kion ili vidas antaŭe, tion oni devas  
strebi efektiviĝi hodiaŭ aŭ morgaŭ. Ci ne estas filino  
de la sama patro kiel mi, mia Tel-Loh, sed ni estos ge-  
patroj de la sama filo. La popoloj venis de montoj, de  
ebenaĵoj, de plej diversaj marbordoj, en Sennaar, por  
ke tie ili starigu komunan verkon kaj la monumenton de  
sia frateco. Sed ilia frateco estas ido de ilia koro,  
ne patrino de ilia koro. La amiko, kiun mi adoptis, ha!  
kiel al mi pli proksima li estas, ol la supraĵa frato  
donita de la naturo. Tial ke ci elektis min, kaj tial  
ke mi cin elektis, ci, mia Tel-Loh, estas al mi multe  
pli ol fratino... Ne, ne la dioj faris el la homoj  
fratojn. Ĉar, tiel longe, kiel reiras la memoro de niaj

patroj, la homoj intermilitis. La dioj estas inter si malamikaj, kaj se, kiel rakontas la Kaldeanoj, ili kreis la homojn, ili kreis ilin malamikaj. Eĉ se, laŭ la revo de Heber, estus nur unu dio, ha! kiel tiu dio estus dividita kun si mem, ĉar estas bono kaj estas malbono, ĉar estas ĝojo kaj estas sufero, ĉar estas naskiĝo kaj estas morto. Sed la homoj povas, laŭ la inklino de sia koro, unuigi kiel la riveregoj en oceano, kies nomo estas amo. Kaj, tion mi esperas, la filoj de miaj filoj nomos la ebenaĵon de Sennaar la ebenaĵo de amo.

La morgaŭon, Heber, lin renkontinte, demandis al li :

- Se ĉiuj homoj ne devenas de unu sama patro, kial ci nomas ilin fratoj ?

Rifat respondis :

- Sur la altebenaĵo de Meru mi lasis filon de miaj gepatroj, kiu min malamis. Laŭlonge de mia vojo kaj sur la ebenaĵo de Sennaar mi renkontis plurajn homojn, kiuj amas min. Tiuj ĉi estas miaj fratoj pli ol tiu for. koncerne min, kiu amas ĉiujn homojn, mi sentas min frato de ĉiuj. Se ci amas min, ci sentas min cia frato. Ne la loko, de kie ci venas, gravas por mi, sed ja la loko, al kiu ci iras, kaj tio, kion ci faras. Ne pri cia deveno mi demandas, sed pri cia koro.

## Ĉapitro IX.

# La etaĝo de Nergal

Al la popolo la profetoj lasis nenion vidi el siaj malakordoj. Ili diskutis nokte, kiam la laboristoj, sub la pezo de ĝoja laceco, dormis kiel infanoj. Tage, se ili interrenkontis antaŭ ĉeestantoj, ili reciproke parolis al si kun amemo, sin tenis ĉe la supraĝo de la aferoj kaj de la vortoj, evitis la profundaĵojn, kiuj ebriligas kiel vino de kverelo.

Stranga afero. Malgraŭ la peno de la profetoj por ŝajni en akordo al la okuloj de la simpluloj, kiam la diskuto de la antaŭa nokto estis estinta viva, la simpluloj malpli aŭskultis ilin. La simpluloj ŝajnis, en tiuj tagoj, malpli amemaj kaj pli incitiĝemaj. Al la belegaj paroloj de la profetoj ili preferis, en tiuj tagoj, la balbutojn de tiuj, kiujn ili nomis la gigantoj. Ili ŝajnis forlasi tiun kul-ton de la koro, kiu, al iliaj okuloj, konfuziĝis kun la kulto de la forto. Kvazaŭ ili konfuze bedaŭrus la reĝojn, ili grupiĝis, admirantaj kaj inklinaĵ al obeado, ĉirkaŭ la plej fortikaj inter ili.

Tri gigantoj superis la aliajn per la staturado kaj la forto. Ili estis la negro Etana ; la Arĝo Haik ; kaj Ner la Kaldeano, kiu strekis sur argilaj tabuletoj la tutan planon de la turo.

Haik superis la du aliajn. Iam, en la tempo de la militoj, li estis la plej lerta el la arkistoj kaj ankaŭ la plej potenca el la manipulantoj de klabo. Li estis bela laŭ trajtoj kaj vizaĝkoloro. Lia hararo brilis kiel suno. Liaj brakoj estis vilaj kaj dikegaj kiel la brakoj de urso. Lia okulo estis tiel akravida kiel okulo de aglo. Lia rido sonegis, tondro de ĝojo. Lia voĉo, kiam li incitiĝis, estis minaca tondro. En la malbonaj tagoj, kiam la homoj ŝajnis forgesi sian fratecon, neniu havis tiom da influo kiel Haik.

Sed, se Ner kaj Etana alianciĝis, ili havis, kune, pli da forto kaj pli da influo ol la sola Haik.

Ĉiufoje, kiam Haik fariĝis tro aroganta, Ner kaj Etana kune venis minaci lin. Kaj Haik, ĉesigante siajn insultajn parolojn, plu aŭdigis nur surdan grumblon, la grumblon de urso, kiu etpaŝe retroiras kaj retir-iĝas en sian rifuĝejon.

Sed, se Ner aŭ Etana fariĝis tro aroganta, Haik minacis lin, kaj, ĉar neniu subtenis lin, Ner aŭ Etana eksilentis antaŭ la forto de Haik.

La kvar unuaj etaĝoj de la turo estis finkonstruitaj. Oni komencis la kvinan, tiun, kiu en ordinara zigurato estus, post finkonstruo de la masonaĵo farbotota per sangokoloro kaj dediĉota al la kruela Nergal.

En la nokto, kiu sekvis la komencon de tiu kvina etaĝo, la profetoj interkverelis kun tia perfortemo, ke ili fine sin frapis unuj la aliajn. La morgaŭon, pluraj ne montris sin, tial ke ilia vizaĝo portis postsignon de la ricevitaj batoj. Ili timis esti demandotaj pri la kaŭzo de tiuj kontuzoj ; ili volis nek mensogi nek sciigi al la popoloj, ke la profetoj sin interbatis.

Nu, tiun morgaŭon, terura disputo ekokazis inter la gigantoj. Kaj la popoloj sin vicigis malantaŭ la gigantoj kiel malantaŭ ĉefoj ; la plimulto el la Arjoj, malantaŭ Haik ; la pli granda nombro el la idoj de Ham, malantaŭ Etana ; preskaŭ ĉiuj idoj de Sem, malantaŭ Ner.

Antaŭ ol supreniri al la taga laboro, Haik estis dirinta :

- Estas tempo, ke ni sciu, kion ni faras, kaj estas tempo, ke ni sciu, ĉu ĉiuj el ni, efektive, volas fari la samon.

Pluraj respondis :

- Ni ĉiuj volas fari la samon. Ni volas konstrui turon, kiu altiĝu ĝis la ĉielo, kiu donu al ni eniron en la loĝejon de la dioj, kaj kiu ebligu al ni sidiĝi kun la dioj ĉirkaŭ la tablo de la dioj.

Sed aliaj kriis :

- Neniu turo povos altiĝi ĝis la ĉielo de la dioj.

- Kial vi estas niaj malamikoj kaj la malamikoj de tio, kion ni faras ? Kial vi insultas niajn manojn kaj nian laboraĵon ? Aŭ ĉu viaj malamikaj paroloj ne signifas, ke ni estas malsaĝaj, kaj ke nia laboro estas neutila ?

La kelkaj tie estantaj profetoj provis pacigi la malŝatan ridon de unuj, la furiozajn kriojn de la aliaj.

- Vi ĉiuj estas pravaj - diris la profetoj. Estas vere, ke la turo altiĝos ĝis la ĉielo, kaj estas vere, ke la turo haltos antaŭ ol atingi la ĉielon. Ĝi ne povus atingi la ĉielon, kiun vi vidas per la okuloj de la korpo. Sed ĉu vi ne sentas, kiam vi estas bonaj, kiam vi vin amas unuj la aliajn, ke estas ĉielo en via koro ? La Turo, per tio nur, ke ĝi estas komuna efektivigaĵo de ĉiuj rasoj, la atesto pri kunligiteco kaj amo inter ĉiuj rasoj, atingas la ĉielon, kia ajn estas ĝia alto. Se vi restas fidelaj al la sento, kiu igas vin konstrui la Turon, ĉu la tero mem ne fariĝas ĉielo ? La tablo de la dioj estos ĵaluza pri la tablo de feliĉo kaj amo, ĉirkaŭ kiu sin miksas kaj sin miksos la popoloj.

Eble tial, ke en tiu nokto ili estis kverelintaj kaj interbatintaj, tial ke restis ia venĝosento en la fundo de ilia koro, kaj pluraj pripensis venĝi sin la venontan nokton : iliaj paroloj estis malpli efikaj ol kutime. La popoloj, turnante la dorson al la profetoj, aklamis la gigantojn. Kaj ili insultis unuj la aliajn.

Nu, la komuna lingvo, produkto de la komuna laboro kaj de la amo, havis vortojn por ĉiuj necesoj de la laboro, kaj ĝi havis vortojn por diri la amon. Sed ĝi ne havis vortojn de malamo nek vortojn por insultado. Tial la popoloj kriis siajn akuzojn kaj siajn insultojn ĉiu en sia lingvo. Kaj estis granda konfuzo de lingvoj. Baldaŭ, cetere, oni plu aŭdis nur vastan surdigan tondradon, en kiu neniu parolo restis distingebla. Sed ĉiu, tial ke li insultis, komprenis, ke oni insultas lin. Kaj ankaŭ la gestoj de malŝato, la gestoj de abomeno, la gestoj de minaco klarigis la grandan konfuzan voĉtumulton.

Haik levis tre alten siajn manojn malfermitajn, poste iome mallevis siajn manojn malfermitajn. La potenca gesto



Ŝajnis premeĝi kaj enprofundigi la bruon. Tiam Haik ekkriis, pli laŭte ol la malfruaj voĉoj :

- Oni faris al mi la ofendon ne respondi al mia demando.

Liaj haroj moviĝis, ruĝaj serpentoj de kolero. Liaj vilaj brakoj levis du kolonojn de kolero kaj minaco. Liaj pugnoj fermiĝis, klaboroj de kolero.

Ĉiuj, kun distaŭzitaĵoj haroj, kun brakoj levitaj, pugnoj fermitaj, kriis ĉirkaŭ lia krio. Unuj, antaŭenpaŝante al li aŭ retroirante antaŭ li, kriis :

- Ci mensogas, kaj oni respondis al ci.

La aliaj, antaŭenpaŝante al la malamikoj de Haik, kriis :

- Vi mensogas. Oni ne respondis al li.

Dume, Haik, Ner kaj Etana, per gestoj minacaj aŭ pacigaj, fine akiris la silenton de la popoloj. Kaj Ner diris al Haik :

- Cia demando estu klara, kaj mi respondos al ĝi.

- Mia demando estis klara, kaj mia demando estas klara. Mi scias, kion mi faras ĉi tie. Ci, kiu portas en cia kapo, kaj kiu skribis sur tabuletoj la planon de la Turo, ankaŭ ci certe scias, kion ci faras. Sed, ĉar ci ne diris ĝin al mi, mi ne scias, ĉu la afero, kiun ci volas, kaj la afero, kiun mi volas, estas du aferoj aŭ unu sola afero.

- Ni volas turon, ateston pri nia eterna ligo. Ni volas turon, kiu, en ĉio cetera simila al la ziguratoj de la reĝoj kaj de la pastroj, humiligu la ziguratojn de la reĝoj kaj de la pastroj per sia pli larĝa larĝo kaj per sia pli alta alto. Anstataŭ diri la superpotencon de la reĝoj super la regatoj kaj la superpotencon de la pastroj super la kredantoj, anstataŭ diri la servutecon de la homoj sub la reĝoj kaj sub la pastroj, ĝi kantos la egalan potencon de la homoj super la tero kaj super la bonaĵoj de la tero.

- Krom per la aferoj, kiujn ĝi diros en niaj koroj kaj per siaj pli grandaj proporcioj, la turo, ci aser-

tas, estos simila al la ordinaraj ziguratoj ?

- Tion mi ja pretendas.

- Do la etaĝo, kiun ni komencas, ĉi ĝin dediĉas en ĉia koro al Nergal, dio de la milito ?... Ĉi jam vidas ĝin ruĝa, kvazaŭ la sango de la homoj fluus de la supro al la bazo de ĝiaj kvar muroj ?

- La etaĝo estos ruĝa kiel Nergal en la ĉielo kaj kiel la sango de mia koro. Sed la Nergal, kiun honoros la etaĝo, estas la planedo, kiu lumigas, kiel la aliaj planedoj, niajn pacajn laborojn. En niaj koroj ne estas plu iu dio de la armeoj.

- Ĉu ĉi tion volas aŭ ne volas, Nergal estas la sinjoro de la bataloj. Ĉu ĉi volas aŭ ne volas, ruĝo estas la koloro de verŝita sango. Mi ne permesos, ke sanga farbo estu disverŝita sur mian fratan laboraĵon. Mi ne permesos, ke la koloro de tiu etaĝo altiĝu kiel himno honore al la milito kaj la bataloj.

Li levis kaj skuis siajn pugnojn, klabojn de minaco. Kaj la tondro de lia voĉo gruntis :

- Mi prefere mortigus ĉiujn, kiuj estas amikoj de la milito.

Malantaŭ li la Arjoj kriis :

- Tiel estu. Ni mortigu tiujn falsemajn fratojn, kiuj restis en sia koro amikoj de Nergal kaj de la milito. Ne restu plu sur la tero aliaj homoj ol la amikoj de la paco.

Jam Ner kaj Haik sin reciproke stringis. La Arjoj kaj la Semidoj sin interfrapis per siaj pugnoj, per siaj piedoj, sin intermordis per siaj dentoj. La malmolo de la kapoj batis la malmolon de la brustoj aŭ la molon de la ventroj. Sed Etana sukcesis aŭdigi sin :

- Haltigu tiujn abomenindajn batalojn, aŭ mi mortigos Haikon.

Kaj la plimultaj Ĥamidoj malantaŭ li :

- Ĉesigu tiun frenezan batalon, aŭ ni mortigos la Arjojn.

La Ĥamidoj disigis la batalantojn, sin ĵetis inter ilin.

Kiam, dank'al la penado de la Ĥamidoj, la lukto paciĝis, multaj vunditoj ĝemis, sternite sur la grundo, aŭ fuĝis premante siajn vundojn sub tremantaj manoj. Kaj, inter la idoj de Sem, estis unu mortigito.

Tiuj, kiuj estis proksime de tiu mortinto, rigardis kun miro. Kaj ili diris :

- Jen estas la faro de nia amo. Kia frenezo igis nin mortigi nian fraton ?

Okazis reago en la koroj, tute invaditaj per bezono pri dolora tenereco. La okuloj pleniĝis per larmoj. Arjoj kaj Semidoj sin ĉirkaŭbrakis por kiso, kiel antaŭe por batalo.

Oni enterigis Diklan, filon de Scelef, en la loko mem, sur kiu li estis falinta. Ĉiuj plorante hurlis : "Ho ve, Dikla ! Ho ve, nia amiko !" La profetoj parolis apud lia tombo. En ĉiuj lingvoj ilia elokvento laŭdis Diklan, kaj la amon. Kaj la giganto Etana laŭdis Diklan kaj la amon en la komuna lingvo. Poste oni metis sur la tomben argilan tabuleton, sur kiu estis stampita tio, kion en la komuna lingvo diris la giganto Etana.

Tamen restis venĝemo en la koro de la nomadoj idoj de Sem. Ĉar ili estas amikoj de justo pli ol de amo. Ofte ili malbenas la pardonon, ĝin nomante maljusto. Ili laŭdas kaj postulas la venĝon, kiun ili nomas justo. Ifoje ili donas al justo alian nomon, kaj nomas ĝin : repago. Ili postulis, ke la ekvilibro estu refarita per la morto de la murdinto.

Nu, neniuj sciis, kiu estas la murdinto. Eĉ, ĉu estis murdinto ? Ĉu Dikla filo de Scelef ne mortis pro multaj batoj, el kiuj neniuj intencis mortigi ?

Vanĉe la arjaj profetoj tion eksplikis al la idoj de Sem. La Semidoj respondis :

- Se estas pluraj murdintoj, la plej kulpa sin konigu kaj sin oferu. Aŭ, se li estas tro malkuraĝa por sin konigi kaj sin oferi, eltrovu lin, kaj liveru lin al nia justeco. Tiel longe, kiel la murdinto estas vivanta, la sango de nia frato krias venĝon al la ĉielo, kaj la sango de nia frato krias venĝon en niaj koroj.

Ĉiunokte nun, la profetoj interbatalis, tial ke unuj asertis, ke amo estas pli ol justo, dum la aliaj metis la juston je pli alta valoro ol la amo. La unuj frapis la senkulpulojn en la nomo de justo ; la aliaj frapis siajn fratojn en la nomo de amo.

Ĉiutage la laboro estis interrompita per interbataladoj. En la konfuzo de insultaj lingvaĵoj, oni interfrapis reciproke per la pugnoj, oni interfrapis per la piedoj, oni intermordis per la dentoj aŭ interŝiris per la ungoj, oni interdeŝiris la kapharojn, la barbon kaj la korpoharojn.

Ĉiutage estis, inter multaj vunditoj, kelkaj mortintoj. Ĉiutage kelkaj vunditoj el la antaŭaj tagoj mortis. Oni ploris ĉirkaŭ la mortintoj. Ĉe la tomboj la profetoj diris vortojn de frateco. Oni asertis, ke la kvereloj estas finitaj kaj ke rekomenciĝas la senmorta amo. Sed baldaŭ la promesoj kaj la amo estis forgesitaj en novaj furiozoj.

Eĉ kiam la fratoj el alia raso ridetis al ili, pluraj pensis, ke ili havas mortintojn por venĝi.

La deklivo ĉirkaŭ la etaĝo de Nergal estis tute kolorita per sango. Kaj la etaĝo de Nergal altiĝis ŝprucmakulite per sango.

Ĉar la malakordo inter Haik kaj Ner pri la koloroj de la Turo multigis la kverelojn kaj la interbataladojn. La venĝemo de la parencoj kaj amikoj de la mortintoj kaŭzis ankoraŭ pli multajn batalojn, batalojn ĉiutage pli multajn kaj pli furiozajn.

Kelkafoje Rifat diris :

- Kion ni faras sur tiu malbenita ebenaĵo ? Tiu turo, sur kiu oni batalis, sur kiu oni mortigis, jam ne havas voĉon sufiĉe puran por diri la amon de la homoj. Ni lasu tiun turon nefinita. Ĝi jam sufiĉe altas por krei nian frenezon. Ĉar ni ne estas plu en akordo, ni disiĝu. Ĉiu iru siaflanken kun tiuj, kiuj amas lin sufiĉe por plu ami lin.

Neniu aŭskultis Rifaton. Neniu volis foriri. Ĉiuj obstinis fini jam tro progresintan laboraĵon. Multaj esperis, ke ili vidos reveni la antaŭan harmonion. Aliaj

estis tenataj per akra venĝosoifo. Kelkaj timis, ke ili ŝajnus retroiri kaj timi.

Tiel Rifat, sole deziranta foriri, ne foriris.

## La etaĝo de Sin

Anstataŭ iri al la kunveno de la profetoj, kriante "Amon! amon!" por frapi fratojn, kiuj frapus lin, kriante "Juston! juston!", Rifat iun vesperon venis trovi en lia tendo Ner'on, la kaldean giganton.

La arkitekto estis kuŝanta surventre. Lampo lumis apud li, kaj li strekis sur la grundo necertajn liniojn, ofte forskrapitajn, foje redeseĝnitajn.

Li ekstaris, rigardis sen bonvolemo la viron, kiu ĝenis lian laboron.

Rifat profunde salutis, kaj diris :

- Se mia frato Ner volas aŭskulti min kelkajn momentojn, eble tio, kion ni diros estos utila al mia frato Ner, al lia frato Rifat kaj al niaj fratoj la homoj.

Ner malmilde respondis :

- Ci estas el tiuj, kiujn mi ne plu amas. Ĉar ci estas el tiuj, kiuj en la nomo de mi-ne-scias-kiu amo, kontraŭbatalas la juston. Ci estas el tiuj, kiuj kriante "Amon! amon!" malhelpas la laŭrajtajn venĝojn. Mi ne scias, ĉu ci estas el tiuj, kiuj unue konfuzis la ekvilibron de la gestoj, de la paroloj kaj de la spiritoj. Sed ci estas el tiuj, kiuj oponas al la justo, kiu restarigus la ekvilibron en la spiritoj, en la paroloj kaj en la gestoj. Mi ne scias, ĉu ci estas el la unuaj kulpuloj pri la militfrenezo, kiu skuas la tutan ebenaĵon de Sennaar. Sed ci estas el tiuj, kiuj, per sia soifo por paco sen justo, igas la militojn pli longaj kaj pli teruraj.

Rifat pensis :

- Ci, ci estas el tiuj frenezuloj, kiuj, ĉar ili ne sufiĉe amas siajn fratojn, estas maljustaj en la nomo

de justo.

Sed li eldiris nek tiujn vortojn nek aliajn similajn. Li nenion rebatis al akuzoj, kiuj ŝajnis al li egale vundi la amon, la juston kaj la racion. Li sciis, ke Ner ne komprenus tion, kion oni povus diri al li pri tiu temo.

Li kaŝis la larmojn, kiuj dronigis liajn okulojn, kaj milde diris :

- Ni lasu tiujn aferojn, se ci bonvolas, kaj ni kune serĉu iun rimedon por ĉesigi la kverelojn, la interbatadojn kaj la murdojn.

- Estas unu rimedo por ĉion pacigi, kaj por eterne, sed estas nur unu. Ci konas ĝin, kaj ci ĝin repuŝas. La mortigintoj estu mortigitaj, kaj ĉiuj spiritoj estos kontentigitaj, kaj ĉiuj koroj refariĝos pacemaj. Tiel longe, kiel oni ne donos al ni tiun panon de justo kaj venĝo, ni krios kiel malsatuloj, kaj ni strebos, kiel malsatuloj, kapti la panon de venĝo kaj justo.

- Ĉu ci volas, mia frato, ke ni turnu nian spiriton al malpli incitaj pensoj ?

- Mi estus malkuraĝulo, se mi obeus al ci. La kole-ro kontraŭ la malbono estas sankta kolero ; kiu batalas por la justo, tiu neniam rajtas pri io cedi. Tiel longe, kiel la justo ne estos farita, mi ne scipovos pensi pri io alia.

- Aŭskultu, mia frato.

- Mi ne estas cia frato. Mi ne estas la frato de tiuj, kiuj ne amas la juston.

- La homoj el cia raso kulpis murdojn kiel la homoj de mia raso.

- Sed la ciaj kulpis la unuan murdon, patron de la aliaj murdoj. La tuta verŝita sango refalu sur la ciajn.

- Frapu min ĝis mi mortos - diris Rifat - kaj cia koro estu satigita.

Ner faris paŝon malantaŭen:

- Ci, kiu estas senkulpa, volus morti anstataŭ la kulpulo ?

- Kulpa, senkulpa, mi nemulte plu komprenas tiujn vortojn. Jam kelkan tempon, ĉu ni ne estas ĉiuj povraj frenezuloj kaj lamentindaj viktimoj ? Se do la morto de unu Arjo povas pacigi la idojn de Sem, frapu min, kaj la idoj de Sem estu pacigitaj.

Sed Ner, post dentogrincado :

- Kun ĝojo mi cin frapus en batalo. Ci apartenas al popolo sufiĉe kulpa, por ke en batalo oni ĝoje frapu kiun ajn viron el tiu popolo. Sed, ekster la bataloj, mi frapos nur tiujn, pri kiuj mi estas certa, ke ili mortigis.

- Estus preferinde estingi la komunan frenezon.

- La justosoifo ne estas frenezo. Sen ĝi, tio estas nur malkuraĝo, kion ci nomas saĝo.

Rifat sin skuis kaj ruĝiĝis. Sed, sen malamike rebati la malamikajn vortojn :

- Aŭskultu. Kial ni estis longatempe fratoj, kaj kial ni estas nun malamikoj ? Aŭskultu...

- Ne al mi konvenas demandi tion ; konvenas tion demandi al la maliculoj, kiuj unue mortigis.

- Tion mi demandas al miaj okuloj kaj al mia spirito.

- Do kion diras ciaj okuloj, kaj kion diras cia spirito?

- Miaj okuloj kaj mia spirito diras : Dum oni konstruis la etaĝojn de Adar, de Iŝtar, de Marduk kaj de Nebo, la laboristoj restis saĝaj kaj fratecaj. De post kiam oni komencis la etaĝon de la kruela Nergal, la laboristoj estas sovaĝaj kaj malicaj.

- Mi vidas tion, kion ci vidas.

- Do ni estas viktimoj de la influo de Nergal.

- Vi, jes. Sed ni, ni batalas por la justo.

- Kiam la etaĝo de Nergal estos finita, ni refariĝos, tion mi esperas, bonaj kaj fratecaj.

- Post la etaĝo de Nergal ni devos konstrui la etaĝon de Sin. Nu, la dio Luno ne estas la dio de justo.



- La etaĝo de Nergal, kien ĝi atingis laŭ ciaj kleraj kalkuloj ?

- Proksimume la mezon.

- Kial ci ne haltigus ĝin ? Kiel grave, se ĝi havus nur duonan alton de la aliaj ?

- Estas grave, kaj ci parolas kiel malklerulo. La monumento tia, kia ci revas ĝin havus plu nek belecon nek proporciojn.

- Sed, se la homoj estus savitaj per tiu forofero...

Kaj Rifat faris emocian paroladon. Ner aŭskultis kun, sur la lipoj, rideto de malŝato.

Kiam Rifat eksilentis, Ner rebatis :

- Proporcio estas inter la partoj de konstruaĵo kiel justo inter la homoj. Se hodiaŭ mi ne povas restarigi la juston, punante la murdintajn Arjojn, almenaŭ mi lasos post mi monumenton, kies ekzaktaj proporcioj instruos la juston al miaj filoj.

Rifat rekomencis siajn petojn.

Ner interrompis lin :

- Ci vane parolas, kiam ci parolas kontraŭ la juston aŭ kontraŭ la proporciojn. Ci vane parolas, kiam ci petas arkitektan konsenti pri malbelaĵo, aŭ kiam ci petas bravan viron konsenti pri malkuraĝaĵo.

Li prenis minacan tonon :

- Ripetu al neniu la aferojn, kiujn ci diris al mi. Eble cia frenezo persvadus aliajn frenezulojn. Kaj, ĉar miaj similuloj neniam cedas al frenezo nek al maljusto, cia parolo estus la grajno de bataloj pli teruraj ol la bataloj, kiujn ci bedaŭregas.

Rifat foriĝis kun en la okuloj la larmoj de la dolora kompato kaj en la okuloj la larmoj de senpoveco.

Ner kriis al li :

- Malgraŭ ci kaj malgraŭ ciaj similuloj, ni konstruos la belon kaj ni konstruos la juston.

Rifat sin returnis ĝemante :

- Nenion daŭrontan oni konstruas sen amo.

Rifat ripetis al neniujn, kion li diris al Ner. Li ne volis ĵeti inter la homojn novan kaŭzon de malakordo kaj igi la batalojn pli teruraj.

Sed li promesis al sia koro, ke li ne iros al la kunveno de la profetoj dum oni konstruos la etaĝon de Nergal.

Li atendis kun angora espero la momenton, en kiu estos finkonstruita la malbonefika etaĝo.

Kiam la etaĝo estis finkonstruita, li ĉien kuris dirante, ke Nergal kaj la milito estas preterpasintaj, ke oni reeniras en la pacon kaj en la amon.

Oni akceptis liajn parolojn kun ravado. Oni ĉie ripetis ilin. Ĉiu trovis ilin plenaj de vero kaj de ĝoja gusto. Ner mem, kiu rifuzis aliigi la proporciojn de la monumento por savi la homojn, diris :

- Ni evitu ĉian kverelon. Ni finplenumu nian laboraĝon. Ĝia ekvilibra beleco instruos ĉiujn pri justo. Tiam Haik, Rifat kaj iliaj amikoj komprenos, rigardante la Turon kaj ĝian ekvilibron, ke necesas serĉi la kulpojn kaj restarigi la ekvilibron inter la homoj per justa repago.

Kun nova entuziasmo kaj aparta malpeziĝo oni komencis la kvar murojn dediĉitajn al la Luno. Tiu entuziasmo havis furiozegan karakteron. La retrovita frateco esprimiĝis per kolerecaj formuloj. Nu, la luno ĉiunokte pligrandiĝis, kaj ĝia monumento ĉiutage pligrandiĝis. Kiam la luno estis en sia pleno, la laboristoj, skipalternante, laboris tage kaj nokte. La kantoj altiĝis nokte kaj tage inter la ritmaj bruoj de la laboro. Kaj la fratecaj vortoj estis krioj ripetataj kaj insistantaj, la gestoj estis emfazaj, la amproklamoj ŝajnis leonblekoj, la kisoj sonoris kiel tondraj ekbruoj sur la buŝoj, kiujn ili lasis ruĝaj.

Kiam la luno malpligrandiĝis, jen la ardo al laboro kaj amo malpliigis. La korojn kaj la brakojn invadis langvoro, mola laciĝo, naŭzo pri la laboraĝo, kaj pri la aferoj, kaj pri la estaĵoj, kaj pri si mem. La vizaĝoj estis malgajaj ; la buŝoj silentaj. Oni evitis siajn

konatojn. Ĉiu renkonto kun konato similis al interbato kaj onin fuĝigis.

Kiam la astro ĉesis vidiĝi, la malnovaj koleroj revekigis kun plia akreco, la bataloj estis pli longaj ol iam kaj pli mortigaj. Sed poste la ploroj fluis pli abunde ; la bedaŭroj kaj la rimorsoj esprimiĝis per senmezuraj vortoj kaj gestoj. Pluraj ne povis elporti la abomenindan rememoron, ke ili frapis sian fraton. Ili sin ĵetis malsupren aŭ iris droni en Eŭfrato.

Nu, la dua lunmonato dediĉita al la konstruado de la etaĝo de Sin vidis la samajn fenomenojn rekomenciĝi laŭ la sama ordo, en la sama ritmo, sed kun pli granda intenso. Malofte oni aŭdis parolon, kiu ne estis, en unu aŭ alia direkto, parolo de frenezo.

Kiam la astro duafoje kaŝiĝis, nova frenezo ekkaptis la homojn. Unue mallaŭte, poste laŭte, fine krie, oni asertis, ke senditoj de la reĝoj kaj de la pastroj sin ŝovis inter la laboristoj, por ilin kaŝe observi kaj eksciti iliajn malakordojn. Tuj kiam, eĉ pri plej bagatela temo, du viroj estis en malakordo, ili reciproke sin akuzis esti venditaj al la reĝoj kaj al la pastroj. La bataloj estis ne nur pli freneze mortigaj ol dum la konstruado de la etaĝo de Nergal ; plie, kio ĝis tiam neniam okazis, oni sin reciproke spionis, oni frapis surprize aŭ dum la dormo, oni metis mil insidojn, oni faris mil perfidojn kontraŭ tiuj, kiujn oni nomis perfiduloj.

La aero estis simila al veneno. La malbono, kiu estis en la aero, estis la malfido. Oni ne marŝis sen abrupte sin returni ĉiun trian aŭ kvaran paŝon. Kaj neniu kuraĝis dormi.

Maltrankvilaj homoj hazarde vagadis dum la tuta nokto. Matene ili rakontis timegindajn renkontojn. Ofte ili ekvidis la monstrajn filojn de la luno, grimacantaj, fuĝantaj, revenantaj, formantaj frenezajn rondodancojn. Tiuj monstroj grimacis per simia vizaĝo aŭ dancis sur du azenaj piedoj.

Iun vesperon, multaj homoj iris kun Purnapurjas, la klera sorĉisto, kiu, oni memoras, tiel perfekte resanigis Sulaj'on. Nun li promesis kuraci la universalan frenezon.

Per la pinto de tranĉilo el ŝtono, Purnapurjas strekis vastan kvadraton, interne de kiu li restis kun hundo. Ĉe du diagonalaj anguloj li desegnis du lunarkojn ; en la tria angulo cirklon reprezentantan la plenan lunon ; la kvara, simbolanta la novlunon, ricevis neniun signon. Ĉe la centro de la figuro la sorĉisto buĉoferis la hundon. Dum fluis la sango de la bojanto, Purnapurjas kun levitaj brakoj alvokis la dion :

"Venu, venu, venu ;

"Infera, tera kaj ĉiela Sin.

"Dio de la grandaj vojoj kaj de la vojkrucoj ;

"Kiu alportas la lumon en tenebroj ;

"Kiu nokte marŝas ;

"Malamiko de la brutala kaj sensurpriza tago ;

"Amiko kaj kunulo de la noktaj dolĉaĵoj kaj de la noktaj timegoj ;

"Kiun ĝojigas la bojo de la hundoj kaj la elverŝita sango ;

"Kiu vagas inter la ombroj kaj inter la tomboj ;

"Kiu deziras la sangon kaj vokas la timegon ;

"Milforma luno,

"Rigardu per favora okulo nian oferon...

"Por ke vi domaĝu la sangon de la homoj,

"Ni oferas al vi la sangon, kiun vi preferas,

"La sangon de hundo, kiu ofte bojis al vi."

La potenca Purnapurjas ne parolis al dio sen ricevi respondon de la dio. Li subite ekkriis :

- Silenton, silenton, plej respektan silenton ! La buŝoj de la homoj restu mutaj de teruro kaj duonmalfermitaj de atento. La voĉo de dio parolas al mia orelo. Mi aŭdas, mi aŭdas la voĉon de Sin.

Kun la okuloj plilarĝigitaj, la kapo iome klinita, la maldekstra mano ĉe la orelo, la dekstra levita, en gesto samtempe kvietiga kaj mira, Purnapurjas aŭskultis misteran parolon, kiun ne aŭdis la aliaj homoj. Tamen la amaso, instinkte imitante lian teniĝon, ŝajnis aŭskulti kiel li.

Fine, radia, Purnapurjas proklamis :

- Parolo de Sin : Se la homoj de la ebenaĵo de Sennaar volas ricevi mian kompaton, kaj ke mi denove permesu al iliaj koroj la amon kaj la pacon, jen estas tio, kion mi

ordonas.

"La homoj de la ebenaĵo de Sennaar skulptu statuon el bone glatigita ligno. Ili faru la korpon de tiu statuo el radiko de sovaĝa ruto. Ili ĝin ornamu per malgrandaj lacertoj. Kiom da diversaj formoj mi havas, tiom da lacertoj ili pendigu de mia statuo. Poste ili pistu kun aliaj lacertoj mirhon, stirakon kaj incenson. Tiam mi aŭskultos la dezirojn, kiujn vi direktos al mi. Eĉ, se tion farante vi kronos vin antaŭ dormo per branĉoj de sovaĝa laŭro, mi aperos dum ilia dormo al tiuj el vi, kiujn mi plej amas."

Tiuj ritoj estis plenumitaj laŭ la ordono. Kaj dio Sin aperis en la sonĝoj de pluraj. Kiam Arjo ĝin vidis en sonĝo, dio Sin havis ridetan vizaĝon, kaj ĝi ordonis: "Amu ĉiujn viajn fratojn. Se unu el ciaj fratoj faris iun malbonon, pardonu al li. Ĉar la amo ĉion pardonas." Kiam dio Sin aperis en la sonĝo de ido de Sem, dio Sin havis, inter fulmotondraj nuboj, timindan vizaĝon. Kaj ĝia tondra voĉo ordonis: "Amu la juston pli ol cian vivon kaj pli ol la vivon de ciaj fratoj. Prenu nenian ripozon, ĝis la justo estos pacigita. La viktimoj devas esti venĝitaj kaj la murdintoj punitaj. Ĉar la tero estas malpura, ĉar la tero estas malbenita, ĉar la tero ŝanceliĝas sur sia bazo tiel longe, kiel la krimo restas nepunita kaj la kontuzita senkulpulo restas sen venĝo."

Tial la interbatadoj rekomenciĝis. Eĉ tiuj, kiuj plej esperis je la kleraj sorĉaĵoj de Purnapurjas, de nove malesperis.

En tiuj tagoj, meze de la universala konfuzo, kelkaj grupoj forlasis la malbenitan ebenaĵon.

En tiuj tagoj la disŝirita koro de Rifat ekspertis grandan ĝojon. Ĉar Tel-Loh diris al li:

- Estu feliĉa, mia Rifat. Kion ci deziris, tio estas plenumita, kaj mi sentis mian sinon moviĝi.

Tiam Rifat ĝemis:

- De antaŭ longa tempo mi ne povas plu ion por tiuj homoj. Nun tiuj homoj povus tromulton kontraŭ mi. Ni fuĝu, ho portantino de estonteco, timante, ke tiuj homoj mortigos mian tre amatan, kaj kun ŝi la tre amatan

estonton, kiun ŝi portas.

Rifat, Tel-Loh kaj kelkaj aliaj jungis la ĉevalojn al siaj ĉaroj kaj aranĝis sur siaj ĉaroj la fostojn kaj la feltaĵojn, kiuj formas la tendojn dumnokte. Ili foriris al Nordo. Ili longe marŝadis sur la ebenaĵo, ili longe marŝadis sur la montaro. Ili fine sin instalis en sekreta enfalda valo por tie fondi popolon, kiu eble estos saĝa.

Nu, la popolo, kiun en faldo de monto fondis Rifat kaj liaj kunuloj, estis nek pli bona, nek pli malbona ol aliaj popoloj. Ĝi spertis, kiel la aliaj popoloj, sennombrajn malfeliĉojn, kaŭzitajn de ĝia frenezo kaj de najbaraj frenezoj. Pli malbonajn ol la plej malbonaj suferoj, ĝi spertis, kiel la aliaj popoloj, sennombrajn ĝojojn de malamo kaj venko. Pli ol unu fojon ĝi devis ŝanĝi sian loĝejon. Ĝisfine ĝi venis en la okcidento de la tero en landon, kiu poste nomiĝis Gallio.

## Ĉapitro XI.

# Supre

La etaĝo de la Luno estis finkonstruita. Kun la sama ĝojo kaj la sama espero kiel oni estis ĝin komencinta, oni ekkonstruis la lastan etaĝon, tiun, kiun Ner, en sia spirito, dediĉis al la Suno.

Kun pli da ĝojo kaj pli da espero. Post tiu nova laboro, la laboraĵo, perfekta, prezentos al la okuloj sian ekvilibran majeston. La kutimo nur postulis, ke oni kronu ĝin per eta kapelo, kies konstruado necesigus du tagojn.

Sendube la suno, patro de la lumo, anstataŭigos per sia bonefika influo la malbonefikajn influojn de Nergal kaj de Sin. Ĉiuj spiritoj estos lumigitaj per saĝo. Ĉiu koro radios kiel suno de amo.

La nombro de la laboristoj kaj la nombro de la profesoroj estis etproporcie malpliigita. Sed ĉu malpliigis la nombro de la homoj, kiuj baraktis sur la ebenaĵo de Sennaar? Kelkaj asertis, ke ĝi pliigis.

Sur la tuta tero etendiĝis famo pri la favora akcepto farata al la masonistoj de la Turo de l'Popoloj. Oni sciis, ke la kamparanoj de Mezopotamio sendadas aŭ alportadas nutraĵojn kun benvortoj; kaj ili nenion akceptis interŝanĝe je la nutraĵoj aŭ la trinkaĵoj. Allogite per tiuj rakontoj, kiel la soifo estas vokata de murmuro de fonto, alkuris pluraj homoj, kiuj havis neniun deziron labori, sed volis esti nutrataj sen laciĝo kaj sen devigo. Sennombraj sklavoj el la urboj, kutimigitaj al pigreco per la neglektema servado en la palaĉoj kaj la templöj, serĉis en Sennaar ankoraŭ pli da pigro kaj da ripozo.

La alveno de la unuaj koincidis kun la komenco de la kvara etaĝo dediĉita al Nebo, kiu, kiel la Hermeso de la estontaj Grekoj aŭ la Merkuro de la estontaj Latinoj,

estis la dio de la praktika inteligento, la protektanto de la ruzoj kaj de la mensogoj, la amiko de la oratoroj, de la vendistoj kaj de la ŝtelistoj. Tiel longe, kiel la pigruloj estis malmultaj, oni fratece akceptis ilin. Cetere, ne ĉiam estis facile ekkoni ilin. Ili iris de grupo al grupo, fanfaronante matene pri sia laboro de la antaŭtago, celebrante vespere sian laciĝon de la mateno.

Sed ilia nombro rapide kreskis. Ĝi sendube pleniĝis, kaj supermezure, la malplenojn kaŭzitajn de la foriro de kelkaj grupoj.

Pigruloj, kiuj estus nur mallaboremaj, meritis esti honorataj kiel dioj aŭ reĝoj, kiuj farus nenian malbonon. La pigruloj de Sennaar estis disputemaj, kverelemaj kaj malkuraĝaj. Ili pli ol ĉiuj kunhelpis por nutri la malakordojn. Tuj kiam kverelo fariĝis batalo, ili deflankiĝis por rigardi de malproksime la emocian spektaklon. Aŭ ili iris rabi tie aŭ ĉi tie ; poste, kunvenante en iu ĝoja angulo, ili sin fordonis al bona manĝo kaj ridante drinkis, dum oni sin intermortiĝis pro ilia kulpo.

Oni fine ekkonis la pigrecon de pluraj, ilian danĝeran intrigan spiriton, iliajn malnoblegajn festenaĉojn. Oni malŝatis ilin ; oni evitis aŭ insultis ilin. Ner, Haik kaj Etana egale diris : "Ja necesos, ke la abeloj ekdecidu mortigi la krabrojn." La "krabroj" malaperis. Ĉu ili foriris, aŭ, en la vastega ebenaĵo de Sennaar, ĉu ili ŝanĝis siajn tendumajn lokojn kaj siajn kutimojn ? Sur alia punkto ili fariĝis hipokrituloj kaj labor-fanfaronuloj. Oni vidis ilin viŝi sur sia frunto imagitan ŝviton. Iafoje ili portis du aŭ tri brikojn, kriante kaj taŭzante. Kaj ili akuzis laboristojn pri malrapideco kaj manko de fervoro.

Nu, la pigruloj sin interkonis ; kaj ili sciis kaŝitajn lokojn, en kiuj ili kunvenis por ekscese manĝi, trinki ŝtelitajn vinojn, ridi pri la Turo de l'Popoloj kaj pri la naivaj laboristoj de la Turo de l'Popoloj.

Kiam la frenezo de malfido disvastiĝis sur la ebenaĵo de Sennaar, oni akuzis "la krabrojn", ke ili estas senditaj de la reĝoj kaj de la pastroj por kaŝobservi tion, kio estas farata, por eksciti la malakordojn kaj



igi la masonistojn de la frateca laboraĵo intermortigi sin.

Ekde tiam, ĉiu ebria renkontito estis mortigita senkompe kaj senskrupule. Sed la parazitoj plu ebriiĝis nur en la sekreto de la nokto ; ili dormis en nekonataj kaŝrifugejoj aŭ sub sia tendo, ĝia ilia ebrieco estis forpasinta. Se iu venis ilin veki, ili pene levetiĝis, poste, refalante sur sia mato, ili plendis pri siaj membroj doloraj pro laceco kaj laboro. Kaj ili petis, ke oni alportu iom da vino por revigligi ilian malforton.

Tiuj homoj havis langojn de serpentoj. Ilia parolo estis la siblo, kiu ekscitas la malamon ; ilia parolo estis la veneno, kiu verŝas en la koron la malvarmon de la malfido.

Neniu pli lerte flatis la militeman vantecon de la gigantoj. Neniu pli incitis la akran ĵaluzecon de la gigantoj. Multobligante antaŭ Haik la laŭdojn al Haik, ili malŝate diris la senpovan ĵaluzon de Ner kaj de Etana. Multobligante antaŭ Ner la laŭdojn al Ner, antaŭ Etana la laŭdojn al Etana, ili akuzis Haikon, ke li aspiras al tiraneco.

La matenon, kiam oni estis ekkonstruonta la etaĝon de la Suno, kelkaj el tiuj viroj venis al Haik kaj demandis lin :

- Kiu estas la penso de cia potenca spirito ? Ĉu endos sur la supro de la konstruaĵo starigi la kutiman kapelon? Se, laŭ la kutimo, ni starigos la kapelon, ĉu necesos ĝin orumi kiel la kapon de la ziguratoj ? Kaj, ĉu ĝi estos orumita aŭ ne, al kiu dio ni ĝin dediĉos ?

Sed aliaj, veninte al Ner, diris al li :

- Inĝenia kaj potenca arkitekto, la orumita kapelo, kiun ni starigos sur la supro de la Turo, al kiu dio ni ĝin dediĉos ?

Ner kaj Haik ne respondis. Sed ili restis pensemaj. Tiun tutan tagon ili laboris malrapide : pli pezan ol la pezo de la materioj, ili portis, malstabilan ŝarĝon kaj barakton, penson, kiu ne estis jam penso. Foje ŝajnis al ili, ke iliaj okuloj blindiĝis ĉe plej belaj lumoj ; foje ili kredis marŝi en tenebroj.

La morgaŭon, antaŭ la apenaŭ komencita sepa etaĝo, la du gigantoj, ne sin serĉinte, interrenkontis.

Haik bonvoleme demandis :

- Ĉu ci intencas laŭkutime konstrui kapelon sur la supro de la Turo ?

- La gracio kaj la svelta altiĝo de la konstruaĵo postulas tiun kronon.

- Ĉu tiu kapelo estos orumita ?

- Oro estas la koloro de la kronoj.

- Se ci bonvolas, - diris Haik daŭre ridetante - ni dediĉos tiun kapelon al Amo.

- Mi ne amas Iŝtar'on.

- Kiu diris pri Iŝtar ?... Ni dediĉos la kapelon, kiel la tutan Turon, al la Amo kaj al la Frateco inter la homoj.

- La homoj estas filoj de sama patro. Sed tro da Kainoj mortigis tro da Habeloj. La homoj refariĝos frattoj en sia koro kiam, pro tio ke la repago estos restariginta la ekvilibron per la murdintoj, la justo sidos sur trono en la koro de ĉiuj homoj.

- Rifat la profeto kutimis diri : "La justo, kiun vi konsentas, estas la komenco de amo." Ĉu ci forgesus, ke li aldonis : "La justo, kiun ci postulas, estas la komenco de malamo"?

"Kaj li plie diris : "Tiel longe, kiel vi ne amas, vi postulas la juston, kaj vi ne sukcesas konsenti la juston. Tiel longe, kiel ci ne cin lumigas per la lumo de amo, cia parto ŝajnas al ci pli malgranda, kaj la parto de cia frato pli granda, eĉ se la partoj estas egalaj. Tial ci postulas ion de cia frato, kaj ci akuzas cian fraton. La justosoifo, kiu ne estas reguligata kaj pacigata per amo, igas vin maljustaj, ĝis ĝi iafoje faras el unu el vi murdanton. Se do ci bonvolos, Ner, sen malfacilo ni interakordos. Ni kunigu la dion, pri kiu ci diras, kaj la dion, pri kiu mi diras. Ni dediĉu la kapelon al Amo patro de Justo.

- Ci nemulte eraras - diris Ner. Ni ĝin dediĉos al Justo patrino de Amo.

Nun ĉiu el la gigantoj sin laŭdis en sia koro, ke li konsentis al sia frato ĉiujn eblajn cedojn. Ne ricevante la dankojn, kiujn meriti li kredis, li akuzis sian fraton pri maldankemo. Ĉu li ne iris al sia frato pli ol duonon de la vojo ? Ĉar ankoraŭ restis distanco inter ili, tio estis kulpo de lia frato.

Malantaŭ ili formiĝis du multopaj amasoj. Al iliaj oreloj altiĝis krioj. La krioj de la Arjoj subtenis la amikon de amo, poste ili insultis en Ner "la malamikon de amo." La krioj de la idoj de Sem apogis la amikon de justo, poste ili insultis Haikon, "malamikon de justo".

Mil etaj kvereloj ekbrulis ; mil sparkoj ŝprucis, kiel al amaso de seka ligno, al la ankoraŭ kaŝita kverelo de Ner kaj Haik.

Nu, Semido frapis Arjon, kiu staris proksime de Haik. Kaj la giganto, ido de Jafeto, abrupte frapante la viron frapintan, lin renversis sub la nerezistebla potenco de sia pugno.

- Ĉu ci ne hontas frapi tiun malfortulon ? - ekkriis Ner. Se cia amo postulas, ke ci frapu, almenaŭ frapu egalulon. Kiam mi ĉeestas, se la frenezo, kiun ci nomas amo, postulas, ke ci frapu, min solan ci devas frapi.

- Pardonu min - milde diris Haik -, mia mano estis pli rapida ol mia penso. Miaj okuloj vidis atakon kontraŭ homon el mia raso ; antaŭ ol mia spirito ekkonis, kion faras mia brako, mia brako defendis tiun, kiun oni atakis.

Ner levis la ŝultrojn ; sed li nenion respondis.

Bedaŭrinde Haik aldonis :

- Malsata pri justo, ci devus aplaŭdi mian justan agon. Mi frapis tiun, kiu estis frapinta. Ĉu ne estas tio, kion ci laŭdas sub la nomo repago ?...

Dum Ner incitiĝis kaj streĉiĝis, ankoraŭ silente, sub la ironio, pluraj, sin klininte por helpi la falintan Semidon, sin relevis dirante :

- Li estas mortinta.

Tiam Ner, posedata de la demono de venĝo :

- Fiulo, kiu aŭdacas diri la nomon justo, ci mortigis

tiun, kiu ne mortigis. Fiulo, kiu aŭdacas paroli pri amo, tuj kiam ci renkontas homon pli malfortan ol ci, necesas, ke tiu homo obeu aŭ mortu.

Prenante brikon per ambaŭ manoj, li bategis per ĝi Haikon, kriante :

- Ĉar ci mortigis, ci mortos.

La popoloj sin ĵetegis al batalo. Malgraŭ la teruraj penoj de Ner kaj de Haik por sin atingi kaj sin interbati, senpacienca aro amasiĝis inter ili, pli kaj pli forigante ilin unu de la alia.

La ekzemplo de Ner estis kontaga. Oni jam ne batalis, kiel en la antaŭaj interbatadoj, per la solaj rimedoj de sia korpo, per la pugnoj, la piedoj kaj la dentoj. Oni bategis per brikoj. Ĉar la materioj kunmetitaj por la laboro ne sufiĉis al la batalantoj, kies nombro grandiĝis kiel riverego dum la neĝfandado, oni malkonstruis la skafaldon, oni komencis malkonstrui la monumenton.

La Semidoj kriis :

- Ni detruu tiun senutilan turon, kiu ne povis instrui juston al la maliculoj.

Sed la Arjoj kriis :

- Ni detruu tiun turon, kiu ne povis instrui amon al la estuloj de malamo kaj venĝo.

En la ardo de la batalo, neniu rimarkis polvonubojn, kiuj leviĝis kiel sub la paŝoj de multopa amaso. Neniu rimarkis, ke strangaj ekbriloj traboras tiun polvon. Tamen, tra la densa polvo, strangaj ekbriloj similis ian moviĝantan arbaron el metalo. Neniu rimarkis, kio okazas malsupre. Tamen potenca armeo veninta el Sudo antaŭeniris al la ebenaĵo de Sennaar, kiun kovris senarmilaj homoj. Tiel falĉistoj kaj iliaj falĉiloj antaŭeniras al la senarmila konfuzo de la herboj.

Ĉu estas tiu polvonubo, kiu, plidensigite kaj proksimiĝinte, fine kaŝis la sunon al ĉiuj okuloj ? Ne. La tago fariĝis pli nigra ol senluna nokto. Ekfalas brutala pluvo. Sed nenio, ŝajne, estingos la batalon de la kolero. Fulmoj ŝiris kaj sangofarbis la tene-

bron ; tondroj sonegis ; akvo falegis el la kaskadegoj de la ĉielo, abunda kaj fortega kiel en la rakontoj pri la diluvo.

La furiozo de la meteo aldoniĝis al la furiozo de la homoj. Malbonstruante la Turon kaj ĵetante rubojn sur siajn kontraŭulojn, la Semidoj kriis :

- Elohim incitiĝis kontraŭ la maljustecon de tiuj homoj. Elohim estas kun ni por helpi nin frapi tiujn maljustajn homojn.

Sed la Arjoj kriis :

- La dioj incitiĝas kontraŭ la malicon de niaj malamikoj. La dioj estas kun ni ; ili helpas nin frapi niajn malamikojn.

Kiel incendio en la densa varmo de arbaro en somero, la batalo vastiĝis. Aŭ pli ĝuste, ĉu ĝi ne estis torento, kiu, ŝtupon post ŝtupo, invadis la tutan Turon ? Laŭlonge de la senfina deklivo, la manoj sangokovriĝis, deŝirante brikojn, kiuj baldaŭ frakasos kapojn aŭ krevigos ventrojn.

La batalo, plu daŭrante, fariĝis pli kaj pli konfuza. Certe, ĉie Semidoj kaj Arjoj sin ĵetegis unuj kontraŭ aliajn. Sed nur tute supre la divido konservis ian netecon. Ekde la etaĝo de la Luno, la frenezo fariĝis strange konfuza ; mil detalaj malamoj miksiĝis kun la ĝenerala malamo, ofte ĝin superis. En mil lingvoj oni sin reciproke insultis, oni sin provokis, oni sin malŝatis. La subitaj koleroj kaj la kontaĝo de frenezo pli komplikis la senroman bataladon. Multaj frapis, ne sciante kial ili frapas kaj kiun ili frapas ; multaj mortis, ne komprenante pro kio ili mortis, kaj pro kies battoj.

La fulmotondro pliintensiĝis. Tiuj, kiuj batalis kontraŭ rason kaj kontraŭ tion, kion ni nomus fremda idealo, distingis en la bruegoj kaj la furiozoj de la fulmotondro plej klaran kaj plej favoran dian intervenon. Ili sentis grandiĝi en ili la kruelan instinkton, kiun ili nomis kuraĝo kaj sankta kolero.

La interveno de la ĉielo fariĝis pli terura. Ĉiuj homoj estis balancataj kaj naŭzataj kiel sur ŝipo svingata de ŝtormo. La tero estis nun ŝipo, kiun renversas oni-ne-scias-kiu tempesto de dioj. La Turo, ŝanceliĝante

sur sia fundamento, tute oscilis. La skafaldo falis, murpartoj disfalegis. La materioj, starigitaj en monumento de frataj homoj, senforme falis sur la homojn dividitajn, premegis la miksitajn kontraŭulojn, ilin kovris sternitajn sub la sama abrupta tombo.

## Ĉapitro XII.

# Malsupre

Inter la krioj ĵetitaj en mil lingvoj, de sur ĉiuj etaĝoj de la Turo, la popoloj sin intermortigis. La ventoj de la furiozo, la ventoj de la fulmotondro, la tremoj de la tero skuis, ĉe la dudek ok anguloj de la ŝtupdeklivo, girlandon da hurloj, da batoj kaj da murdoj. Sango riverege fluis de la supro ĝis la bazo ; ĉiu ŝtupo estis, lanta kaj glueca, ruĝa kaskadeto ; ĉe ĉiu angulo la likvaĵo refluis kaj reŝprucis. Kiam fulmo iluminis la ŝanceliĝantan monumenton, ĝia koloro, abrupte ekvidata, ĝin tutan dediĉis al la kruela Nergal.

La krioj de la batalantoj, la furiozegaj rulbruaĵoj de la fulmotondroj, la frakaso de la disfaloj malhelpis aŭdi la bruojn de malsupre. Eĉ se la okuloj de la animo ne estus tute kaptitaj de la batalo kaj de ĝia konfuzo, la densaj tenebroj ne estus ebligintaj vidi tion, kio okazas malsupre. La profetoj implikataj en la lukto pensis pri la primitiva kaoso. Kelkaj kriis, neaŭdeble, ke la mondo finiĝos en la sama hororo, kiu antaŭis la genezon. Ili lamentis la morton mem de la dioj, kiujn ili kredis vidi konfuze fali de la ĉielo kun la pluvo, falegi kun la tondroj, bruli kaj estingiĝi kun la fulmoj.

Sur la ebenaĵo la bruo ne estis malpli granda ol laŭlonge de la Turo, nek la konfuzo, nek la amaso kaj la vertiĝo de la murdoj.

Urĥam estis ĵus alveninta kun siaj soldatoj. Ili estis armitaj per sagoj, per mallongaj glavoj, per lancoj kaj per bumerangoj ; aliaj portis pezajn hakilojn el ŝtono fiksitajn al la tenilo per bituma gluaĵo simila al sekiginta sango. Ĉiuj estis ŝirmataj per malgranda ronda ŝildo kaj per konusa kasko. Sub la lino de iliaj eksteraj vestoj, remburaj formis kirason.

Urĥam komandis sennombran armeon. La patesisoj de

Ereĥ, de Agane, de Sippara, de Niffer, de Larsam, de Eridu kaj de Sirtela provizis lin per ĉiuj siaj tru-  
poj kaj eĉ per sia persona gvardio. La ordono estis  
senkomplete frapi la homojn kuniĝintajn sur la ebenaĵo  
de Sennaar.

Ĉiuj fuĝis antaŭ la terure ĝojaj krioj de la solda-  
toj, antaŭ la potencega sonado de la armiloj. Sed,  
krom en la abrupta blindigo de la fulmoj, la tenebra  
fulmotondro lasis nenion vidi. Sed la brua fulmotondro  
ne lasis distingi, de kie venas la militaj bruoj. Ofte  
oni fuĝis ĝuste al tio, kion oni volis eviti. Multoblig-  
ante la blindpalpajn batojn kaj la blindajn murdojn,  
ofte la soldatoj frapis unuj aliajn.

Neniu rezistado en tiu nearmita amaso, en tiu frenez-  
igita multularo, kies tendojn forportis la fulmotondro  
en la rikanado de la ventoj, kies ĉarojn renversis la  
ventoj de la skuata tero, en la frakaso de la tondroj.  
Kaj la homoj ŝanceliĝis kaj falis sub la fortego de la  
ventoj, sub la fortego de la akvoj, en la ŝtormo de la  
tero. La akvoj torente kuris al Eŭfrato. Ili saltegis  
kiel rajdantoj fuĝantaj post rabado ; ili hastis, ŝargê-  
ite per predo konsistanta el tendotoloj, materioj, ka-  
davroj, vivantoj malespere luktantaj, aŭ sin forlasan-  
taj, aŭ svenantaj.

Tamen sur unu loko, la giganto Etana, ĉirkaŭata de  
malmultaj kunuloj, frapmortigis soldatojn per brikbatoj.  
Por vidi la malamikojn, kiuj alproksimiĝas al lia furio-  
zo, li ekbruligis grandan puton de bitumo. Kiam li kap-  
tis ankoraŭ vivantan soldaton, li nigra giganto, kun  
ahano\* kaj rido, ĵetis sian predon en la bolŝaŭmon de  
la asfalto. La granda bitumputo brulis kiel vastega  
lampo. Volvata en nigraj fumo, batata de la ventoj kaj  
de la pluvo, skuata en la tremoj de la tero, blua flamo  
iafoje altiĝis al la ĉielo en abrupta uragano, pli ofte  
refalis, rampis en mil riveretoj aŭ en larĝa tavolo,  
kiu fore fandis la estulojn kaj la aĵojn.

---

\* ahano (onomatopeo) : bruo de pena spirego, kiel tiu  
de frapanto per hakilego ( = proksimume anhelego).



Ĉiuj ne sciis, de kioma tempo oni buĉis en la tenebro. Ĉu la noktaj horoj ne jam sekvis la tagajn horojn, sen ke io anoncis ilian alvenon? Pluraj kredis, ke la mondo eniĝis en eternan nokton. Kredeble neniu revidos la dolĉan lumon. Ĉiuj mortos en la stabila mallumo kaj sub la altiĝantaj akvoj de nova diluvo. La kaldeaj profetoj sin demandis, ĉu ie estas en arkeo iu nova Ksisutros kun la tuta semo de vivo.

La fulmotondro tamen pacigis siajn blekegadojn. La tondroj eksilentis en la ĉielo, kiun ne plu traŝiris la fulmoj. La pluvo, malpliigita, falis senbrue, kiel larvoj. Tiam pluraj ekabomenis la bruegon de la krioj kaj batoj. Pluraj ekabomenis sin mem kaj la homojn. Ili mal-supreniris de la Turo, ili fuĝis al la ebenaĵo, serĉante la eksteran pacon, eble serĉante la solecon kaj la liberon por ŝiri sian koron. Ili falis en plian konfuzon, inter egalaj furiozkrioj, inter pli angorigaj furiozkrioj. Ili plu fuĝis en konfuza fuĝado de freneziga grego, kiu erarvagis, sin batas kontraŭ aliaj forkurantoj, turniĝas ĉirkaŭ si mem kaj malesperas.

La tagiĝo ekaperis, palega kiel vidvino.

Kion ĝi lumigis, tio emociis eĉ la plej kruelajn. La lastaj batalantoj de la Turo sin vidis en malgranda nombro, ĉiuj vunditaj, inter la amasoj da kadavroj, rampadoj de stumpigitoj, tremegoj de agoniantoj.

Ili ektimis tion, kion ili faris.

En freneza kurado, ili forlasis la malbenitan monumenton, kuris al la espero bandaĝi siajn vundojn, pacigi sian malsaton kaj sian soifon. Ili fuĝis precipe de la plej abomeninda spektaklo. Riske je plej danĝeraj batoj aŭ faloj, iam ili kuris kun fermitaj okuloj. Ho ve! kien ajn ĝi direktiĝis, ilia fuĝado ĵetis ilin en tiom barbaran spektaklon.

Kelkaj ĉesis esperi, falis en la ŝlimon, konsternite, inertaj spirite kiel korpe, aŭ kredigante al si, ke tuj poste la inkubsonĝo per si mem malaperos.

La plimultaj sin lasis forporti sur la ebenaĵo en ia konfuza grupo de fuĝantoj. Aliaj, antaŭ tio, kion ili vidis, perdis la konscion, kriegis senkonsekvencajn vortojn, gestis per emfazaj, senartikigitaj, neutilaj brakoj.

Iuj sentis renaskiĝi sian furiozon. Ili kolektis brikojn por batmortigi soldatojn, aŭ freneze ili atakis, per siaj sangantaj pugnoj kaj siaj kontuzitaj piedoj, la militistojn armitajn per lancoj, hakiloj kaj glavoj.

Tri tagojn kaj tri noktojn la murdado disvolvis sian furiozon sur la vastega ebenaĵo de Sennaar. La soldatoj alternis por tiu longedaŭra tasko. Sub la ĉielo rekvietiĝinta, la tero, kiu ne plu tremus sen la homa frenezo, restis vasta fulmotondro de demenco, kolero kaj teruro. En la frenezo de tiu fulmotondro, en tiu kolero kaj tiu teruro, la homoj kirliĝis kiel, en la konfuzo de la ventoj, la folioj deŝiritaj de la arboj.

Preskaŭ ĉiuj fine falis sub la batoj de la soldatoj aŭ sub la pezo de la laceco kaj la premezo de la malespero.

Kelkaj fuĝis al Nordo. Neniu raso, neniu tribo, neniu familio, neniu grupo de amikoj konservis eĉ malplej grandan koherecon. En la sovaĝa disiĝado, malmultaj izoluloj evitis la multajn danĝerojn. Sed ofte ili revenis por retrovi kaj savi la amatojn, aŭ por morti najbare de ilia morto. Ĉiu tion sentis : en altiĝo de furiozo, li frapus homon, kiu antaŭ li parolus la komunan lingvon. Tiel ĉiu demandis la renkontatojn en idiomo, kiun tiuj ne komprenis. Kaj la gesto de la brakoj, la movo de la kapo respondis, samtempe kiel nekonataj vortoj : "Mi ne komprenas."

Post tri tagoj kaj tri noktoj da murdado, Urĥam diris al siaj kapitanoj, kaj la kapitanoj rediris al la soldatoj :

- Fine la punado de tiuj malpiuloj egalas la abomenon de ilia sakrilegio. La dioj estas satigitaj de oferoj. Nun ni faru sklavojn, kaj mortigu nur tiujn, kiuj rezistas.

Neniu rezistis. Tamen la soldatoj plu masakradis. La ebriulo des pli soifas, ju pli li drinkis ; ju pli vi mortigis, des pli, kiel longe daŭras la ebrieco de murdado, vi volas mortigi.

Neniu rezistis. Halk kaj Ner estis du kadavroj en

la disfaloj de la Turo. Etana estis kuŝanta senviva apud la bitumpoto, kiu, sur brua bolŝaŭmado, daŭre starigis bluan flamon kaj nigran fumon. Ĉiu, kiu havis forton, kuraĝon aŭ lertecon, estis mortinta aŭ forfuĝinta.

Mankis katenoj por la multo de la sklavoj konkeritaj de Urĥam, la plej glora el la reĝoj.

Hamurabi, la plej klera el la pastroj, diris al Urĥam, la plej glora el la reĝoj :

- Belegaj kaj daŭraj festoj celebros en Kalanna cian sensimilan venkon kaj la senegalan favoron, kiun la dioj al ci manifestas. Sed la ĵaluzo de la dioj estas senpacienca. Decas, ke ci unufoje esprimu al ili dankon, ĉi tie, sur la tereno de la senkompara gloro, kiun ci dividas kun ili.

Do komenciĝis la festo, plurajn monatojn daŭranta : necesis multe da tempo kaj da ceremonioj por inde ĝoji pri tiel multaj murdoj kaj tiel abunda favoro de la dioj.

Sur la ŝultro de siaj oficiroj, en la kanto de la instrumentoj, en la vento de grandaj ventumiloj, Urĥam, la potenca reĝo, la reĝo de la mondo, reĝo de Kaldeo, reĝo de la Sumeranoj kaj de la Akadanoj, kiu reĝas de la levigo ĝis la kuŝigo de la kvar ĉielaj regionoj, ŝtupsupreniris sur glora kaj malglata tapiŝo da kadavroj, supreniris en la dolĉa fetoro, kiu estas la incenso de la militaj triumfoj. Lia filo Ilgi staris ĉe lia maldekstro, kaj la granda pastro staris ĉe lia dekstro. Sur la ruina supro de la konstruaĵo li eldiris preĝon. Malsuprenirinte, li ĉirkaŭiris la monumenton.

La amaso parte rigardis, parte sekvis la procesion. En la koroj estis granda ĝojo. Kaj tiu ĝojo, elverŝigante el la koroj, manifestiĝis al la okuloj kaj al la oreloj per diversaj signoj. Jen la reĝo aŭ la granda pastro eldiris solenajn formulojn super la vasta klinita silento de la amaso. Jen estis liberaj kaj entuziasmaj krioj. Ĉi tie oni aplaudis bravajn soldatojn dancantajn militdancojn. Tie oni ekscitis per ridoj, paroloj kaj gestoj, negrojn kaj nanojn, kiuj multobligis, en plej plaĉaj tordiĝoj, plej amuzajn grimacojn.

Poste la unuanima amaso ronde dancis ĉirkaŭ la konkerita zigurato. Kaj ĝiaj hurladoj devigis la diojn sin turni

al ĝia dankemo kaj al ĝiaj preĝoj. La muzikistoj kunhelpis por altiri la atenton de la dioj ; ili ĉerpis el siaj instrumentoj bruojn tiel grandegajn kaj malagordajn kiel la kriegado de la amaso.

Meze de ĉiu faco kaj ĉe ĉiu angulo de la monumento Urĥam okfoje ripetis, kun plej emocia pieco, la saman promeson per la samaj vortoj.

- Sinjoro Bel, mi donos al cia gloro tiun ĉi templon, kiun malpiuloj starigis kontraŭ cian gloron. Sinjoro Bel, tiuj malpiuloj faris nenion laŭ la ritoj, kaj ili ne observis la preskribitajn epokojn. Ili forĝesis, ke la briko estas sankta, kaj ke ĝi ne en ĉiu tempo fabrikiĝas ; ili forĝesis, je kiu dato zigurato devas esti komencata. Tial ilia laboraĵo estas disfalo kaj minaco. Ni refaros ĉiujn aferojn, laŭ la reguloj, en la markitaj epokoj. Tiel ilia laboraĵo fariĝos nia laboraĵo ; kaj nia solida laboraĵo portados dum jarcentoj la adorindan pezon de cia gloro. Sinjoro Bel, mi muldigos la brikojn en la monato dediĉita al cia filo Sivan, arkitekto de la universo kaj sinjoro de la fundamentoj. En la monato de Araĥ-Samma mi komencigos la laborojn laŭ la ritoj. Eĉ oni plilarĝigos la fundamentojn, por ke ĉio estu, kvazaŭ ni estus la unuaj laboristoj de la tasko. En la novajn fundamentojn mi ĵetos por cia honoro lamenojn el oro, el arĝento kaj el antimono. Por cin honoro, la ĉeestantoj ĵetos en la novajn fundamentojn la amuletojn, kiuj kovras ilian bruston, kaj la amuletojn, kiuj pendas de la franĝo de ilia robo. Ni ĵetos en la fundamentojn ĉiujn niajn ruĝajn amuletojn, tajlitajn ŝtonojn, gravuritajn ŝtonojn, bulojn, bareletojn kaj cilindrojn.

"Sinjoro Bel, tiuj promesoj estas farataj de la vivanta reĝo, kaj, ĉu li plu vivos, ĉu li mortos, tiuj promesoj estos plenumitaj de la vivanta reĝo. Ilgi, filo de mia karno, filo kaj atestanto de cia korkomparto, promesas kun mi."

Tiam Ilgi ekkriis :

- Mi promesas kun ci.

Kaj Hamurabi :

- Parolo de Sinjoro Bel : Mi akceptas la promeson

de mia filo Urĥam, kaj mi akceptas la promeson de mia filo Ilgi.

La morgaŭon oni forlasis la ebenaĵon de Sennaar. Inter la festo sur la ebenaĵo de Sennaar kaj la festoj celebrataj en Ur-Kalanna, la vojaĝo mem estis festo. La plimulto el la popolo, el la soldatoj kaj el la sklavoj sekvis la teran vojon, en marŝado akompanata de kantoj, kaj ofte fariĝanta danco. La reĝo, la pastroj, la oficiroj, la elitaj trupoj amasiĝis en multegaj ŝipoj. Sur Eŭfrato, sonanta de la plej rajtigita ĝojo, estis senĉesa maskerado. Ĉiufoje, kiam oni alboridiĝis, oni malsupreniris en la sono de kastanjetoj kaj flutoj. Oni provokis la junulinojn kaj la matronojn de la loko honorata per tiu ŝiphalto. Oni kuspis robojn. Inter piaj petolsaltoj kaj religiaj rondodancoj, oni kuntrenis la virinojn al la plej proksima sankta arbaro. Vidante tiujn procesiojn el dancoj, himnoj kaj deziroj, la dioj jubilis. La maljunuloj, ĝojmirante, salivis de feliĉo. Neniu marŝis sen krono sur la kapo. Vino fluis en la buŝojn kaj iaforte ekster la buŝoj. La popolo gaje kuradis tien kaj ĉi tien, kun la haroj surfluataj de parfumoj. En la honoro al la dioj kaj al la reĝo, la infanoj petoladis de la ĉarma leviĝo de la aŭroro ĝis la gloro, flamo kaj sango, de la kuŝiĝanta suno.

FINO

## GLOSARO

Vortoj ne troveblaj en PV kun suplemento, - troveblaj en PIV:

ascend/i	ideogram/o	rimors/o
bisin/o	ĵar/o	rong/i
briz/o	kasi/o	sekvenc/o
brusk/a	klik(et)/i	sordid/a
brutal/o	kompan/o	stirak/o
cintr/o	krepit/i	stret/a
degn/i	kusp/i	stupor/o
delic/o	noc/i	sukub/o
devot/a	obscen/a	svag/a
enorm/a	orgojl/o	tenebr/o
forst/o	ostaĝ/o	transvers/a
fragil/a	prizon/o	vor/i
hena/o	raĝ/o	zigurat/o
hid/a	rikan/i	

- ne troveblaj en PIV :

mormiro : speco de planto kun dornoj.

patesis : provincestro en antikva Kaldeo.

Propraj nomoj : laŭ PIV, aŭ fonetike transskribitaj.

De la sama aŭtoro, ĉe SAT-Broŝurservo :  
\*\*\*\*\*

La Aperoĵ de Ahasvero  
Individuismo en Antikveco  
Individuista Manlibreto  
La Kvina Evangelio  
La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes  
La Veraj Interparoladoj de Sokrato

Directeur de publication  
& imprimeur : Chr. Baudé  
F 47340 Laroque Timbaut

Cercle espérantiste de l'Agenais  
"Laŭte!" \* F 47340 Laroque Timbaut  
1983 \* 20 FF